



# EL POPOLA ĈINIO

ro 8-9

Aŭgusto - Septembro

1968



Alte tenante la tri ruĝajn standardojn de la ĝenerala linio, la antaŭensaltego kaj la popola komunumo, la ĉina popolo kuraĝe marŝas antaŭen kun senlima entuziasmo.

En 1958, sub la lumo de la Ĝenerala Linio de Socialisma Konstruado de la Partio ellaborita sub la persona direktado de Prezidanto Maŭ, aperis vigle prosperanta situacio de antaŭensaltego en nia nacia ekonomio kaj la nova formo de socia organizo — popola komunumo en la vasta kamparo. Kun klara antaŭvido kaj alte taksante la organizan formon de popola komunumo kreita de la kamparana amaso, Prezidanto Maŭ montris, ke **“la popola komunumo estas bona”**. En aŭgusto la Komunista Partio de Ĉinio okazigis plivastigitan kunvenon de la Politika Buroo, en kiu estis pasigita la **“Rezolucio pri la Starigo de la Popola Komunumo en la Kamparo”**. Tio ebligis al la popola komunumo en la kamparo de nia lando triumfe antaŭenmarŝi laŭ la direkto de socialismo montrita de Prezidanto Maŭ.



Prezidanto Mañ inspektas iun popolan komunumon.



# Ruĝa Flago Flirtas sur Ĉajaŝan-montaro

**L**EVIGAS la suno, ruĝiĝas la tuta tero, kaj ĉe la piedo de Ĉajaŝan-montaro, prezentiĝas nova fizionomio.

En 1958, la Ĉajaŝan-popolkomunumo de Suj-ping-gubernio naskiĝis en sonado de la triumfakanto de la socialisma antaŭensaltego de nia lando.

La dek jaroj trapasitaj de la Ĉajaŝan-popolkomunumo estis la jaroj, en kiuj la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ frakasis komplete la burĝaran reakcian linion de la ĉina Ĥruŝĉov, kaj la vastaj amasoj de malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj brave antaŭenmarŝis firme laŭ la larĝa socialisma vojo montrita de Prezidanto Maŭ.

## GRANDA ŜANĜIĜO DE LA REGIONO DE ĈAJAŜAN-MONTARO

La Ĉajaŝan-popolkomunumo situas en la montregiono de suda Henan, fame konata kiel malriĉa regiono de la provinco antaŭ la Liberiĝo. Sed nun de la piedo de la impona Ĉajaŝan-montaro ĝis la belaj kaj fekundaj bordoj de la rivero Songhe, ĉie regas plena viveco kaj prospero.

De dek jaroj, la tiea popolo alte tenas la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong, vaste kaj profunde disvolvas amasan movadon de kreiva studo kaj kreiva aplikado de verkoj de Prezidanto Maŭ. Kun profunda klasa amsento senlime fidela al Prezidanto Maŭ, ĉiuj familioj kaj ĉiuj homoj, viroj kaj virinoj, maljunuloj kaj infanoj, el la vastaj amasoj de malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj "legas verkojn de Prezidanto Maŭ, aŭskultas liajn vortojn kaj agas laŭ liaj instrukcioj". En la senprecedenca, granda

proletara kultura revolucio, aperis nova alttajo de la amasa movado de kreiva studo kaj kreiva aplikado de verkoj de Prezidanto Maŭ. Kaj tio pluapasa akcelis la ideologian revoluciigon de homoj, kaj al la vastaj amasoj de komunumanoj estas starigita pluapasa la ideo dediĉi sin tutkore al la kolektivo kaj terkulturi por la revolucio.

Dank' al la kolektiva potenco de popola komunumo, la tiea popolo iris la vojon de sinapogo sur la propraj fortoj kaj disvolvis la revolucion spiriton de la Malsaĝa Avo translokigi montojn, por transformi la facile inundeblan kavteron kaj montregionon, farante bravan kaj obstinan batalon kontraŭ la naturo. En dek jaroj la fizionomio de la tuta komunumo komplete kaj radikale ŝanĝiĝis, kaj plenkamplekse disvolviĝis ĉe ĝi la agrikulturo, forstado, paŝtado, flankokupoj kaj fiŝado. La traktora stacio de la komunumo nun posedas dek traktorojn de normigita tipo. Estas konstruitaj 7 grandaj kaj malgrandaj akvokonservejoj kun 12 milionoj da kubmetroj da akvo. La totala surfaco de akvumebraj kampoj atingis pli ol 15,000 muojn, kaj sur montdeklivoj estas konstruitaj pli ol 500 muoj da akvumebraj ŝtuparaj kampoj. La produktkvanto de greno kaj kotono multe kreskis de jaro al jaro. En 1967, ili vendis al la ŝtato pli ol 850,000 kg. da superflua greno kaj 65,000 kg. da kotono kaj plantis arbojn sur areo de 24,000 muoj. La kolektivo starigis 9 brutbredejojn kun 510 grandaj brutoj kaj 210 ŝafoj de maldika lano. Prilaborado de agrikulturaj kaj flankokupaj produktajoj estas fundamente farata duonmekanike. Ĉio ĉi tio konvinke pravas, ke la popola komunumo de nia lando, novnaskita afero aperinta en la oriento de la mondo, posedas senkompare potencon vivforton.

## PREZIDANTO MAŬ LIGIĜAS KUN LA PO- POLO DE ĈAJAŜAN-MONTARO KORO KUN KORO

Ekde sia naskiĝo, la Ĉajaŝan-popolkomunumo ĝuas favoran prizorgadon kaj grandan apogon de nia granda instruanto Prezidanto Maŭ.

En 1958, jaro de la socialisma antaŭensaltego en nia lando, Prezidanto Maŭ inspekte vojaĝis al sudo kaj nordo de Jangzi-rivero, al ambaŭ flankoj de la Granda Muro kaj al la bordoj de la Flava Rivero. Ĝuste en tiu jaro, kiam la popolo de Ĉajaŝan-montaro ĝoje bonvenigis la unuan abundan rikolton post la fondiĝo de la popola komunumo, la eksterordinara, ĝojiga informo kvazaŭ printempa tondro disaŭdiĝis de Ĉajaŝan-montaro al la ĉirkaŭaj lokoj.

“Prezidanto Maŭ venis al nia Sujping! Prezidanto Maŭ venis al nia Sujping!” Oni kun ĝojego informis tion unu al alia.

En Sujping Prezidanto Maŭ persone akceptis reprezentantojn de la komunumanoj kaj demandis detale pri la kreskado de la Ĉajaŝan-popolkomunumo, la vivo de la komunumanoj kaj eĉ pri iliaj

laboro, ripozo, vestaĵo, manĝaĵo, sanitariaj kaj kuracaj kondiĉoj. La reprezentantoj de la komunumanoj estis tiel emociitaj, ke varmaj larmoj vualis iliajn okulojn. Ili esprimis antaŭ Prezidanto Maŭ sian decidon, ke la popolo de Ĉajaŝan-montaro nepre funkciigos bone la popolan komunumon por ne vanigi la plej grandan zorgon, kiun Prezidanto Maŭ havas por ili. Kun rideto Prezidanto Maŭ ripetade kapsignis al la reprezentantoj sian subtenon al ilia decido. Poste, Prezidanto Maŭ faris ekstreme gravan instrukcion al la reprezentantoj. Dum dek jaroj, la popolo de Ĉajaŝan-montaro firme tenis en sia memoro la instruon de Prezidanto Maŭ kaj fojon post fojo rakontis al la juna generacio pri la emocia sceno de intervidiĝo de la reprezentantoj de la ĉajaŝan-popolkomunumanoj kun Prezidanto Maŭ, por ke la junuloj transdonu la instruon de Prezidanto Maŭ de generacio al generacio kaj ĝin disvolvu.

Prezidanto Maŭ ligiĝas kun la amasoj koro kun koro. Kun sia kuraĝeco kaj temperamento de granda proletara revoluciulo li bone scias trovi kaj decideme apogi la novan aferon aperintan inter la amasoj. Kiam la Ĉajaŝan-popolkomunumo

*La vastaj amasoj de la malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj de Ĉajaŝan-popolkomunumo brave marŝas antaŭen senŝanceliĝe laŭ la socialisma vojo montrita de Prezidanto Maŭ.*







*Ĝoje celebrante la 10-an datrevenon de la fondiĝo de Ĉajaŝan-popolkomunumo, la vastaj amasoj de malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkamaranoj jubilas kaj deziras al Prezidanto Maŭ longan longan vivon.*

troviĝis ankoraŭ en la stato de sia burĝonado, Prezidanto Maŭ persone sendis laborgrupon estratan de kamarado Ĉen Boda al Hanloŭ-brigado de la komunumo. Tuj post la alveno al la vilaĝo, la laborgrupo komencis helpi la kadrojn de la brigado resumi siajn spertojn kaj ellabori perspektivan planon por la komunumo. Kaj la laborgrupo tre baldaŭ kunfandiĝis kun la malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkamaranoj. La sekretario de kamarado Ĉen Boda iris al la kuirejo por helpi en manĝopreparado kaj bovlolavado, kaj ankaŭ kamarado Ĉen Boda mem laboris kiel ordinara laborulo sur la kampoj kune kun la komunumanoj. Tuj kiam li trovis liberan tempon, li vizitis komunumanojn por babilu kun ili pri politiko kaj hejmaj aferoj, kaj demandis pri ilia farto kaj vivado, tiel intime, kvazaŭ ili estus samfamilianoj. Krome, kamarado Ĉen Boda multfoje

kunvokis kunsidojn de malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkamaranoj, en kiuj li profunde sed facile kompreneble klarigis al ili la belan perspektivon de komunismo kaj kuraĝigis la komunumanojn alte teni la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong kaj decideme iri la vojon de popolkomunumigo, la brilajn vojojn de socialismo.

La instrukcio, kiun faris Prezidanto Maŭ ĉe akceptado de la reprezentantoj de la ĉajaŝan-komunumanoj dum sia inspektado al Sujping, la laborgrupo sendita de Prezidanto Maŭ al Ĉajaŝan-montaro kaj ilia firmeco en efektivigado de la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ, ĉio ĉi tio donis al la popolo de Ĉajaŝan-montaro grandan kuraĝigon kaj forton. Por la brava kaj laborema popolo de Ĉajaŝan-montaro ĉiaj nigraj ventoj kaj insidaj ondoj estas venkeblaj.



*Kalva monto fariĝis verda maro kaj sur montdeklivo paŝtiĝas ŝafaroj.*

### **LA POPOLO DE ĈAJAŜAN-MONTARO FORPELIS LABORGRUPON SENDITAN DE LA ĈINA ĤRUŜĈOV**

Kiam la popolo de Ĉajaŝan-montaro alte tenis la tri ruĝajn flagojn de Ĝenerala Linio, Antaŭensaltego kaj Popola Komunumo kaj antaŭenmarŝis kantante, la ĉina Ĥruŝĉov, profitante la okazon ke nia lando renkontis naturajn katastrofojn dum tri sinsekvaj jaroj, lanĉis plenamplaksan kaj furiozan atakon kontraŭ socialismo kaj la popola komunumo sur ĉiuj frontoj de politiko, ekonomio, ideologio, kulturo k. a., akompanante, ekstere, la kontraŭĉinan ĥorajon de imperiismo, reviziismo kaj la reakciuloj kaj komplotante, interne, kun la bienuloj, kulakoj, kontraŭrevoluciuloj, fiuloj kaj dekstruloj. Je 3-a de nov. 1960, la ĉina Ĥruŝĉov sendis sian fidelan sekvanton, kontraŭrevolucian duvizaĝulon Taŭ Ĝu kaj liajn nigrajn helpantojn al Ĉajaŝan-montaro. Vidante Hiasong-akvokonservejon konstruitan de la popola komunumo, Taŭ Ĝu riproĉis grincante per siaj dentoj: “Por kio ĉi tio? Kial ne ebenigi ĝin en kampojn?” Kiam li vidis porkejon en Ĉanghan-brigado, en kiu povas esti bredataj 300 porkoj, li riproĉe demandis la respondeculon de la brigado Vang Bingjin: “Por kio vi bezonas bredi tiom multe da porkoj? Tuj dis-

tribuu ilin al la komunumanoj por manĝi!” En la de ili kunvokita enketa kunveno, Taŭ Ĝu kaj liaj nigraj helpantoj senbride elkriis sian reakcian absurdajon, ke “tro frue kaj malbone estas starigita la popola komunumo”, kaj atribuis al Ĉajaŝan-popolkomunumo nenion bonan. La krima celo de Taŭ Ĝu estis facile videbla; li intencis arogante forhaki la ruĝan flagon de Ĉajaŝan-popolkomunumo starigitan persone de Prezidanto Maŭ. Poste, la ĉina Ĥruŝĉov kaj la kontraŭrevolucia duvizaĝulo Taŭ Ĝu energie praktikis la “tri pliigojn kaj unu fikson”\* kaj levis diablan venton de restaŭro de kapitalismo en Ĉajaŝan-montaro, pere de siaj agentoj en Henan-provinco en komploto kun la bienuloj, kulakoj, kontraŭrevoluciuloj, fiuloj kaj dekstruloj.

La ruĝa flago de Ĉajaŝan-montaro estas starigita persone de Prezidanto Maŭ. Kaj la reprezentantoj de la malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj kaj la kadroj de bazaj unuoj de Ĉajaŝan-montaro, kiuj propraorele aŭdis la voĉon de Prezidanto Maŭ, tuj travidis la kriman intrigon de la ĉina Ĥruŝĉov kaj liaj helpantoj, grandaj kaj malgrandaj, kaj faris pinto-kontraŭ-pintan batalon kontraŭ ili. Komunumano-malriĉkampano de Hanloŭ-brigado Ĝoŭ Venhing riproĉe demandis la



laborgrupon senditan de la ĉina Ĥruŝĉov por efektivi la fikson de produkta kvoto bazita sur familia mastrumado: "Ĉu tiu via paŝo ne signifas retroiron kaj revenon al la malnova vojo de individua mastrumado? Se vi daŭre tiel faros, ni malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj vin forpelos!" Tuj la malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj kaj la vastaj komunumanaj amasoj elpensis post interkonsiliĝo metodon por forpeli la laborgrupon de la ĉina Ĥruŝĉov. Ĉiuj komunumanoj rifuzis kontakti kun ili kaj ankaŭ ne preparis por ili manĝaĵon. Tiamaniere, la nigra laborgrupo estis forpelita malbonhumore.

Ĉar la popolo de Ĉajaŝan-montaro estas armita per la penso de Maŭ Zedong, tial ĝi povis stari neflekseble antaŭ la minaco de la klasa malamiko kaj ne lasis sin trompita per dolĉaj vortoj.

## LA SOCIALISMAN VOJON DEFINITIVE IROS LA POPOLO DE ĈAJAŜAN-MONTARO

Ĉe la piedo de Ĉajaŝan-montaro, flirtas ruĝaj flagoj kaj ŝvebas sonoraj kantoj. Ĉie troviĝas batalkampo por kritiki la ĉinan Ĥruŝĉov.

En la tagoj por batalakiri la plenan venkon de la granda proletara kultura revolucio kaj plue levi la altan tajdon de revolucia amasa kritikado, la popolo de Ĉajaŝan-montaro fariĝas pli vigla kaj impetema en spirito. Sur la batalkampo de revolucia amasa kritiko, la irado de kritiko vekis ĉe ili ĉiam pli senkomparan malamon kontraŭ la damninda krimo de la ĉina Ĥruŝĉov restaŭri kapitalismon per praktikado de la "tri pliigoj kaj unu fikso" kaj "kvar liberoj"\* en la kamparo, kaj senliman amon kaj fidelecon al la granda instruanto Prezidanto Maŭ kaj lia proletara revolucia linio.

Ilia revolucia amasa kritikado iras vivece kaj vigle en tre variaj formoj. Estas indignaj kondamnoj kontraŭ la ĉina Ĥruŝĉov, estas rememoroj pri la feliĉaj dek jaroj, dum kiuj ili sekvis Prezidanton Maŭ sur la vojo de komunumigo, kaj estas ankaŭ vivaj kaj interesaj rakontoj pri la batalo inter la du klasoj, du vojoj kaj du linioj. Estis multaj vivecaj ekzemploj en la batalo de la malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj de Hanloŭ-, Ĉanghan-, Tuŝan- kaj Jangdian-brigadoj kontraŭ la ĉina Ĥruŝĉov. En 1960 la ĉina Ĥruŝĉov alsendis sian nigran ĉefhelpanton Taŭ Ĝu por forpreni maŝinojn de la fabriko funkciigata de la Ĉajaŝan-komunumo. La malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj batalis kontraŭ la ĉina Ĥruŝĉov, Taŭ Ĝu kaj similaj, laŭ la maniero, kiun ili uzis kontraŭ la japanaj agresantoj dum la Kontraŭjapana Rezistmilito kaj kontraŭ Ĉiang Kajŝek, la lakeo de la usona imperiismo, dum la Liberiga Milito. Ili forkaŝis la maŝinojn de la kolektivo kaj poste starigis per ili riparejon, prilaborejon de la produktaĵoj de agrikulturo kaj flankaj okupoj kaj brikfarejon. Jangdian-brigado krome sukcesis reteni aŭtomobilojn kaj ĉevalĉarojn, kiujn Taŭ Ĝu intencis forpreni. Tio multe subtenis la disvolvadon de la agrikultura produkto. Kiam Taŭ Ĝu kaj liaj nigraj helpantoj devigis ilin malorganizi brutbredejojn funkciigatajn de la komunumo kaj brigadoj, la lastaj prenis la rimedon de formala disigo por trompi la antaŭajn, sed kaŝe konservis kaj eĉ pluapaŝe firmigis kaj disvolvis tiujn brutbredejojn. La suprediritaj faktoj pravas, ke la popolamaso armita per la penso de Maŭ Zedong jam antaŭlonge travidis la intrigon de la ĉina Ĥruŝĉov kaj liaj agentoj pri restaŭro de kapitalismo kaj decideme batalis kontraŭ ili.



*Hiasong-akvokonservejo,  
konstruita de la komunumanoj,  
ludis gravan rolon en batalo kontraŭ  
trosekeco kaj inundo.*

La popolo de Ĉajaŝan-montaro unuvoĉe akklamas: “Bona estas la popola komunumo”. En iu kritika kunveno, kamarado Vang Bingjin, ĉefkomitatano de la revolucia komitato de Ĉanghan-brigado diris: “Prezidanto Maŭ diras ke ‘bona estas la popola komunumo’, ankaŭ ni revolucia popolo diras ke efektive bona estas la popola komunumo, sed la ĉina Ĥruŝĉov diras ke ĝi estas malbona. En 1960, kiam Taŭ Ĝu kaj liaj nigraj sekvantoj venis al nia brigado por efektiviĝi la ‘tri pliigojn kaj unu fikson’, ni malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj indigne diris al ili: ‘Neniu povos nin malhelpi, la brilan socialisman vojon montritan de Prezidanto Maŭ ni iros definitive!’ Ĝuste en tiu jaro, ni entreprenis pli grand-skalan akvoutiligan konstruadon. Kunportante la revolucionan trezoran libron, la komunumanoj energie laboris unu vintron kaj unu printempon kaj tiel plivastigis rizkampojn de 800 muoj ĝis 1,300 muoj. Nun la 4,010 muoj da kampoj de nia brigado estas senescepte transformitaj en akvumeblojn

kampojn, inter kiuj 3,000 muoj povas esti irigacitaj per la fluo mem. Al la tuta brigado estas efektivigita la irigacio de la kampoj. En 1967 ni vendis al la ŝtato pli ol 120,000 kg. da superflua greno kaj havis plie 45,000 kg. en rezervo. Ni ne havus nian hodiaŭon, se ni ne aŭskultus la vortojn de Prezidanto Maŭ kaj ne irus firme la socialisman vojon.”

Prave, kiam oni malfermas la dekjaran gloran historian libron de la Ĉajaŝan-popolkomunumo, oni povas vidi, ke ĉiu paĝo en ĝi disradias la brilon de la penso de Maŭ Zedong. Jen tiel kantas polkanto de la komunumanoj ĉe la piedo de Ĉajaŝan-montaro:

*Komunismo estas paradizo;*

*Al ĝi la popola komunumo estas ponto.*

*Montris al ni Prezidanto Maŭ la luman vojon,*

*Daŭros la feliĉa viv’ sen fino.*

\*Vidu “Enciklopedieton” en EPC, n-ro 2 (116).

SONG GONG:

# Ŝanĝiĝoj de Akvoriĉa Regiono

— Notoj pri Hanggiahu-ebenejo

EN 1958, la popola komunumo aperis kiel la ruĝa suno sur la orienta horizonto kaj tuj montris sian potencon vivforton. Hodiaŭ, en 1968, kiam la vastaj amasoj de komunumanoj de nia lando celebras kun granda ĝojo la dekan datrevenon de la naskiĝo de la popola komunumo, ni venis al Hanggiahu-ebenejo, fama regiono de fiŝoj, rizo, silkraŭpoj kaj morusarboj en Ĝegiang-provinco, kaj vizitis tie kelkajn komunumojn kaj

brigadojn. La progreso de la popolaj komunumoj dum la lastaj dek jaroj pli klare manifestis ilian superecon en diversaj flankoj.

Hanggiahu-ebenejo situas en la delto de Jangzrivero. Tie estas facile inundeblo regiono kun reto da dense interplektitaj lagoj kaj riveroj. Laŭ notoj en la historio, nur en 50 jaroj (1907 — 1957), kompare grandaj superakvegoj okazis dek fojojn

kaj malgrandajn inundojn kaj trosekecon oni renkontis preskaŭ en ĉiu jaro. Kvankam oni faris antaŭ la komunumigo iujn malgrandajn akvoutiligajn konstruaĵojn, tamen ili ne povis defundamente forigi la inundon kaj trosekecon.

Post la apero de popolaj komunumoj en 1958, sub la brilo de la tri ruĝaj standardoj kaj dank' al la supereco de la popola komunumo—unue, la grandeco en organiza skalo, due, la komuneco en proprieto, la vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj levis amasan movadon de akvoutiliga konstruado. Ekde tiu tempo estis sinsekve efektivigitaj vicoj da grandaj akvoutiligaj projektoj, kiaj dragado de riveroj kaj konstruado de digoj kaj baraĵoj por konservi akvon kaj jungi la riverojn Orienta kaj Okcidenta Tiaŭhihe. Kun la vigla disvolviĝo de la elektra k. a. industrioj de la lando en la dek jaroj, ĉie en la kamparo aperis instalaĵoj por irigacii kaj dreni per elektro. Fine solviĝis en tiu regiono de akva reto la problemoj de drenado kaj irigaciado, inkluzive irigaciadon de altaj kampoj.

Ĉie en Hanggiahuebenejo, ĉu sur la verdaj kampoj aŭ en bonordaj vilaĝoj, kio unue frapis niajn okulojn, kiam ni promenis nian rigardon malproksimen, estis la vice starantaj elektraj stangoj, feraj turoj por sendo de elektro, kaj retoj formitaj el grandaj kaj malgrandaj elektraj transformatoraj stacioj kaj elektraj irigaciaj kaj drenaj stacioj. Laŭ nekompleta statistiko, en la dek gubernioj de la tuta regiono nun estas instalitaj alttensiaj kaj malalttensiaj elektraj fadenoj kun longeco de pli ol 6,000 kilometroj, pli ol 4,380 elektraj irigaciaj kaj drenaj stacioj, kies efikeco jam ampleksas pli ol 80% de la totala surfaco de akvaj kampoj. Tiu ĉi granda reto de elektraj irigaciaj kaj drenaj stacioj estis starigita, en dek jaroj sub la subteno de la ŝtato, de la popolaj komunumoj, kiuj ĉefe apogis sin sur la forto de kolektiva ekonomio.

Dum nia vizitado, kamaradoj de Lejdian-komunumo, Deking-gubernio, sciigis al ni, ke



*La komunumanoj ŝatas studi la ruĝan trezoran libron.*

frue antaŭ la komunumigo, la tri altgradaj agrikulturaj kooperativoj, nome: Hinlian, Heping kaj Dafeng, jam planis ĉiu por si starigi elektran irigacian kaj drenan stacion. Sed pro tio, ke iliaj kampoj situis intermikse unu kun alia kaj ne povis esti uzataj unuece, iliaj planoj pri tiu fundamenta konstruaĵo ne povis efektivigi dum pluraj jaroj. La kontraŭdirojn solvis la popola komunumo, kaj en la sekvinta jaro de ĝia naskiĝo oni jam konstruis unu elektran irigacian kaj drenan stacion. Tiel la rikolto de la akvaj kampoj de tiuj tri brigadoj estas garantiata tiel en okazo de inundo kiel en okazo de trosekeco dank' al la irigacia sistemo. En la lastaj jaroj, per sia propra akumulita kapitalo kaj malgranda investo de la ŝtato, la komunumo starigis sume 43 malgrandajn elektrajn irigaciajn kaj drenajn staciojn, kaj tiel realigis la elektrigon de irigaciado kaj drenado de ĉiuj ĝiaj akvaj kampoj.

En Kiantanggiang-komunumo, Hajning-gubernio, ĉe la fervoja linio Ŝanhajo — Hangĝoŭ, troviĝas Gingsan-brigado. Ĝin oni priskribis en la pasinteco per jenaj versoj:

*Sovaĝaj herboj kovras Ĝingŝan-monton plene,  
Senmastraj tomboj kuŝas ĉe loĝdomoj kiel najbaroj.  
Sur kampoj kreskas dornarbustoj interpreme,  
Fragmitaj floroj ŝvebas super lagoj en spiraloj.*

Sed nun la brigado jam instalas por si pli ol 30 kilometrojn da altensiaj kaj malaltensiaj elektraj fadenoj kaj kvar relative grandajn elektrajn irigaciajn kaj drenajn staciojn. En la tago kiam ni vizitis tiun brigadon, ĝuste ili provis la nove konstruitan subteran kanalon kiu havas longecon de pli ol 3,000 metroj kaj servas por konduki akvon al kampoj. Ĝi estas farita el cementaj tuboj metitaj profunde sub la tero kiel urbaj akvo-kondukiloj. Nur dudek minutoj sufiĉas post ekfunkcigo de la maŝino en la stacio, por konduki klaran akvon al la kampoj tra la 30 elfluaj putoj kunigitaj kun la kanalo. Tia kanalo ne nur ŝparas terspacon kaj akvon, sed ankaŭ riparajn laborojn; cetere ĝi kondukas akvon rapide kaj faciligas maŝinan plugadon. Oni diris al ni, ke la tuta sumo de 26,000 juanoj bezonata por konstrui tiun kanalon devenis de la propra akumulita fonduso de la brigado. Krome la projektado kaj konstruado estas faritaj ankaŭ de la brigadanoj mem.

Kun la disvolviĝo de la produktado de elektra energio kaj maŝinoj, ne nur la irigaciado kaj drenado, sed ankaŭ la plugado, draŝado, prilaborado de grenoj kaj aliaj laboroj progresas grandpaŝe sur la vojo de elektrigo kaj mekanikigo.

Dum nia vizitado en Pinghu, Ĝiaĥing, Tongĥiang kaj aliaj gubernioj ni vidis, ke en multaj komunumoj kaj brigadoj, bovoj estas jam anstataŭitaj per elektraj plugiloj kaj mantraktoroj en plugado. Por plugi unu muon da tero per elektra plugilo, unu homo bezonas nur unu horon kaj la erpado estas samtempe farita. Kaj ĝia elektra pago estas nur tri cendoj. Por individuaj kamparanoj, la uzo de elektra plugilo estas tute neimagebla, se ili ne apogus sin sur la kolektiva forto de popola komunumo.

La disvolviĝo de akvoutiligaj aferoj kaj irigaciado kaj drenado per elektro en Hangĝiaĥu-ebenejo donas garantion al ĝia stabila kaj alta produkto de grenoj.

En septembro 1962, la tajfuno n-ro 14 forte atakis la marbordan regionon de Ĝegiang-provinco. Post ĝi, 3,330,000 muoj da kampoj en Hangĝiaĥu-ebenejo estis subakvigitaj. En tiu urĝa momento, pli ol 3,000 elektraj irigaciaj kaj drenaj stacioj, dise troviĝantaj en la komunumoj kaj brigadoj sur la ebenejo samtempe eklaboris, kaj nur en

3-5 tagoj ili jam fordrenis la tutan amasiĝintan pluvakvon. Dank' al tio la totala produkta kvanto de grenoj de la dek gubernioj en la tuta regiono tiujare ne nur ne malpliigis, sed eĉ pliiĝis je 18% kompare kun tiu de 1961. Kaj oni akiris ankaŭ riĉan rikolton de kotono, kanabo, kokonoj kaj morusfolioj.

En 1967, Hangĝiaĥu-ebenejo trafis ekstreme grandan sekecon, kaj pluvo mankis dum pli ol 120 tagoj. Tamen seka estis nur la vetero, sed ne la kampoj, ĉar la elektraj irigaciaj kaj drenaj stacioj ĝustatempe distribuis la akvon alsenditan de akvokonservejoj. Firme sekvante la grandan alvokon de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ "**teni la revolucion kaj stimuli la produkton**", la vastaj amasoj de komunumanoj, malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kaj revoluciaj kadroj verŝis sian entuziasmon vekitan de la granda proletara kultura revolucio en produktadon, tiel ke ili fine akiris grandan riĉrikolton en la jaro de granda sekeco. La totala produktkvanto de grenoj de Ĝiaĥing eĉ superis la rekordan jaron 1966 je 6%.

Prezidanto Maŭ diris: "**Revolucio estas liberigo de la produktaj fortoj, revolucio estas akcelo al la disvolviĝo de la produktaj fortoj.**" La starigo de la sistemo de elektra irigaciado kaj drenado kvazaŭ densa aranea reto ne nur plifortigis la rezistan kapablon de la kampoj kontraŭ naturaj katastrofoj, sed samtempe ankaŭ liberigis multajn laborfortojn antaŭe katenitajn al la malnovaj akvolevaj instrumentoj, tiel ke la komunumoj havas sufiĉajn laborfortojn por uzi en la direkto al profundeco kaj vasteco de la produktado. La senĉesa disvastigo de la semareo de rizo por dufoja planto en jaro dum la lastaj jaroj en Hangĝiaĥu-ebenejo estas bona ekzemplo por pruvi tion.

Lugiaping-brigado de Daŭĉang-komunumo, Vuhing-gubernio, havas pli ol 800 muojn da rizkampoj. Antaŭ la starigo de la elektra irigacia kaj drena stacio, por manipuli akvolevilojn oni bezonis ĉiutage 200 homojn kun forta korpo. Okaze de inundo aŭ granda sekeco, ĉiuj brigadanoj devis sin ĵeti en batalon kontraŭ natura katastrofo. Tial, ĝis 1959, la pomua produktkvanto de rizo de tiu brigado estis nur ĉ. 300 kg. Dank' al elektrigo kaj mekanikigo de irigaciado kaj drenado kaj kreo de aliaj kondiĉoj, la brigado komencis planti rizon dufoje en unu jaro ekde 1960, kaj en 1963 ĝia pomua produktkvanto de rizo jam superis 450 kg. kaj en la lastaj jaroj ĝi jam superis 500 kg.

Nun la vastaj amasoj de malrickampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj de Hanggiahu-ebenejo rigardas la plivastigon de la semareo de rizo por dufoja planto kiel gravan paŝon por altigi la produktkvanton de greno kaj fari pli grandan kontribuon al la ŝtato. Laŭ la oficiala statistiko de la subprovinca agrikultura institucio, en 1967 la semareo de rizo por dufoja planto en la tuta regiono jam plivastiĝis ĝis 60% de la totala semareo de rizo, komencante en 1957 per provado en malgrandaj areoj, kaj en iuj komunumoj kaj brigadoj ĝis pli ol 90%. Antaŭ la popolkomunumigo, la pomua produktkvanto de 200-250 kg. da rizo estis ordinare konsiderata kiel riĉa rikolto, sed nun troviĝas tri gubernioj, kies meznombra pomua produktkvanto atingas 500 kg., kaj komunumoj kaj brigadoj kun tia produktkvanto estas ankoraŭ pli multaj.

Trinkante akvon oni ne devas forgesi la putfosinton kaj akirante riĉan rikolton oni ne devas forgesi Prezidanton Maŭ. Kun rapida disvolviĝo de la agrikultura produkto, ankaŭ ĉiam pli multe kontribuas la popolaj komunumoj al la ŝtato. Konkura vendado de superflua greno kaj aliaj agrikulturaj kaj flankokupaj produktaĵoj por subteni la socialisman konstruadon de la patrio kaj la revoluciajn popolojn de la mondo estas konsiderata de la vastaj amasoj de malrickampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj kaj revoluciaj kadroj kiel ilia devo. Kiam ni vizitis Hinhing-brigadon de Ŝendang-komunumo, Hajjan-gubernio, ni informiĝis, ke en 1967 la brigado akiris senprecedence riĉan rikolton, kaj ke krom rapide plenumi la taskon de grenlivero al la ŝtato, ĝi ankaŭ vendis al la ŝtato 180,000 kg. da superflua greno.

Dank' al kreiva studo kaj kreiva apliko de la penso de Maŭ Zedong, la vastaj amasoj de komunumanoj de Hanggiahu-ebenejo

jam pli firme starigis en si la ideon terkulturi por la revolucio, kaj en 1967 la kvanto de superflua greno vendita de la tuta regiono al la ŝtato pliiĝis je 19% kompare kun tiu de 1966. Krome ili ankaŭ superplenumis la taskojn difinitajn de la ŝtato en vendo de kokonoj, porkoj, fiŝoj kaj aliaj agrikulturaj kaj flankokupaj produktaĵoj.

\* \* \* \*

Nun la vastaj amasoj de malrickampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj kaj revoluciaj kadroj de la komunumoj kaj brigadoj de Hanggiahu-ebenejo grandpaŝe marŝas antaŭen sur la larĝa vojo de socialismo sub la brilo de la penso de Maŭ Zedong, korekta gvidado de diversnivela revoluciaj komitatoj kaj la forta subteno de la trupoj de PLA subtenantaj maldekstrulojn kaj la agrikulturon!

*Unu el la malgrandaj elektraj pumpstacioj por irigaciado kaj drenado.*



# Grenejo el Kalva Monto

## —Pri reformo de montareo fare de Nangunlonggoŭ-brigado

*Brilegas sune jen la granda pens' de Maŭ Zedong,  
Ŝanĝiĝis nia pens' kaj aliĝis nia mont'.  
En Drakravino nun torentas fluo jam sen ĉes',  
La kalva mont' fariĝis jam grenejo, vere jes.  
Liberiĝinte, Prezidanton Maŭ forgesos ni neniam,  
Al ruĝa sun' la ruĝan koron direktados ni por ĉiam.*

Jen estas nova popolkanto verkita de membroj de Nangunlonggoŭ-brigado de Ĝajbej-komunumo, Pingŝan-gubernio, Hebej-provinco. Persiste sin direktante per la orientilo de Prezidanto Maŭ “**sin apogi sur la propraj fortoj**”, sekvante ekzemplon de Daĝaj-brigado kaj firme sin apogante sur la fortoj de la kolektivo, la popolanoj de Nangunlonggoŭ konstruis sian malriĉan montvilaĝon en socialisman novan vilaĝon.

### ANTAŬEN LAŬ LA VOJO DE KOMUNA RI- ĈIĜO

Nangunlonggoŭ estas longa ravino en montaro je 500 metroj super la mara nivelo. Ambaŭflanke de ĝi staras altaj montoj kaj krutaj rokmuoj. La 87 familioj de Nangunlonggoŭ-vilaĝo dislokiĝas en 7-8 kilometrojn longa ravino, iuj ĉe la fundo, aliaj sur deklivoj. Antaŭe la brigado posedis 290 muojn da tero kiu estas distranĉita de ravinoj en pli ol 3,700 parcelojn, el kiuj ĉiu estis malfekunda kampeto pene ellaborita inter ŝtonegoj. En la malnova socio, pli ol 70 procentoj de la tero estis en la manoj de la kulakoj, kaj la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj vivis en mizero.

Dum multaj jaroj post la Liberiĝo, la sterilaj montoj kaj kapricaj akvoj en Nangunlonggoŭ ne estis reformitaj kaj la loĝantaro ne povis produkti sufiĉe da greno por sia konsumo.

“**Malriĉeco igas aspiri al ŝanĝo, entreprenado kaj revolucio**”. Nangunlonggoŭ-anoj firme de-

cidis sekvi tiun instruon de Prezidanto Maŭ kaj konstrui novan montvilaĝon per siaj propraj fortoj.

Komenciĝis la granda kooperiga movado de agrikulturo. Sub direktado de la orientilo de Prezidanto Maŭ pri socialisma transformo de agrikulturo, agrikultura produkta kooperativo fondiĝis en Nangunlonggoŭ. Sed tuj post ĝia fondiĝo, plenmano da klasaj malamikoj en la vilaĝo jam komencis ĝin subfosi per ĉiaj ruzoj kaj artifikoj. Ili klopodis ŝanceli la decidon de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, mokante: “Senhavuloj eĉ kooperativon volas fondi!” Kaj kelkaj kulakaj familioj eĉ kune formis “riĉulan kooperativon” en rivalo kontraŭ la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, kun vana espero faligi ilian kooperativon. La lastaj profunde komprenis, ke la “konkurso” kun tiuj kulakoj estas batalo inter la vojo socialisma kaj la vojo kapitalisma. Kun sia forta “aspiro de malriĉuloj” ili unuiĝis unuanime, firme decidis batali kun la malamikoj ĝis la fino, kaj post unujara penlaborado ricevis abundan rikolton, kio verdiktis pri la plena fiasko de la defio de la “riĉula kooperativo”.

En 1955, apenaŭ la elementa kooperativo de Nangunlonggoŭ transformiĝis en altgradan kooperativon, ĝi renkontis seriozan trosekecon kiu daŭris 40-50 tagojn. La organizitaj Nangunlonggoŭ-anoj tamen ne estis timigitaj de la malfaciloj, vizaĝe al la atako de sekegeco.

Iutage, la sekretario de la partia filio Li Kjuanŝou descendis kun kelkaj kooperativanoj la monton por aĉeti grenon, pelante azenojn. Kiam li vidis survoje vicon post vico da homoj irantaj al la grenbutiko por vendi sian superbezonan grenon, aperis en lia cerbo scenoj de pasintaĵoj: La patro mortis pro malsato, kiam li estis dekjara; li devis forlasi sian patrinon en sia 11-jara aĝo; li fariĝis



*Kamaradoj el la Liberiga Armeo por subteno de agrikulturo studas la plej novan instrukcion de Prezidanto Maŭ, kune kun komunumanoj de Nangunlonggoŭ.*

jardungito de kulako en sia dekdua jaro kaj vivis kiel ŝarĝbruto dum duono de sia vivo; post aliĝo al la Komunista Partio de Ĉinio en 1937, li partoprenis la Kontraŭjapanan Rezistmiliton, la Liberigan Militon, batalis kontraŭ lokaj tiranoj, dividis teron de bienuloj, fondis interhelpan grupon kaj kooperativon, ĉiam agante kiel antaŭiranto. Kiel oni povas nun, en fajre arda konstruado de socialismo, lasi Nangunlonggoŭ fariĝi balasto por la ŝtato?!

Reveninte al la vilaĝo, li tuj kunvokis la komitatanojn de la partia filio por interkonsiliĝo kaj elmetis al la kooperativanoj proponon jungi la montojn kaj akvojn. Tiam, en la vilaĝo estis nur 50 laborkapablaj homoj kaj krome mankis instrumentoj, mono kaj sufiĉa greno — unuvorte multis malfaciloj. Iu diris dubeme: “Ĉu ni povos sukcesi kun la malplenaj manoj?” Li Kjuanŝoŭ rakontis al la kooperativanoj historion pri la Longa Marŝo de la Ruĝa Armeo. Li diris: “An-

taŭe, dum la Longa Marŝo, la Ruĝa Armeo transgrimpis neĝmonton, trapasis marĉozan stepon, prenante ledrimenojn kaj herbradikojn kiel manĝon, persistis en la revolucio kaj akiris la venkon, renversinte la ‘tri montegojn’ de imperiismo, feŭdismo kaj burokrata kapitalismo nur per milio plus fusiloj. En reformado de monto por konstrui socialismon, nun ni havas la gvidon de la Partio kaj la kolektivajn fortojn kaj certe povos plenumi ĝin en du jaroj, se unu jaro ne sufiĉos por tio; aŭ en kvin aŭ dek jaroj, se du ne sufiĉos. Ni nepre konstruos Nangunlonggoŭ en socialisman riĉan montovilaĝon.”

Rapide la amasoj mobiliziĝis.

Post la aŭtuna rikolto en tiu jaro, montreformista sturmo taĉmento el kadroj, partianoj kaj malriĉkamparanoj-kooperativanoj organizita de la partia filio marŝis sur la monton, ĉiu kun ferstango sur la ŝultro, sekigitaj persimonoj en la zonumo kaj firma decido jungi la monton por la revolucio.

Nun irante al Nangunlonggoŭ, oni povas vidi demalproksime pecojn apud pecoj ebene sterniĝantaj nivelajn ŝtupkampojn ĉe la monttalioj ambaŭflanke de la ravino. Tiuj grandaj kaj malgrandaj ŝtupkampoj kun la totala areo de pli ol 320 muoj estas kreitaj de la Nangunlonggoŭ-anoj dank' al la fortoj de la kolektivo, per siaj propraj manoj, en la lastaj 12 jaroj, precipe post komunumigo. Cirkulas multaj kortuŝaj rakontoj pri penlaborado de la Nangunlonggoŭ-anoj en montreformo.

Ĉe Nangunlonggoŭ sin trovas loko nomata Ĉevalfaliga Montdorso. Ĉar tie estas plej alta montkresto, plej kruta deklivo kaj plej profunda ravino, kaj post pluvo furiozas plej forta torento, kiu ofte povas multe damaĝi la teron kaj domojn. Kaj ĝuste tie ekbolis la unua batalo montreforma de la Nangunlonggoŭ-anoj. Post ĝia komenciĝo, mineksplodoj por ŝtonrompado tondradis skuante la valon ĝin kovrante per fumvualo kaj disflugigante ŝtonpecojn. Iuj vilaĝanoj diris malaprobe: "Ĉu ŝtonplena deklivo povus produkti grenon? Kjuanŝoŭ kun liaj similuloj ja freneziĝis." Sed anstataŭ malkuraĝiĝi, Kjuanŝoŭ kaj liaj kamaradoj agis eĉ pli kuraĝe kaj memfide en venko de la naturo, aŭdinte tiujn malicajn babilojn. Dum ŝtonhakado kaj konstruado de baraĵo, Li Kjuanŝoŭ rakontis al la kamaradoj la fablon pri monttranslokigo de la Malsaĝa Avo. La rakonto verŝis en la kooperativanojn pli kaj pli da energio kaj entuziasmo, kaj ili diris unuj post aliaj: "Se la Malsaĝa Avo povis decidi translokigi du montegojn kun siaj familianoj, do ni certe povas venki eĉ dek Ĉevalfaligajn Montdorsojn gvidate de la Partio kaj Prezidanto Maŭ kaj havante la fortojn de la kolektivo." "Ni ĝin jungos, kiom ajn altas la monto kaj multas la deklivoj, kaj se ni mem ne povos plenumi la laboron, ĝin daŭrigos niaj filoj kaj nepoj."

Dum konstruado de baraĵo, se ŝtonego estis nemovebla por unu persono, oni do ĝin portis duope, aŭ per pli multaj paroj da manoj laŭ bezono, kaj iufoje eĉ ĉiuj ĝin levis kune per dek kelkaj bastonegoj kaj ĝin metis sur la baraĵon dank' al kolektiva fortostreĉo. En tiu vintro, oni jam konstruis 70-80 ŝtonbaraĵojn en la tri ravinoj sub la Ĉevalfaliga Montdorso. En la sekvanta printempo, oni ellaboris parcelon sur la ŝtonoza deklivo de Hiĝuang kun areo de tri dekonoj da muo, kiun oni nomis "kampo de malcedemo". Al tiu kampo, oni aldonis tertavolon du futojn dikan, disŝutis 400 korbojn da humo kaj ŝanĝis ĝin en irigaciatan

kampon fosinte irigacian kanaleton. En aŭtuno, oni rikoltis pli ol 200 ĝinojn da maizo el tiu kampo kaj poste semis en ĝi vintran tritikon. Somere de la sekvanta jaro oni rikoltis el ĝi 110 ĝinojn da tritiko.

Tiu viva fakto donis konvinkon, ke oni certe povas reformi la montregionon kaj pli altigi la produkton dank' al la penso de Maŭ Zedong kaj per la saĝo kaj fortoj de la kolektivo. De tiam, ĉiam pli multiĝis la partoprenantoj de tiu laboro kaj ankaŭ la skalo de la montreformo ĉiam pli grandiĝis.

Kvankam zigzaga kaj malebena estis la vojo, tamen kuraĝigate de la heroaĵoj de la Ruĝa Armeo dum la Longa Marŝo kaj la spirito de la Malsaĝa Avo, kiu translokigis montojn, ili jungis monttorentojn, fosis skvamajn fosojn sur la montoj, plantis arbojn, konstruis unu malsupre de alia baraĵojn, kaj subigis la sovaĝan monton per la sinteza metodo. Kaj poste, ili rekonstruis ĉiujn deklivajn kampojn en nivelajn ŝtupkampojn, kuniginte pli ol 3,000 parcelojn en 1,600.

### NEPRE KONDUKI RIVERAKVON SUR MONTON

Prezidanto Maŭ montris: "Akvoutiligo estas la aorto de agrikulturo." Agante laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ, la Nangunlonggoŭ-anoj intense sin okupis pri akvoutiliga konstruo samtempe kun montreformado. En energia akvoutiliga konstruado ili foŝis surmonte spiralajn kanaletojn por irigacii la ŝtupkampojn per alkondukita akvo.

En 1956, estis ellaborita plano fosi surmonte spiralan kanaleton kun longeco de du kilometroj, kiu devis trapasi rokmuron Serpento. Tiu rokmuro estis 70-80 futojn alta, ĉirkaŭ 100 futojn larĝa, kun glata surfaco negrimpebla por homoj. Antaŭ la Liberiĝo, kelkaj kulakoj en la vilaĝo plurfoje provis fosi irigacian kanaleton tra tiu loko, por alkonduki akvon kaj irigacii kampojn, sed malsukcesis. Kiam la informo ke la koopertivanoj decidis elhaki irigacian kanaleton tra la rokmuro Serpento venis en la orelojn de reakciaj kulakoj, ĉi tiuj dissemis onidiron, ke "dio loĝas sur la rokmuro kaj punos la profanantojn", por subfosi la entreprenon.

Laŭ instruo de Prezidanto Maŭ, la partia filio gvidis la amasojn konduki pinto-kontraŭpintan batalon kontraŭ la subfosado de la klasaj malamikoj. Li Kjuanŝoŭ diris en mitingo de la kooperativanoj: "El kiu familio ne mortis iu ano? Kiu el ili estis sufokita de dio aŭ spirito? Mia




patro mortis de kruela turmentado fare de bienuloj!” Kaj multaj aliaj malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj diris: “Ekzistas nek diablo nek dio. Estas Prezidanto Maŭ kaj la Komunista Partio, kiuj savis nin malriĉulojn!” Ili decidis forte bati la malamikojn per sia praktika agado.

Komenciĝis la akvoutiliga konstruado. Pro manko de mezuraj aparatoj por hakado de la rokmuro, la partia filio kunvokis “saĝulan kunvenon” de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, dum kiu oni proponis preni bovlon plenigitan de akvo kiel nivelmezurilon, kaj pendigi la hakantojn per ŝnuregoj, se ili ne povis stari sur la kruta alta ŝtonmuro, ke ili laboru en la aero. Peninga estis la laboro, sed la kooperativanoj laboris des pli entuziasme. Ĉiuj ĉe la konstruejo laŭdis la estron de la kvara produkta taĉmento Li Erbaŭ, dirante ke li estas “ferulo”, kiu ĉiam elektas por si pezan laboron. Estis danĝere ŝtonhakadi pendante de ŝnurego en la aero, sed li kaj la veterana

partiano Vang Ĝitaj konkure malsuprengritis de sur la rokmuro kaj pretigis unu min-truon post alia, svingante martelon pendante en la aero.

Sed kvin tagojn post eklaboro, kiam ili faris la unuan paŝon en dishako de la rokmuro, ili renkontis novan malfacilon. La tuta vilaĝo posedis nur 4 pintajn ŝtalstangojn por ŝtonborado, kiuj ĉiuj malakriĝis, kaj ankaŭ elĉerpiĝis la kelkcent ĝinojn da dinamito. Iuj proponis pruntepreni monon de la ŝtato, sed la plejmulto insistis agi laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ “**sin apogi sur la propraj fortoj**”. Ili diris: “Tiel granda estas Ĉinio kaj ĉiu vilaĝo nun estas en konstruado. Ni ne devas peti ĉion de la ŝtato, sed zorgi pri la tuta lando starante en Nangunlonggoŭ.” Kaj sekve malriĉkamparanoj-kooperativanoj Li Liangi, Vang Ĝitaj k. a. alportis bloveston, konstruis fornon kaj mem komencis fari kaj ripari ŝtonborilojn; kaj malriĉkamparanoj-kooperativanoj Jan Bingzi, Li Jinĝu k. a. sukcesis fari indiĝenan eksplodaĵon. Tiamaniere, la Nangunlonggoŭ-anoj elhakis fluejon tra la kruta rok-

*Per batalo kontraŭ la naturo, komunumanoj de Nangunlonggoŭ-brigado vastigas la areon de sia agraro por akiri abundan rikolton en agrikulturo.*



muro Serpento per pena borado kaj eksplodaĵo, kondukis akvon al ŝtupkampoj pli ol cent futojn altaj kaj ŝanĝis dekojn da muoj da seka tero de 3 produktaj grupoj en irigaciatajn kampojn. Kun tia persistemo, la Nangunlonggoŭ-anoj reformis montojn kaj enjungis akvojn dum la lastaj 12 jaroj, eĉ sen pruntepreno de unu sola cendo de la ŝtato. Ili konstruis sume 34 irigaciajn kanaletojn serpentumantajn sur montoj, kun la totala longeco de 21 kilometroj, kaj per tio transformis pli ol 80 procentojn de la tero de la tuta brigado en irigaciatajn kampojn. Dank' al ebligado de irigaciado, senĉesa bonigado de semoj kaj apliko de pli multe da mem preparita sterko, la produkta brigado de Nangunlonggoŭ impete altigis la pomuan produktkvanton de pli ol 300 ĝinoj en 1956 ĝis tiu de 1,041 ĝinoj en 1965. En la granda proletara kultura revolucio, plialtiĝis la klasa konscio kaj produkta entuziasmo de la vasta komunumanaro, kaj ĉi tiuj plialtiĝis la pomuan produktkvanton ĝis 1,230 ĝinoj en 1967. Depost kiam tiu brigado impete fariĝis produktanto de superflua greno en 1958, ĝi jam vendis al la ŝtato pli ol tricent mil ĝinojn da greno.

### FORIGI LA BAROJN SUR LA SOCIALISMA VOJO

En la lastaj 12 jaroj, la Nangunlonggoŭ-anoj ĉiam marŝis grandpaŝe sur la vojo de kooperigo kaj komunumigo montrita de Prezidanto Maŭ. La venko akirita de ili en pena konstruado de socialisma nova montregiono ja estas frukto de ilia senĉesa batalo kontraŭ la burĝara reakcia linio de la ĉina Ĥruŝĉov kaj konkero de la batalpozicio en la kamparo, kun la penso de Maŭ Zedong kiel batalilo.

Ĉirkaŭ la jaro 1961, nia lando renkontis portempan malfacilon en ekonomio. Tiam la heroaj Nangunlonggoŭ-anoj persistis en montreformo kaj jungado de inundakvo, disvolvo kaj firmigo de la kolektiva ekonomio, sin apogante sur la giganta kolektiva forto de la popola komunumo. Sed tiam la ĉina Ĥruŝĉov kaj liaj agentoj en la Partia Komitato de Pingŝan-gubernio sendis nigran laborgrupon al Nangunlonggoŭ, por “doni al malsupra organizo la proprion de la komunumo pri montoj kaj arboj”, “plivastigo de tero por privata uzo”, “disdoni la komunajn ŝarĝbrutojn al diversaj familioj por bredado” kaj efektiviĝi la t. n. “fikson de produkta kvoto bazita sur grupa mastrumado, fiksan mastrumadon de produkta grupeto pri la parceloj kaj fiksan prizorgon de plantaĵoj fare de ĉiu familio”. Ili dronigis Nangunlonggoŭ en miasmon por certa tempo. Sed la malriĉkamparanoj

kaj malsuperaj mezkamparanoj de Nangunlonggoŭ, armitaj per la penso de Maŭ Zedong, travidis ilian intrigon. Ili diris: “Prezidanto Maŭ gvidas nin marŝi antaŭen laŭ la larĝa vojo de kooperigo kaj komunumigo. Tamen la laborgrupo entreprenas dividon de la komuna tero por individua mastrumado, celante retropuŝi la socialisman agrikulturon, restaŭri kapitalismon kaj devigi nin vivi refoje en mizero kaj sufero. Ni neniel aŭskultos ĝian senencaĵon.” Kaj sekve la komunumanoj solide rebatis la klasajn malamikojn per sia konkreta agado en firmigo de la kolektiva ekonomio.

Post fiasko de sia ruzo, la klasaj malamikoj tamen elpensis novan artifikon. Ili alprenis la rimedon “korupti kaj enŝteliĝi” kaj provis enŝovi siajn fidelajn lakeojn en la filiojn de la Partio kaj la Komunisma Junulara Ligo sub preteksto kulturidaurigantojn de la revolucio por kapti okazon depreni la regpotencon. Samtempe ili dissemis kalumniojn, ke Nangunlonggoŭ estas “falsa ruĝa standardo”, kaj trifoje alsendis termezuran grupon por kontroli la terareon sub preteksto de “kontrolo pri la efektiva pomua produktkvanto”. En 1964, pli ol 20 personoj de termezura grupo formita de la provinca, subprovinca kaj gubernia instancoj mezuradis pli ol 40 tagojn kaj mutiĝis antaŭ la fera fakto, kaj pretiginte novan kampliston kaj devigite subskribinte ĝin sub supervido de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, forlasis la vilaĝon en griza humoro.

Dum la senprecedenca granda proletara kultura revolucio, la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de Nangunlonggoŭ trapasis refojan rigoran provadon de batalo inter la du klasoj, du vojoj kaj du linioj. Dum la tempo, kiam la batalo estis tre komplika kaj intensa, la vasta komunumanaro de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de la brigado firme tenas en la koro la instruon de Prezidanto Maŭ: **“La rajtoj akiritaj de la popolo neniel devas esti facile perditaj, sed nepre devas esti defendataj per batalo.”** Meminiciate sin organizinte kaj firme unuiĝinte ĉirkaŭ la partia filio, kiu senŝanceliĝe defendas la revolucion linion de Prezidanto Maŭ, ili frakasis la frenezan atakon de la malamikoj kaj defendis la revolucion linion de Prezidanto Maŭ.

En la granda kultura revolucio, la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de Nangunlonggoŭ hardiĝis en pli firmajn batalantojn. Kun ankoraŭ pli firma volo ili iras la socialisman vojon strikte sekvante la paŝojn de Prezidanto Maŭ.

# Nova Entreprenado en Montara Arbaro

EN aŭgusto 1965, respondante al la alvoko de Prezidanto Maŭ kaj la Centra Komitato de la Partio pri ekspluato de montregionoj kaj konstruo de landlimaj regionoj, pli ol 100 instruitaj gejunuloj de nia Helonggiang-provinco alvenis al la areo de Huaŝupajzi en Hing-an-montaro. En 3 jaroj, sub la brila lumigo de la ĉiamvenka penso de Maŭ Zedong kaj post peniga klopodo, ni ekspluatit virgan teron en kultureblajn kampojn, dehakis arbojn kaj flegis forstojn. Nova montvilaĝo estas konstruita en la senhoma montara arbaro.

## NE TIMI PENIGON POR LA REVOLUCIO

Antaŭ 3 jaroj, kiam ni ĉi tien alvenis, malproksime ondis montoj kaj proksime, krom solaj tri terdomoj, ĉie troviĝis ĥaosoj da ŝtonoj kaj sovaĝaj herboj. Vidinte tion, multaj kamaradoj opiniis ke ĉi tie ja konstruado estas vere necesa, sed aliaj ankaŭ sentis surprizon kaj mirigite demandis: “Ĉu ni ennestiĝos ĉi tie?”

Jes, estas ĝuste ĉi tie, kie ni komencos la batalon. Nokte pluvis. La domo estis plena de humideco kaj malvarmeco. Sidante ĉirkaŭ olelampoj, ni komencis studi la trezorajn verkojn de Prezidanto Maŭ — la “tri popularaj artikoloj” kaj *La Direkto de la Junulara Movado*. Kvazaŭ brila lampo, lia intima instruo lumigas nian koron. Ni nepre batalos tie ĉi por ekspluati la montregionon dum la tuta vivo!

Ni, gejunuloj, kreskis en la nova socio kaj spertis nek penadon nek suferon. Ĵus alveninte ĉi tiun izolan valon, ni ofte ŝanceliĝis en la penso pro nekutimiĝo al la nova cirkonstancaro en vivo kaj laboro. Ĉiufoje kiam leviĝis tia neproletara penso en nia kapo, ni ĉiam kritikis ĝin, prenante la penson de Maŭ Zedong kiel armilon.

Por aldoni la lecionon pri klasa batalo, ni invitis maljunajn laboristojn kaj malriĉkamparanojn rakonti al ni ilian familian historion, vizitis redutojn, tunelojn pasinte lasitajn de la japana

imperiismo, kaj fosajon kien la lasta enĵetis niajn samlandanojn post la amasbuĉado. Tio iom-post-iome konigis al ni la klasan kaj nacian malammon kaj vekis en ni fortan klasamon al Prezidanto Maŭ kaj la Kompartio. Iuj diris: “Por frakasi la malnovan socion la revoluciaj martiroj spertis sennombrajn malfacilojn kaj oferis sian vivon. Ĉu gravas, ke hodiaŭ ni suferas iom da malfacilo?” Ju pli ŝanĝiĝas nia penso kaj sentimento, des pli ni amas ĉiun arbon kaj ĉiun herbon de tiu ĉi loko kaj ne plu sentas “dezertecon”.

## LA FONTO DE SAĜO KAJ FORTO

Post la alveno, la unua batalo por ni estis ordigi teron kaj fari forstigadon. En la komenco, ni ne atingis la difinitan normon eĉ per la tuta forto. Tenante en la koro la instruon de Prezidanto Maŭ pri **ekskluziva** kaj **senrezerva** servo al la popolo kaj la altajn figurojn de Ĝang Side, Bethune kaj la Malsaĝa Avo, la kamaradoj konsciis ke la kaŭzo kuŝas ne en la tekniko sed en la penso. Kaj post laboro, ni organizite studis verkojn de Prezidanto Maŭ kaj decidis venki la malfacilojn en fizika laboro. Kelkajn tagojn poste, sur la manplatoj estiĝis sangvezikoj, sed neniu plendis aŭ lasis la laboron. Iuj diris: “Ju pli da vezikoj, des pli ni devas persisti. Nur tiamaniere ni povos forĝi la manojn tiaj, kiajn havas laborantaj polanoj, kaj la volon ŝtale firma.”

Dum la printempa semado de 1966, en malaltaj lokoj stagnis akvo, la semado per traktoroj estis tre malfacila. Por semado en ĝusta tempo, ni ligis traktorojn per ŝnuroj kaj tiris ilin kunagante kun la traktoristoj, kiam ili trapasis koton. Tiel ni triumfe plenumis la taskon.

La vintro estas la plej konvena sezono por arbetflegado kaj arbohakado. Ĉi tie estas krutaj montoj kun densaj arbaroj, pro tio sledoj ne povas eniri. Spite de frosto 40 C. sub la nulo, ni surgrimpis la montojn por dehaki arbojn kaj transporti trunkojn. La vangoj gratvundiĝis de branĉoj

kaj la manoj kreviĝis pro frosto. Ĉio ĉi tio estis rigardata kiel bagatelaĵo. Kamaradoj diris: “La ligno estas materialo bezonata por konstruado. Dehaki pli da ligno signifas pli da kontribuo al la socialisma konstruado de la patrio. Eĉ pli grandan malfacilon ni devas konkeri.” Malgraŭ frosta vento, multaj kamaradinoj demetis sian kaptukon kaj per ĝi ligi stangetojn por pli multe ŝultrigi. Ankaŭ ili laboris sencede.

En la trijara laborado, ni elkulturis niajn proprajn agrikulturajn teknikistojn, ekspluatis pli ol 1,100 muojn da virga tero kaj akiris kompare bonan rikolton en du sinsekvaj jaroj. Per tio ni efektivigis memprovizon per la produktitaj grenoj kaj legomoj. Ni ankaŭ plenumis la taskon dehaki pli ol 4,000 kubmetrojn da ligno, plantis 290,000 diversspecajn arbojn, flegis arbetojn, kolektis arbosemojn, starigis arbidajn bedojn kaj rekonstruis ŝoseon. Krome ni konstruis domojn kun plankareo de 280 kvadrataj metroj. La sovaĝejo, kie kreskis herboj kaj hurlis lupoj, nun jam fariĝis prospera loko kun flirtantaj ruĝaj flagoj, bonordaj domoj, gajaj homoj, fortikaj ĉevaloj kaj abunda rikolto de grenoj. Nun ni posedas plugbovojn, ĉevalĉarojn, aŭtojn, traktorojn kaj senŝeligilojn, elektrolampojn kaj elektrosegilojn. La agrikulturejo estas unuapaŝe formita.


## NI NEPRE AGOS LAŬ LA INSTRUKCIOJ DE PREZIDANTO MAŬ

Dum du jaroj de la granda proletara kultura revolucio ni spertis ŝtormon de revolucia batalo kaj eltenis rigorajn provon kaj hardon. Tio faris nian agrikulturejon “Liaŭjuan” en pli fortikan batalekolektivon.

En aŭgusto 1966, kiam la ĝojiga informo pri la akcepto al ruĝgvardioj fare de Prezidanto Maŭ atingis nian agrikulturejon, ni pensis, ke estos plej feliĉe vidi Prezidanton Maŭ, se ni havus flugilojn por tuj flugi al Pekino. Tial ekbolis diskuto ĉu iri al Pekino aŭ ne, ĉu fari vastan interkontaktigon por interŝanĝi revoluciajn spertojn aŭ ne. “Iri al Pekino por vidi Prezidanton Maŭ estas nia komuna deziro, sed kiel do konduki la revolucian kaj produkton en nia agrikulturejo?” Post diskutado ĉiuj venis al unuanima konkludo: peti instrukcion el verkoj de Prezidanto Maŭ. Ni do ripetade studis la instrukciojn de Prezidanto Maŭ kaj la Centra Komitato de la Partio pri revoluciado en la propra loko kaj pri teno de revolucio kaj stimulo de produktado. Trovinte solvon en ili, ni ĉiuj decideme esprimis: Ni nepre agos laŭ la instrukcio de Prezidanto Maŭ! Revolucii sur la monto ja signifas defendi lian revolucian linion.

La triumfo de la granda proletara kultura revolucio des pli vekis en ni grandan energion. Dum arbohakado en la lastaj vintro kaj printempo, kunportante revoluciajn trezorajn verkojn de Prezidanto Maŭ ni batalis por ĉiu sekundo kaj minuto en la vasta maro de arbaro, spite de neĝvento kaj frosto. Ekmemorante instruon de Prezidanto Maŭ, kamaradoj sentis varmon en sia koro kaj forgesis froston kaj laciĝon. Ni altigis la laborefikon je pli ol 100% kompare kun tiu antaŭ du jaroj, kaj antaŭdate plenumis la arbohakan taskon.

Dank’ al la penso de Maŭ Zedong, ni venkis tiel la sovaĝajn montojn kiel la egoismon en la cerbo. En la praktika batalo ni komprenis ke la revolucio estas afero nefacila, sed en ĝi oni povas senti feliĉon. Kamaradoj diris: “Kiam en la koro leviĝas la ruĝa suno, oni ne perdas la orienton en la montara arbaro.” Ni firme decidis hardi kaj remuldi nin en la revolucia batalo kaj ĵuras esti fidindaj daŭrigantoj por la revolucia afero de la proletaro.



# Angulo de Silkraŭpa Regiono

**S**UR la riĉa Hanggiahu-ebenejo, ne nur abunde produktiĝas rizo kaj fiŝoj de sensala akvo, sed ankaŭ estas kulturado de morusarboj kaj silkraŭpoj ĉe multaj popolkomunumoj.

*Ore la rizkampoj vaste sin etendas,  
Arĝentbrile fiŝoj en la lagoj svarmas,  
Kaj sur morusarboj perlaj silkkokonoj en gra-  
poloj pendas.*

Tiu popolkanto bildigas la prosperan aspekton de la nuna Hanggiahu-ebenejo. Ĉiam, post la rikolto de nova rizo aŭ kiam silkraŭpoj jam ŝpinis kokonojn, la boatoj de komunumanoj estas remataj unu post alia por transporti la orflavan grenon kaj perle blankajn kokonojn al la ŝtataj aĉetejoj. . . .

La regiono Hanggiahu estas unu el la gravaj produktejoj de silkraŭpoj kaj morusarboj en nia lando. La produktado de silko havas tre longan historion tie. Kaj post la Liberiĝo, inter la elterigitaj kulturaj objektoj apud la gubernia urbo de Vuhing, oni ja trovis postrestintan fragmenton de silka teksaĵo el neolito. Sed, dum la longa periodo antaŭ la Liberiĝo, pro la kruela ekspluatado de la bienula klaso, la kulturistoj de silkraŭpoj posedis nur tre primitivan teknikon kaj vivis nepriskribeble mizeran vivon. Post la Liberiĝo, precipe post la starigo de popolkomunumoj, tieaj vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj disvastigis kulturan areon de morusarboj sub la direkto de la principo de Prezidanto Maŭ: **“Disvolvu kompleksan entreprenadon kun greno kiel ĉefĉenero.”** Ili flegas la moruskampojn en tre bona ordo; la branĉoj kaj folioj de morusarboj estas plenaj de vivforto, formante oleo verdajn densaĵojn. Ili jam nove konstruis kulturejojn por silkraŭpoj el pli ol 34,000 ĉambroj, kaj disvolvis la kulturtempon de silkraŭpoj de nur unu sezono en printempo ĝis tri sezonoj, inkluzive someron kaj aŭtunon. Krome ili provizis sin ankaŭ per modernaj ekipaĵoj por kulturo de silkraŭpoj, disvastigis novan kulturteknikon kaj bonajn speciojn de silkraŭpo, tiel ke la kulturado de silkraŭpoj disvolviĝas en

alta rapideco. Lasttempe, ni vizitis silkraŭpan kulturejon de iu produkta brigado.

Same kiel la loĝejoj de tieaj kamparanoj, la kulturejo estas granda, hela kaj pura, en ĉiuj ĝiaj ĉambroj troviĝas elektraj lampoj kaj estas ĉiam tenataj en difinita temperaturo kaj humideco. Vicoj da silkraŭpaj stabloj staras aparte bonorde. Ĉiu el ili portas sur si 6-7 raŭptenuojn unu super alia, kaj tiel la silkraŭpoj loĝas en sia 6-7-etaĝa domego, kiel ŝerce diris iu kulturisto.

Tre sibirite vivas la silkraŭpoj. Estas diro inter la silkraŭpaj kulturistoj, ke “la silkraŭpo estas kvazaŭ bebo; timas ĝi kaj varmon kaj malvarmon.” De la elkoviĝo de silkraŭpo ĝis ĝia kokonŝpinado daŭras nur pli ol unu monato. Por ke la silkraŭpetoj bone kresku, la kulturistoj devas bone zorgi por teni konvenan humidecon kaj temperaturon en la kulturejo, krom kolekti kaj provizi morusfoliojn, plivastigi interspacojn, purigi tenuojn, disgrupigi silkraŭpojn k. a. Ja estas tre okupataj la komunumaninoj laborantaj en la silkraŭpaj ĉambroj.

*Komunumanoj sin okupas per vigla kolektado de morusfolioj.*



La elektriĝo kaj mekanikigo de la popolkomunumoj provizas favorajn kondiĉojn por la disvolviĝo de la produkto de silko. La moruskampoj nun estas ĝustatempe irigaciataj, multaj kulturejoj havas elektrajn lampojn, kaj parto de ili jam uzas elektron por reguligi la temperaturon en la ĉambroj. Ili ankaŭ ekuzis membranojn el polietilena plasto en la kulturado de silkraŭpo kaj ricevis bonan rezulton.

La senprecedenca, granda proletara kultura revolucio multe akcelis la ideologian revoluciigon de homoj. La kreiva studo kaj kreiva apliko de la penso de Maŭ Zedong fare de la vastaj amasoj de malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkampanoj jam atingis novan nivelon. La kulturistoj de silkraŭpoj elmetis batalan sloganon: "Al ĉiu kokono dediĉu ni tutan la koron kaj ĉiujn kokonojn al

revolucia afero". Ili ellitiĝas ĉiam antaŭ tagiĝo por rapide kolekti morusfoliojn. En iuj komunumoj, pro oftaj pluvetoj, la komunumanoj, en la revolucia spirito de "ekstrema" respondemo al laboro kaj sentimo al laciĝo, viŝas la foliojn unu post alia por ke la silkraŭpoj ne malsaniĝu pro manĝo de morusfolioj kun akvo, kaj tiel garantias sanan kreskadon de la silkraŭpoj.

La printempaj kokonoj de la nuna jaro sur Hanggiahuebenejo estis kaj grandaj kaj multaj, kaj la produktkvanto, ĉu pounua ĉu totala, estas plej alta post la Liberiĝo. La fervoro de la vasta silkraŭpa kulturistaro por disvolvi la silkan produktadon pli altiĝas, sub la lumigo de la brila penso de Maŭ Zedong kaj la stimulo de la granda proletara kultura revolucio.

## Nova Fizionomio en Hanggin-a Posta Flago

**E**N la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio de Ĉinio estas la Hanggin-a Posta Flago\*. Dum la pasintjara vintro kaj ĉi-jara printempo la kursoj de la penso de Maŭ Zedong pompe prosperis ĉi tie kvazaŭ printempaj floroj. Dank' al la lernado en tiuj kursoj, la spirita fizionomio de la revoluciaj kadroj kaj komunumanoj forte ŝanĝiĝis, kaj nova atmosfero regas ĉie tra la tuta flago. Oni ĉie povas aŭdi laŭdojn pri la kursoj de la penso de Maŭ Zedong....

### KURAGE PRENI SUR SIN PEZAN TASKON DE REVOLUCIO

La kurso de la penso de Maŭ Zedong estas la plej taŭga batalejo por efektiviĝi la plej novajn instrukciojn de Prezidanto Maŭ. Studinte ĉe la kurso la plej novan instrukcion de Prezidanto Maŭ pri korekta traktado al la kadroj, la kadroj, malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkampanoj tre emociiĝis. Parto da kadroj, kiuj antaŭe intencis forlasi siajn oficojn, kortuŝiĝis ĝis larmo, neniel povis sin trankviligi, kaj decidis demetisian ŝarĝon de egoismo kaj daŭre porti sur si la taskon de revolucio.

Unu el tiuj ekzemploj donis Vang Hoŭven, la sekretario de la partia filio de Lianfeng-brigado,

Hongki-komunumo. En oktobro de la pasinta jaro li partoprenis la kurson de la penso de Maŭ Zedong funkciigitan de la revolucia komitato de la flago. En la komenco li ne volis malkaŝisian intencon eksiĝi de sia ofico. Kun la senĉesa profundigo de la studo, la batalo inter la du vojoj en la kamparo multe pli klariĝis. Tio ege tuŝis lian animon. Li pensis, ke kvankam li faris certajn kontribuojn dum multaj jaroj de sia kadra laboro, tamen ili montriĝas tro malsufiĉaj por plenumi la postulojn de la Partio kaj la amaso. En la movado de la granda proletara kultura revolucio la amaso faris al li akrajn kritikojn, kiujn li dume ne povis konsenti, kaj pro tio li sentis sin maljuste traktata kaj ekhavis la ideon eksiĝi. Kiam tre intensiĝis la batalo en lia cerbo, multaj malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkampanoj venis por korverŝe paroli kun li. Iutage Liu Liu vizitis lin, sincere dirante: "Ni kune studu la artikolon *Servu al la Popolo*." Kiam Vang Hoŭven finlegis la artikolon, Liu Liu daŭrigis: "Prezidanto Maŭ instruis, ke ni devas servi al la popolo **ekskluzive kaj senrezerve**. Vi servas al la popolo nur kelkajn jarojn, kaj ni ankoraŭ elektos vin kiel kadron. Ĉu povas esti, ke vi ne

\*Flago estas administracia parto de Interna Mongolio.

faros novajn kontribuojn?" Ju pli li pripensis, des pli li sentis, ke li ne indas la konfidon de la klasaj fratoj kaj de Prezidanto Maŭ. Kiam li profundigis en meditado, animskua sceno de klasbatalo denove aperis antaŭ liaj okuloj: Dum la amaso donis kritikojn al Liu Ĝenjang la estro de la tria produktgrupo de Lianfeng-brigado, kelkaj fiuloj, profitante la okazon, faris subfosadon kaj donis baton al tiu bona kadro por konfuzi la situacion. En tiu kriza momento Hu Venlong, maljuna malriĉkampano, sentime elpaŝis kaj rigore refutis tiujn malbonulojn dirante: "Prezidanto Maŭ diris, ke **'Juĝante kadron, ni devas konsideri lian agadon ne nur en mallonga periodo aŭ en unu afero, sed ankaŭ lian tutan vivon kaj lian tutan laboron.'** Estas tiuj kadroj, kiuj gvidis nin iri de la interhelpa grupo kaj agrikultura kooperativo al la komunumo. Mi klare memoras, kion ili diris kaj faris dum la pasintaj multaj jaroj, kaj mi bone scias, kiuj estas bonaj, kiuj malbonaj. Liu Ĝenjang neniam faris grandajn erarojn. Rilate al la historio de lia familio mi bone konas eĉ tion, ke lia avo iam almozpetis kaj laboris kiel jardungito." Interkonsiliginte kun malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj, Hu Venlong repuŝis kune kun ili la kontraŭflon kaj decideme subtenis Liu Ĝenjang daŭre preni la oficon de grupestro.

Kiam Vang Hoŭven pripensis la senlancan instruon de Prezidanto Maŭ kaj ankaŭ la fervoran subtenon de la malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj, varma fluo trakuris lian tutan korpon. En la kurso de la penso de Maŭ Zedong kaj inter la amaso, li severe batalis kontraŭ sia egoisma penso ne plu voli labori kiel kadro. Li diris: "Mi agos laŭ la instruoj de Prezidanto Maŭ kaj bone faros kion asignas al mi la malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj."

Dank' al la studado en la kurso la kamparaj kadroj plialtigis sian konscion pri la batalo inter la du klasoj, du vojoj kaj du linioj. Heroece ili diris: "Kiu tenos la regpotencon de la proletaro kaj praktikos la principojn kaj politikojn de la Partio, se la malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj ne prenos la oficon de kadroj? Ni estas komunistoj edukitaj de Prezidanto Maŭ, ni devas elpaŝi por ŝultrigi la ŝarĝon de la revolucio.

### LA DIREKTO KLARIĜAS DANK' AL BATALO KONTRAŬ EGOISMO KAJ KRITIKO PRI REVIZIISMO

La vasta starigo de la kursoj de la penso de Maŭ Zedong antaŭenpuŝis la revolucion amasan kritikon en la kamparo.

Parolante pri la ĉina Ĥruŝĉov, ĉiu en la vasta kamparo de Hanggin-a Posta Flago, ĉu maljunulo, ĉu infano, scias, ke li estas la morta malamiko de la laboranta popolo. Sur muro apud la vojo oni povas vidi tian karikaturon, ke iu trinkas vinon kaj manĝas viandon kune kun bienuo, kulako, kontraŭrevoluciulo, fiulo kaj dekstrulo sidante sur la sama benko kun ili. Per tio la malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj faras kritikon kontraŭ la "teorio pri la estingigo de klasbatalo" de la ĉina Ĥruŝĉov... La vastaj amasoj de malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj bolas de kolero kaj akuzas kun indigno la ĉinan Ĥruŝĉov kaj liajn agentojn en Interna Mongolio kaj la Hanggin-a Posta Flago per vortoj kaj plumo.

Aŭdinte en la kurso senhontan absurdaĵon de la ĉina Ĥruŝĉov pri la restarigo de kapitalismo, maljuna malriĉkampano Liu Jingcaj grincigis siajn dentojn pro indigno. Tio vekis ĉe li novan kaj malnovan malamon. En la aĝo de dek ses jaroj li migris de Gansu al Hetaŭ pro natura katastrofo. La ses membroj de lia familio ĉiuj almozpetis, kaj tri el ili mortis de malsato en kelkaj tagoj. Li paŝtis por bienulo, kaj perdis tri ŝafojn iutage. La bienulo rajdis sur sia ĉevalo, kun pafilo sur la dorso kaj vipo en la mano. Li ordonis, ke Liu Jingcaj iru antaŭe kaj konduku lin por serĉi la perditajn ŝafojn. Ĉe ĉiu paŝo la bienulo vipis lin de malantaŭe. Lia dorso disŝiriĝis kaj la sango tramalsekigis lian veston. Kun indigno li diris: "En la malluma malnova socio la malriĉuloj havis nenion krom sufero. Estas la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, kiu gvidis nin por leviĝi el sub jugo. La malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj profunde komprenas ke **'nur socialismo povas savi Ĉinion'**. Sed la Ĥruŝĉov de Ĉinio volis praktiki 'kvar liberojn' kaj 'tri pligojn kaj unu fikson'. Tio estas atako de kapitalismo kontraŭ socialismo, kaj tio celas detruiri la kolektivan ekonomion de la popola komunumo kaj ŝanĝi la koloron de la nova Ĉinio. Ni, malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj, ĵuras per nia vivo, ke ni iros la vojon montritan de Prezidanto Maŭ kaj decide faligos la ĉinan Ĥruŝĉov."

La rememoro pri la pasinta sufero kaj la ripenso pri la nuna feliĉo instigis la vastajn amasojn de komunumanoj memkonscie batali kontraŭ egoismo. Ili diris: "Egoismo estas la ĝenerala radiko de ĉia malbono. Se egoismo ne estas faligita, la regpotenco ne estos defendebla." "Egoismo estas la radiko de reviziismo kaj la vosto de

kapitalismo. Ni devas eltiri kaj detranĉi ĝin per ni mem.” “Disvolvo de kolektivismo kaj forigo de egoismo estas la ĝusta vojo por la malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj.” En la kurso ĉiuj konkure malkaŝis, kontraŭbatalis kaj abomenindigis sian egoismon.

### MALRIĈKAMPARANOJ KAJ MALSUPERAJ MEZKAMPARANOJ PLEJ AŬSKULTAS INSTRUOJN DE PREZIDANTO MAŬ

Antaŭ la fino de novembro 1967 falis granda neĝo ne vidita dum la lastaj kelkdek jaroj en la Hanggin-a Posta Flago. Pli ol 100 tunoj da greno, kiu apartenis al la tria produktgrupo de Guangming-brigado, Hongki-komunumo, estis ankoraŭ ne draŝitaj sed kovritaj de neĝo sur la draŝejo. Ĝuste tiam Jang Jindong, maljuna malriĉkampano revenis de la kurso. Memorante la instruon de Prezidanto Maŭ **tenu la revolucion kaj stimulu la produkton**, kaj instigate de alta klasa respondecemo de la malriĉkampano kaj malsupera mezkampano, li iris al la vic-grupestro kaj postulis, ke tiu kunvoku la komunumanojn por interkonsiliĝi. Li diris al la lastaj: “Pli ol 100 tunoj da nia greno estas kovritaj de neĝo sur la draŝejo. La draŝado por ni estas vere malfacila en neĝa vetero. Sed la malfacilo neniom povas nin timigi. Putriĝo de la greno malutilos al la interesoj de la kolektivo kaj la ŝtato. Ni devas agi laŭ la instruo de Prezi-

*La revoluciaj laboristoj kaj oficistoj de la Presejo de la Hanggin-a Posta Flago, Interna Mongolio, produktas grandkvante verkojn de Prezidanto Maŭ.*



danto Maŭ **‘Faru firman decidon, timu nenian oferon kaj superu ĉiujn malfacilaĵojn por akiri venkon.’**” En varma diskuto, iuj diris, ke oni bezonos tridek tagojn por plenumi la draŝadon, aliaj diris, ke oni bezonos kvardek kvin tagojn por tio. Jang Jindong diris: “Ĉio dependas de la homa klopodo. Ni ĉiuj ekagu kune, kaj mi anoncas min la unua. Se ni nur aŭskultas la vortojn de Prezidanto Maŭ, ni povos konkeri la naturon.”

Antaŭ la tagiĝo de la sekvinta tago, maljunulo Jang Jindong ellitiĝis kaj spite la frostan venton vokis la komunumanojn al laboro. La vento mordis lin kvazaŭ pikiloj, kaj la spirblovo transformiĝis en glacierojn. Sed li havis viglan spiriton kaj bolantan sangon, ĉar en lia koro sidas la neniam subironta suno.

Tiel ekagis ĉiuj komunumanoj de tiu produktgrupo. Oni sekigis la grenon ĉie, ĉu sur la tegmento, ĉu sur la briklito de ĉiuj domoj. La greno estis findraŝita nur en ĉirkaŭ dek tagoj. La komunumanoj ricevis la grenon por sia propra konsumo, kaj la kolektivo havigis al si rezervan grenon, semojn kaj grenon por brutoj. Tiu ĉi produktgrupo vendis al la ŝtato 80 tunojn da greno. Tio superis pli-ol-unuoble la antaŭe fiksitajn vendkvanton de 35 tunoj.

En tiu batalo kontraŭ granda neĝo kaj malvarmego, la kadroj kaj komunumanoj neniam en sia

penso kaj ago forlasis la instruojn de Prezidanto Maŭ kaj la ekzemplojn en liaj “tri popularaj artikoloj”, kaj finfine ili venkis la malfeliĉaĵon kaŭzitan de la neĝo.

Ĉen Tianbaŭ, 68-jara malriĉkampano, prave diris: “Kie la ruĝa suno radias, tie regas ruĝiĝo, kaj kie oni aplikas la penson de Maŭ Zedong, tie oni rikoltas tujan rezulton. Kiam la malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj studis la verkojn de Prezidanto Maŭ, ili fariĝas homoj kun klara menso, akra vido kaj ŝtala volo.”





*Kamarado Men He*

# Men He, Bona Kadro de Prezidanto Maŭ

**Sankciite persone de la granda ĉefkomandanto Prezidanto Maŭ kaj lia intima batalamiko Vicprezidanto Lin, CK de la Ĉina Kompartio, la Komisiono pri Militaj Aferoj de CK de KPĈ kaj la Grupo de Kultura Revolucio de CK de KPĈ proklamis dekreton por titoli la sindonintan kamaradon Men He per la honora titolo “Bona Kadro Senlime Fidela al la Revolucia Linio de Prezidanto Maŭ”.**

**A**GLO super la stepo”, “verda pino sur la neĝmonto”.

Jen estas la plej belaj laŭdoj de la vasta revolucia popolo sur la altebenejo de Kinghaj pri la martiro Men He, bona kadro senlime fidela al la revolucia linio de Prezidanto Maŭ.

Antaŭ sia vivofero kamarado Men He estis bataliona politika vicdirektoro en iu trupo de la Kinghaj-a Militregiono de la Ĉina Popola Libe-

riga Armeo. Dum la dudek jaroj post sia partopreno en la revolucio, li ĉiam senŝanĝe fidelas al Prezidanto Maŭ, al la penso de Maŭ Zedong kaj la revolucia linio de Prezidanto Maŭ. Li estas avangarda batalanto gvidinta revoluciajn amasojn batali kontraŭ la klasaj malamikoj en la granda proletara kultura revolucio, estas brila modelo por la partiaj kadroj en daŭra revoluciado sub la proletara diktaturo kaj estas granda heroo, kiu bataladis dum sia tuta vivo por defendi la revolucion linion de Prezidanto Maŭ.



*Portretoj de Prezidanto Maŭ, kiujn kamarado Men He gluis sur la frontpaĝoj de siaj legitaj verkoj de Prezidanto Maŭ.*

## HEROE SINOFERI POR LA REVOLUCIO

En aŭtuno de 1967, la altebenejo de Kinghaj sin banis en sunbrilo. Dank' al la prilumo de la granda disradiana penso de Maŭ Zedong, la Revolucia Komitato de Kinghaj-provinco naskiĝis en la klasbatala uragano! Bonega estis la situacio.

Kune kun la vastaj amasoj de la proletaraj revoluciuloj de Bacang-agrikultivejo de Gujnan-gubernio, la Tibet-nacia Aŭtonoma Subprovinco de Hajnan, kamarado Men He, kiu tie plenumis la taskon de subtenado al la maldekstruloj, firme defendis la proletaran revolucion linion de Prezidanto Maŭ kaj la novnaskitan revolucion komitaton. Li organizis la proletarajn revoluciulojn kaj revolucionajn amasojn disvolvi ardan amasan revolucion kritikadon ĉe kamprandoj kaj en tendoj kontraŭ la ĉina Ĥruŝĉov kaj liaj agentoj en Kinghaj. Kaj samtempe, li firme respondis al la granda alvoko de Prezidanto Maŭ **“teni la revolucion kaj stimuli la produkton”**, kun firma decido batalis por akiri riĉan rikolton

kaj en revolucio kaj en produktado por doni pezan baton al la plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon, por ke la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ disradiu ankoraŭ pli fortan brilon.

La vetero sur la altebenejo estas tre kaprica, kaj hajlo povas ĝin ataki je ajna momento. Por prepariĝi kontraŭ tia atako de la naturo kaj protekti la plantaĵojn, Men He aktive provfaradis indiĝenajn raketojn por dispeli nubojn kaj preventi hajlon, en sinsekvaj tagoj kune kun la amasoj.

Matene de la 5-a de septembro, subite ŝanĝiĝis la vetero kaj ekpluvetis. Studinte la “tri popularajn artikolojn” dum la matena horo por studo de verkoj de Prezidanto Maŭ, Men He kuris al la raketfarejo kune kun revolucionaj popolaroj. Li estis baptita de batalfajroj en la militaj jaroj kaj bone sciis, ke munti indiĝenajn raketojn estas danĝera laboro. Tuj en la komenco li jam deprenis alies laborilon kaj mem faris la plej danĝeran laboron de plenigado per dinamito. Li diris: **“Tio ĉi estas danĝera, lasu ĝin al mi!”**

Ili pretigis raketojn unun post alia. Dum ĉiuj laboris absorbite, eksplodis dinamito ne-atendite. Heroo Men He, armita per la granda penso de Maŭ Zedong, ne hezitis antaŭ la danĝero, tuj sin ĵetis sur la eksplodaĵon.

La tero treme ektondris kaj fumkolono pafiĝis al la ĉielo! Flamo elŝprucis el sub lia korpo, kaj potencaj gasondoj lin ĵetis en la aeron....

Heroo Men He sekurigis 27 klasajn fratojn ĉe la loko per sia propra vivo. Per sia granda komunisma spirito de sinofero por aliaj li verkis superban triumfan kanton de la penso de Maŭ Zedong.

Oni sentas profunde en la koro, ke Men He ne mortis, Men He ne povas morti, kaj li ĉiam vivos en la koro de la popolo!

### AGADI STRIKTE LAŬ LA INSTRUKCIOJ DE PREZIDANTO MAŬ

*“Lernadu l’ instrukciojn de Prezidanto Maŭ  
pene, serioze;  
Propagandu l’ instrukciojn de Prezidanto Maŭ  
ĉiam senripoze;  
Plenumu l’ instrukciojn de Prezidanto Maŭ  
plene kaj komplete;  
Defendu l’ instrukciojn de Prezidanto Maŭ  
firme kaj sencede.”*

*Vortoj el taglibro de Men He: “Revolucii por la tuta vivo,  
studi la verkojn de Prezidanto Maŭ por la tuta vivo.”*

平一辈子革命，  
讀一辈子毛主席的书。

1965.1.9.

Men He plene efektivigis tiujn devizojn, kiujn li elmetis por direkti sian agadon.

Tuj post komenco de la granda proletara kultura revolucio, Men He jam avide studis la teorion, linion, orientilon, metodojn kaj politikojn de Prezidanto Maŭ pri revoluciado sub la proletara diktaturo kaj lernis liajn brilajn verkojn kia *Raporto pri Esplorado de la Kamparana Movado en Hunan*. La granda instruo de Prezidanto Maŭ kaj la praktikado en la liniaj bataloj post fondo de la Respubliko multe fortigis la ideon de Men He pri la batalo inter la du linioj. Li diris al siaj kamaradoj: “La radikala problemo de la granda kultura revolucio estas tiu de regpotenco. Ĉu ni lasos la plenmanon da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon forpreni la sigelilon de regpotenco el la manoj de la proletaro, ja estas la plej grava afero koncernanta tion ĉu Ĉinio ŝanĝos sian koloron, kaj tio estas la plej grava afero de la monda revolucio!”

La batala ordono de la granda instruanto Prezidanto Maŭ, ke **“la Popola Liberiga Armeo devas subteni la vastajn amasojn de la maldekstruloj”**, montris al Men He la direkton.


La proletaraj revoluciuloj de la organizo Aŭgusto-18-a de Bacang-agrikultivejo de Kinghaj-provinco bone memoros por ĉiam, ke heroo Men He venis grandpaŝe kun levita kapo en la agrikultivejon kaj donis nedubeblan subtenon al la proletaraj revoluciuloj de Aŭgusto-18-a, kiam la plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon de Kinghaj-provinco freneze reatakis la proletaron kaj la revoluciuloj de tiu organizo estis kruele subpremataj. Men He diris firmdecide: “Ni senŝanĝe subtenos la maldekstrulojn, nek tondro nek ŝtormo povos nin ŝanceli!” Firme premante la manon de Men He, batalantoj de Aŭgusto-18-a diris: “Ho, nia Menĉjo, eĉ ĉiele granda malfacilo neniel timigos nin, ĉar nin subtenas la armeo de Prezidanto Maŭ. Ni senŝanĝe iros la vojon montritan de Prezidanto Maŭ!”

La sesan de majo, 1967, kun propaganda taĉmento de la penso de Maŭ Zedong sub sia gvido kamarado Men He oficiale venis en la frekventitan Bacang-agrikultivejon por plenumi la laboron de subtenado al la maldekstruloj.

La unua afero, kiun kamarado Men He faris, estis helpi la revoluciajn amasojn starigi lernan sistemon de ĉiutaga de nenio haltigebla studado de verkoj de Prezidanto Maŭ kaj okazigo de kunsidoj por interŝanĝi sperton en studo kaj apliko de verkoj de Prezidanto Maŭ. Persone li ellaboris lernoplanon por revoluciaj amasaj organizoj, kompilis materialon por helpi la amasojn en studo pri la "tri popularaj artikoloj" kaj ilin instruis meti la studon pri verkoj de Prezidanto Maŭ kaj liaj instrukcioj sur la plej altan lokon. Rimarkinte, ke oni venadis al la proviza sekcio por preni objektojn dum la horo por studo de verkoj de Prezidanto Maŭ, li tuj diris al kamaradoj de la sekcio: "Se oni venos al vi por ion aranĝi, vi povas peti lin unue partopreni vian ĉiutagan studon kaj fari la laboron post tio."

Kvankam Bacang-agrikultivejo estas je mil kaj dekmil montoj kaj riveroj malproksime de Pekino, tamen la koro de Men He ĉiam estis ĉe Prezidanto Maŭ. La komunikado sur la stepo estis nefacila, kaj oni ne povis ĝustatempe ricevi la ĵurnalon. Je malfrua horo en ĉiu nokto, kiam ĉio silentiĝis, Men He ŝaltis la radioricevilon kaj notis vorton post vorto la instrukciojn de Prezidanto Maŭ por rapide ilin propagandi kaj firme plenumi, ĉe ĉiu paŝo sekvante Prezidanton Maŭ.

*Sur sia pistolujo Men He skribis: "Ĉiam revolucii sekvante Prezidanton Maŭ, la mondo tute ruĝiĝos sekvante Prezidanton Maŭ." "Firme subteni la revoluciajn maldekstrulojn."*



Je la 18-a de aŭgusto, kiam Men He revenis al la agrikultivejo post kunvenado en la bataliono, jam estis profunda nokto. Li ŝaltis la radioricevilon kaj aŭdinte, ke Prezidanto Maŭ elmetis la grandan alvokon "subteni la armeon, zorgi la popolon", li neniel povis endormiĝi. Multaj arme-subtenaj kaj popol-zorgaj aktivadoj en la pasinteco svarmiĝis en lian memoron. Li pensis, ke ĉiu el la pasintaj revoluciaj militoj gvidataj de Prezidanto Maŭ akiris grandan venkon senescepte dank' al subteno de la popolamasoj, dank' al la solidareco inter la armeo kaj la popolo. La granda proletara kultura revolucio estas granda politika revolucio multe pli profunda, do estas des pli necese por ĝi disvolvi "popolan militon" kaj plifortigi la solidarecon inter la armeo kaj la popolo. Per sia sango kaj vivo Men He plenumis la grandan alvokon de Prezidanto Maŭ pri subteno al la armeo, zorgo al la popolo, kaj skribis novan kortuŝan paĝon pri subteno al la maldekstruloj kaj zorgo pri la popolo.

### BONE GVATI, GARDSTARI KAJ BATALI POR DEFENDI LA REVOLUCIAN LINION DE PREZIDANTO MAŬ

Dum la 18 jaroj post fondiĝo de la Respubliko, Men He firme tenis en la koro la grandajn instruojn de Prezidanto Maŭ, ke "post kiam la malamikoj kun armiloj estos ekstermitaj, restos ankoraŭ malamikoj sen armiloj", "kaj sub nenia cirkonstanco ni devas malstreĉi nian singardemon", li ĉiam fikse observadis la movdirekton de la klas-

batalo. Li diris: "Ni ĉiam bone gvatu, gardstaru kaj batalu por la revolucia linio de Prezidanto Maŭ!"

En 1957, la dekstruloj de la burĝaro lanĉis frenezan atakon kontraŭ la proletara diktaturo, profitante la ŝancon de stilĝustigo de nia partio. Men He ne povis subpremi la flaman indignon en sia koro kaj tuj aktive sin ĵetis en la batalon. Iun tagon, leginte en ĵurnalo kriaĉon de dekstruloj, ke ili volas "teni la regpotencon alterne" kun la Komunista Partio, li



*Fej ŝongking (la parolanta), batalamiko de Men He, parolas al la batalantoj pri la glora faro de Men He en firma bojkotado kontraŭ la burĝara milita linio praktikita de Luo ŝujking.*

tiel indigniĝis, ke li firme kunpremis siajn dentojn. Li tuj kolektis la batalantojn de sia plotono kaj kondukis la trupon sur la Tianginan Aerodromon, kie ili tiam deĵoris, kaj indigne akuzis la damnindajn krimagojn de la kuomintangaj reakciuloj per la sango- kaj larmo-plenaj historioj de siaj gepatroj, geavoj kaj gepraavoj, vizaĝe al la reduto postlasita de la kuomintangaj banditoj dum ilia panika retiriĝo. Li diris firme: "Se la Komunista Partio ne tenas la regpotencon, do tenas Kuomintang, neniam povos esti alterna tenado de regpotenco! Kiu aŭdacas lukti kun la Komunista Partio por depreni la ŝtatpotencon, tiun la pafiloj en niaj manoj nepre ne lasos sen puno!" Li aktive organizis la batalantojn diskuti, verki artikolojn kaj lanĉi furiozan reatakon kontraŭ la burĝaraj dekstruloj.

En 1961, la ĉina Ĥruŝĉov senskrupule levis nigran venton de "tri pliigoj kaj unu fikso"\* en la kamparo. Tiam Men He jam fariĝis politika direktanto de la Kvina Roto. Iun tagon, iu batalanto revenis de sia hejmo post vizito al siaj parencoj, Men He iris al li por korverŝa interbabilo. La batalanto diris, ke iuj en lia hejmloko

volas redividi la teron al la familioj por unuopa mastrumado. Men He surpriziĝis je tio kaj tuj konsciis, ke serioza batalo inter la du vojoj en la kamparo jam prezentiĝis antaŭ la vizaĝo. La armeo ja ne vivas en vakuo. Ĉu tiu batalo aperis nur en la hejmvilaĝo de tiu batalanto? Kian influon ĝi povas doni al la batalantoj? Serio da demandoj pezis sur la koro de Men He. Post la interbabilo kun tiu batalanto, li rapidis tiunokte al la gardstarejoj por fari enketon.

Reveninte de la gardstarejoj, li tuj kunvokis la kadrojn al kunsido kaj firme decidis konduki socialisman edukadon en la roto, laŭ la jam konita stato, kaj rebati la nigran venton de "tri pliigoj kaj unu fikso". Sub la gvido

de la penso de Maŭ Zedong, disvolviĝis en la tuta roto debato pri tio, "ĉu la popola komunumo aŭ unuopa mastrumado estas bona". En la kunveno de la armeanoj de la tuta roto, Men He la unua rememoris kaj rakontis sian suferplenan pasintecon kaj akuzis la krimojn de unuopa mastrumado. Li diris: "La vojo de unuopa mastrumado estas vojo retrokondukanta al la socio, en kiu homoj manĝas homojn. Nun iuj denove levas tian venton de unuopa mastrumado, ni nepre ĝin rebatu! Prezidanto Maŭ instruas nin, ke post akiro de la fundamenta venko en la socialisma revolucio de nia lando, ankoraŭ troviĝas parto da homoj en la socio, kiuj revas restarigi kapitalisman sistemon. Ni nepre altigu singarde-mon!"

Tio, kion diris Men He, trafis la koron de la batalantoj. Unu post alia, ili rememoris la pasintajn suferojn kaj pripensis la nuntempan dolĉon, indigne kondamnis la "tri pliigojn kaj unu fikson" kaj multe laŭdis la bonojn de la popola komunumo.

\*Vidu "Enciklopedieton" en n-ro 2 (116), 1968, de nia gazeto.

最高指示  
人民解放军应该支  
持左派广大群众。



Resumante la diskutadon en la roto, Men He formulis “dek avantaĝojn de la popola komunumo” kaj “ok malbonojn de unuopa mastrumado”, kaj ĉie ilin propagandis. En kunveno de la Partia Komitato de la bataliono li proponis, ke oni disvolvu en la tuta bataliono la aktivadon “ĉiu skribu leteron al la hejmo” por helpi la parencojn kaj amikojn klarigi la vidon, oponi la “tri pliigojn kaj unu fikson” kaj defendi la socialisman kolektivajn ekonomion. Ruĝaj leteroj disflugis al la hejmoj en ĉiuj partoj de la patrolando.

Kaj ĝuste en tiuj tagoj, Men He kaj la batalantoj transiris montojn kunportante centojn da verkoj de Prezidanto Maŭ kaj kun la ruĝaj koroj arde amantaj la socialisman aferon, por viziti la popolajn komunumojn en la ĉirkaŭaĵo, kaj portis al la tibetnaciaj samlandanoj sur la stepo la grandan alvokon de Prezidanto Maŭ “**Bona estas la popola komunumo**” kaj la decidemon de la Popola Liberiga Armeo en subteno al la popolaj komunumoj.

Kiam tre intense iris la klasbatalo sur la literatura kaj arta fronto, kaj venenaj teatraĵoj inundis la scenejojn, kamarado Men He ne nur ne rigardis venenajn teatraĵojn, sed pozitive lanĉis atakon kontraŭ ili, kaj ŝanĝis la scenejon en ruĝan pozicion por propagando de la penso de Maŭ Zedong, ilin bojkotante kaj forpuŝante per revoluciaj modernaj teatraĵoj. Tial li fariĝis pli fervo-

ra en disvolvo de scenejaj aktivadoj ol antaŭe. Li mem verkis programerojn kaj antaŭiris aliajn en teatroludo. Li elspezis tre multe da energio por tio, kvazaŭ organizante gravan batalon.

Foje, Men He trovis, ke iu batalanto en la kantogrupo estas ne tre aktiva en provludo de prezentotaj programeroj. Li faris korverŝan interparolon kun la batalanto kaj demandis: “Ĉu vi rigardis teatraĵojn en Hi-an dum via lasta hejmvizito?”

“Jes! Mi rigardis la revoluciajn modernajn operojn *Ruĝa Lanterno*, *Ŝagiabang* kaj *Ruĝa Virina Taĉmento*. Brave!”

“Ĉu vi scias, sub kies gvidado ili estas kreitaj?”

“Sub la gvido de kamaradino Giang King.”

Tirante la manon de la batalanto Men He sidigis lin sur herbejo kaj diris al li intime kaj serioze: “Kial kamaradino Giang King tiel multe atentas pri la teatro? Por efektivi la revolucion linion de Prezidanto Maŭ pri literaturo kaj arto, por forpeli la imperiestrojn, reĝojn, generalojn, ministrojn, dandojn kaj belulinojn de sur la scenejo kaj malpermesi al la klasaj malamikoj restaŭri kapitalismon! Ni estas tiuj, kiuj tenas en la manoj la pafilojn, tamen ni neniel povas neglekti la literaturon kaj arton! Ni devas firme teni kiel la pafilojn tiel

Maldekstre:

*Men He firme subtenas la vastajn amasojn de la maldeks-truloj, kaj batalas ŝultro-ĉe-ŝultre kun la revoluciaj ribeluloj.*

Meze:

*Kune kun aliaj batalantoj, Men He portas la grandan alvokon de Prezidanto Maŭ "Bona Estas la Popola Komunumo" al la tibet-naciaj gefratoj sur la stepo, por firme oponi la nigran venton de "tri pliigoj kaj unu fikso".*

Dekstre:

*Kun nobla komunisma spirito de sinofero por la popolo, heroo Men He protektis 27 klasfratojn per sia vivo.*



ankaŭ la plumojn!" Tion dirante li elpoŝigis la verkon *Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an* kaj ĝin ekstudis kune kun la batalanto.

Ĝuste en tia maniero, kamarado Men He ĉiam aŭskultis la vortojn de Prezidanto Maŭ, strikte sekvis ĉiupaŝe la revolucion linion de Prezidanto Maŭ kaj aktive lanĉis firman reatakon kontraŭ la klasaj malamikoj tie, kie tiuj atakis la revolucion linion de Prezidanto Maŭ.

### **“NENIU POVAS ŜANĜI LA PRINCIPOJN DE PREZIDANTO MAŬ PRI KONSTRUO DE LA ARMEO!”**

La heroo batalanto Men He, fidela al la popolo, al la Partio kaj al Prezidanto Maŭ, firme oponis la burĝaran linion de militaj aferoj antaŭenpuŝitan de la kontraŭrevoluciaj reviziistoj Peng Dehuaj kaj Luo Ĵujking, kun la revolucia spirito de proletara sentimeco en la intensa luktado inter la du linioj, kaj vere meritis la honoran titolon de malmolostulo en defendo de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ.

En 1956, Men He laboris kiel plotonestro en la roto. Li trovis, ke la eksterlandaj dogmoj praktikataj de la granda ambiciulo Peng Dehuaj, kiu intrigis uzurpi la potencon de la armeo kaj oponis la Partion, estas tre antipatiaj, kaj diris kun forta in-

digno: “En kiu punkto tiu sistemaĉo konformas al la instruoj de Prezidanto Maŭ? Aplikado de tiaj eksterlandaj dogmoj tute perdigos la gloran tradicion de nia popola armeo!” Li firme tenis en la koro la instruon de Prezidanto Maŭ: “**La armeo devas kuniĝi kun la popolamaso, por ke la lasta rigardu ĝin kiel sian propran armeon. Tiu armeo estos do nevenkebla en la mondo....**” Li ofte demetis la jakon kun malmolaj epoletoj, kaj kun supren falditaj manikoj vektportis akvon, balais kaj malplenigis la fekaĵbasenon de necesejo kune kun la batalantoj, laboris kune kun laboristoj kaj semadis kaj rikoltadis kune kun kamparanoj. En la okuloj de la popolamaso, li ĉiam restas bona filo de la laboranta popolo.

En 1964, la kontraŭrevolucia reviziisto Luo Ĵujking levis diablan herezon de granda konkurso pri batalarto, kun vana espero ŝanĝi la direkton de la arma konstruado de nia PLA kaj efektiviigi li-an lupan ambicion uzurpi la potencon de la armeo kaj oponi la Partion. En tiu kriza momento, Men He ripetfoje studis la verkon *Pri Korekto de Eraraj Ideoj en la Partio*, serioze klopodis kompreni la saĝan instruon de Prezidanto Maŭ, ke politiko estas la ĉefkomandanto, la animo, kaj relernis la *Rezolucion pri Plifortigo de la Politik-ideologia Laboro en la Armeo*. Fariĝis pli klare en lia penso. En la batalo kontraŭ la absurdaĵo de Luo Ĵujking pri

“elstarigo de militaj aferoj”, Men He brave elpaŝis kaj klare esprimis: “Teni nur militajn aferojn, sed ne la proletaran politikon, neniel konformas al la penso de Maŭ Zedong!” Iuj kamaradoj admonis lin: “Menĉjo, ne kontraŭstaru rigide! Se vi insistus en tio, vi farus eraron!” Men He respondis firme: “Mi kontraŭstaros ĉion, kio ne konformas al la penso de Maŭ Zedong! En ĉiu el la tagoj, kiam mi laboras kiel politika direktanto, mi nepre persistas ĉe la kvar unuaĵoj!”

Post kiam la Tria Subplotono estis difinita kiel “elita subplotono” en la granda konkurso de batalarto, Men He iris al ĝi por doni la unuan lecionon. Li parolis ne pri militaj aferoj nek pri tekniko, sed studis kune kun la batalantoj la verkon *Servu al la Popolo*. Li diris: “La trejnado de la soldatoj ĉefe devas esti trejnado pri la penso servi al la popolo kaj pri la stilo servi al la popolo.” Li ofte iris profunde en la subplotonojn por rakonti historiojn pri batalherooj. Li diris: “Kiom da herooj kiaj Dong Cunĵuj kaj Huang Giguang aperis en la pasintaj militaj jaroj. Ja kiu el ili sin ekzercis pri surgrimpo per fosto aŭ ascendo de domo? Antaŭ ĉio ili havis fidelan koron por servi al la popolo, kaj sekve ili povis fari tian mondkuan heroaĵon, kiam la popolo tion bezonis. Ni gravuru en la koro la saĝan instrukcion de Vicprezidanto Lin, ke

la plej granda batalforto estas homoj armitaj per la penso de Maŭ Zedong.”

En la komenco de 1965, ĉe la plivastigita kunveno de la Regimenta Partia Komitato Men He aŭdis transdiron pri la instrukcio de la intima batalmiko de Prezidanto Maŭ Vicprezidanto Lin pri elstarigo de la proletara politiko kaj tre ĝojiĝis. Li diris foje kaj refoje: “Vicprezidanto Lin staras alte, vidas malproksime, kaj plej alte tenas la ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong, ĉiu el liaj vortoj trafis nian korfundon.” Reveninte al la roto, li tuj okazigis plivastigitan kunvenon de la partia filio por efektiviĝi la instrukcion de Vicprezidanto Lin. La tuta roto tuj levis varman tajdon por efektiviĝi la instrukcion de Vicprezidanto Lin. Kaj kune kun la batalantoj Men He faris ruĝan standardon kun la subskribitaj vortoj “Brave marŝu antaŭen alte tenante la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong”, por ke ĝi ĉiam alte flirtadu super la roto, por ke la roto antaŭen marŝu grandpaŝe laŭ la armekonstrua linio de Prezidanto Maŭ!

En la pasintaj pli ol 20 jaroj, kamarado Men He praktikis siajn ĵurojn dum sia brila vivo:

*En ĉio pensu pri Prezidanto Maŭ,  
En ĉio obeu al Prezidanto Maŭ,  
En ĉio strikte sekvu Prezidanton Maŭ,  
En ĉio agu por Prezidanto Maŭ.*

*La klasfratoj, kiuj saviĝis el la danĝero dank' al la ŝirmo farita de Men He, firme decidis ĉiam resti senlime fidelaj al Prezidanto Maŭ, same kiel Men He.*





# *Rakontoj*

## *pri la Heroo*

### *Men He*



*Por Men He, kreive studi kaj kreive apliki verkojn de Prezidanto Maŭ estis la unua bezonaĵo de la vivo.*

**“SERVI AL LA POPOLO KIEL ‘BOVO’  
DUM LA TUTA VIVO”**

La kuriero kamarado Ĝaŭ Ĉanglaj honore aliĝis al la Komunista Partio de Ĉinio. Revenante de la ĵurdona soleno de partianiĝo kun eksterordinara ekscitiĝo, li retrorigardis la iritan vojon post sia aliĝo al la armeo kaj nature rememoris la edukadon kaj helpadon al li fare de la karmemora politika direktanto kamarado Men He.

Ne longe post armeaniĝo en 1961, Ĝaŭĉjo fariĝis kuriero en la oficejo de la Kvina Roto, kie laboris Men He. En la komenco, li iom malkontentis pri sia okupo kaj foje li preterlasigis “batal-ŝancon” pro mispreno de direkto, kiam li transportis ordonon dum nokta militekzerca manovro. Poste, Men He havis interparolon kun li. Unue Men He studis kune kun li la “tri popularajn artikolojn”, kaj poste diris al li serioze kun profunda sento: “Tio ĉi ja estas la stirrado por nia revoluciado. Gravuru ĝin en la koron, kaj vi neniam perdos la orienton.” Tiuj vortoj profunde komprenigis al Ĝaŭ Ĉanglaj, ke lia erariĝo en direkto dum transporto de la ordono okazis pro tio ke mankis al li

stirrado en la penso. Depost tiam Ĝaŭĉjo studis verkojn de Prezidanto Maŭ pli diligente.

Poste, la gvidanta instanco transpostenigis Ĝaŭĉjon al la bataliona kuriera subplotono. Sed Men He ankoraŭ ĉiam prizorgis lian progreson kaj maturiĝon. Iutage, kiam Ĝaŭ Ĉanglaj la unuan fojon portis de la bataliona oficejo leteron al la Kvina Roto, Men He tuj pridemandis lian studon pri verkoj de Prezidanto Maŭ kaj lian laboradon. Aŭdinte de Ĝaŭĉjo, ke “kuriero devas kuradi tutajn tagojn eksterdome, ne povas sidiĝi iom longe, havas malmultan tempon por studi verkojn de Prezidanto Maŭ, kaj daŭre tiel vivi malhelpos lian progreson”, li tuj divenis, ke li ankoraŭ ne tute eliminis sian malkontenton pri sia okupo de kuriero. Li do diris al li pacience kaj serioze: “Vicprezidanto Lin instrukciis al ni ke en lernado de verkoj de Prezidanto Maŭ oni devas energie peni pri aplikado de ĉio studita. Fruktodona studado ja ne simple dependas de la tempo. Kvankam ‘ekskluzive’ kaj ‘senrezerve’ estas nur du vortoj, tamen estas nefacile tiel agi ĉie kaj en ĉio.” Kaj tiam Men He komencis laŭtlege la brilan verkon *Servu al la Popolo* ŝultro-ĉe-ŝultre kun Ĝaŭĉjo. Ĝin finleginte, Men He daŭrigis sian parolon: “Kamarado Ĝang Side estis veterana batalanto, kiu partoprenis la

Longan Marŝon. Antaŭe li estis subplotones-  
tro, poste li denove servis kiel batalanto kaj pre-  
paris lignokarbon por la revolucio. Diru, kiel  
vi opinias pri lia laboro?"

Tute senhezite Ĝaŭĉjo respondis: "Li 'ekskluzive'  
kaj 'senrezerve' servis al la popolo."

"Prave! Ni revoluciuloj devas agi kiel kamarado  
Ĝang Side, sed neniam devas labori duonvole  
kaj esti elektemaj pri la okupoj." Laŭtigante sian  
voĉon, Men He diris klare akcentante la vortojn:  
"Ni devas servi al la popolo kiel bovo, kiu manĝas  
herbon kaj donas lakton al la popolo. Ni neniam  
devas konsideri pri la kondiĉoj, neniam atendi  
rekompencan, sed ĉiam honeste, 'ekskluzive' kaj  
'senrezerve' labori por la revolucio kaj servi al la  
popolo kiel 'bovo' dum la tuta vivo."

"Servi al la popolo kiel bovo dum la tuta vivo!"  
Ĝaŭ Ĉanglaj meditadis pri la profunda signifo de  
tiuj vortoj.

"Jes ja," daŭrigis Men He, "ni devas remuldi  
nian ideologion dum la tuta vivo, servi al la popolo  
kiel bovo dum la tuta vivo, tiri la revolucion ĉaron  
dum la tuta vivo, ĝis efektiviĝo de komunismo."

"Ĝis efektiviĝo de komunismo!"

"Jes, ĝis efektiviĝo de komunismo! Ne kondu-  
tu tiamaniere, ke vi servas kiel bovo, kiam vi estas en  
bona humoro, kaj veturas per la ĉaro, kiam vin  
trafas malbona humoro!"

Ĝaŭ Ĉanglaj ripetadis tion, kion diris la politika  
direktanto, kaj profunde kortuŝiĝis. Li tuj el-  
poŝigis sian notlibron kaj notis ĉion sen ellaso de  
iu ajn vorto.

Depost tiam, ĉiufoje kiam  
Ĝaŭ Ĉanglaj ekhavas proble-  
mon en sia penso, li nature  
ekmemoras tiujn vortojn de la  
politika direktanto kaj kuraĝi-  
gas sin mem per ili por marŝi  
antaŭen.

## ORDINARA SOLDATO

Men He ofte diris: "Ĉiu  
revolucia kadro, ĉiu kompar-  
tiano aŭ membro de la Komu-  
nista Junulara Ligo devas  
funkcii kiel soldato en la revo-  
lucio." Ĉien, kien li iris, li  
kunportis sian bonan stilon de

ordinara soldato, kaj ĉiam sintenis kiel ordinara  
soldato kun neniam da aparteco.

Foje, survoje al kunveno en la regimenta oficejo,  
Men He kaptiĝis de torenta pluvo kaj tute malse-  
kiĝis. Por atingi la celokon ĝustatempe, li iris  
pli ol cent liojn en la pluvo. Tiuvespere, li venis,  
kun kotmakuloj kaj gutanta pluvakvo sur la tuta  
korpo, al ĉasgrupo de la Sesa Roto. La kamaradoj  
de tiu grupo tuj rapide elprenis por li sekajn vestojn  
kaj cedis al li liton. Men He estis profunde kor-  
tuŝita de la klasfrateco. Li pensis: La batalantoj  
plenumas taskon ĉi tie en izoleco malproksime de la  
gvidantaro kaj peza estas la tasko por ilia malmult-  
membra trupo; mi ne devas ilin ĝeni, sed preni sur  
min iom el ilia tasko. La kamaradoj de la grupo  
volis kuiri manĝon por Men He, sed li haste rifuzis  
dirante: "Ne ĝenu vin, kamaradoj, mi mem kun-  
portas manĝon." Tion dirante, li elprenis el sia  
tornistro du malvarmajn mantoŭojn (t. e. vaporu-  
mitaj pastobuloj) kaj pecon da salita rafano kaj  
komencis manĝi, trinkante bolintan akvon de  
tempo al tempo. Post lia manĝado, la kamaradoj  
admonis lin enlitiĝi iom frue. Sed li diris: "Ne  
akompanadu min kiel gaston, sed iru ripozi! Mi  
ankoraŭ volas iom studi verkon de Prezidanto Maŭ."

Kiam la kamaradoj foriris por ripozo, Men He  
sidiĝis sub la petrola lampo, malfermis trezoran  
libron de Prezidanto Maŭ, kaj la linioj de oraj  
vortoj brile prezentigis antaŭ liaj okuloj:

**"Nia Komunista Partio kaj la de ĝi gvidataj Oka-  
voja kaj Nova Kvara Armeoj estas revoluciaj trupoj,  
kiuj ekzistas ekskluzive por la liberigo de la popolo,  
kaj laboras senrezerve por la interesoj de la popolo."**

*Laborante en la kamparo, Men He konstruis kun la mobilizitaj komun-  
manoj 8 novajn ĉambrojn por du familioj de malnovaj malriĉkamaranoj.*



“Ekskluzive” kaj “senrezerve” — Men He ree kaj ree pripensadis la profundan signifon de tiuj du ore brilaj vortoj. “Ĉu mia hodiaŭa ago konformis al la vortoj ‘ekskluzive’ kaj ‘senrezerve’?” Men He pensis kaj pensis, kaj ĉiam sentis, ke li devas ion fari por la batalantoj de la Sesa Roto, estos bone, eĉ se li povos fari malgrandan servon per sia forto! Kun tiu penso li prenis kaj ĵetis pluvmantelon sur siajn ŝultrojn kaj iris el la domo en la venton kaj pluvon.

Sonora fajfado vekis el sonĝo la batalantojn. Kiam ili venis en la matena krepusko al la ekzerca placo, ili trovis, ke nekonata soldato gardstaras sur la gvatreduto.

“Kiu li estas?” iu demandis mire.

Kiam ili alproksimiĝis, ili vidis, ke tiu estas Men He. La batalantoj diris profunde kortuŝite: “Kamarado Men He estas politika direktanto de la Kvina Roto, kaj veninte al nia roto, li servas kiel ordinara soldato de la Sesa Roto! Vere lerninda ekzemplo por ni!”

Kiam la trupo finis sian matenan ekzercadon kaj kuiristo venis por inviti Men He, pretiginte manĝaĵon kun kuirita sovaĝsafajo, Men He jam foriris kun sia tornistro pendanta de la ŝultro.

## PELMENOJ\* KUN MALDOLĈA FARĈO


Tagmeze de iu dimanĉo, Men He invitis tri plotonestrojn al sia hejmo por ilin regali per pelmenoj. Kiam envenis la gastoj, li tuj surtabligis bovlojn da vaporantaj pelmenoj kaj diris: “Nu, helpu vin kiel hejme.” Kaj kamaradino Ĝang Fengjing, la edzino de Men He, ridadis starante apude. Plotonestro Joŭ Huajĝong prenis

*Por ke la gastantaj familianoj de batalantoj povu loĝi en la barako, Men He konstruis por si “subteran neston” kaj loĝis en ĝi kun siaj familianoj dum tuta vintro.*



*Men He varme amas la altebenejon de sia patrolando. Jen li estas kun sia filineto sur kinghaj-a stepo.*

buŝplenon kaj lia lango sentis maldolĉon. Li atente rigardis kaj trovis, ke la farĉo estas el amara sovaĝlegomo. “Kiel la pelmeno gustas al vi?” demandis Ĝang Fengjing ridetante. Joŭ Huajĝong diris: “Bongusta, tamen iom maldolĉa.” Kaj ĉiuj eksplodis per rido. Tiam Men He diris signifoplene: “Prezidanto Maŭ instruas nin neniam forgesi klasan batalon. En la pasinteco, eĉ amaraj sovaĝlegomoj estis trezoro por ni malriĉuloj, por ne paroli pri pelmenoj!” Kaj kun babilo pri manĝado de sovaĝlegomoj kiel komenco, li rakontis, kiel lia familio sin vivtenis per kolektitaj sovaĝlegomoj. Kiam li parolis pri la katastrofo en lia hejmloko, pri la bienula perforta pagigo de terrento kaj ŝuldo kaj pri la forfuĝo kaj almozpetado de lia familio, la tri viroj sentis acidon



# En Lia Koro Nur

## Prezidanto Maŭ

ĜANG FENGJING (la edzino de k-do Men He)

**M**EN He foriris de ni. En tiuj ĉi tagoj, mi foj-refoje rememoris multajn kortuŝajn agojn de li dum lia vivo kaj ĉiam pli forte sentas, ke granda estis lia vivo kaj glora estis lia morto, ke li vere estas bona kadro elkulturita de nia amata Prezidanto Maŭ kaj bona posteulo de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj.

Dum la dekkelkaj jaroj post nia geedziĝo, li multe min edukis kaj helpis. Lia plej forta kaj neforgesebla impresado donita al mi estas tio, ke li ĉiam pensis pri Prezidanto Maŭ kion ajn farante, kaj ke en lia koro estas nur Prezidanto Maŭ.

En oktobro de 1948, nur kvar monatojn post nia geedziĝo, li jam aktive sin anoncis por aliĝi al la Popola Liberiga Armeo. Panjo tiam ne konsentis, kaj ankaŭ mi iom maltrankviliĝis. Li do

kun pacienco diris al mi: “Fengjing, ambaŭ ni kreskis en maldolĉo kaj ambaŭ niaj familioj havis sian historion de suferoj. Kiel ni povus forgesi la savanton Prezidanto Maŭ, kiel ni povus forgesi, ke ankoraŭ troviĝas en la mondo pli multaj malriĉaj fratoj neliberigitaj hodiaŭ, kiam liberigite ni ĝuas feliĉan vivon!” Tiamaniere li konvinkis min kaj la patrinon, kaj ĝoje aliĝis al la armeo.

En la armeo, li ofte skribis al ni por eduki nin, ke ni ne forgesu nian originon, bone aŭskultu la vortojn de Prezidanto Maŭ kaj iru sensanceliĝe la vojon montritan de Prezidanto Maŭ.

Post kiam mi venis de mia hejmloko al Kinghaj en 1961, ni ĉiam vivis kune kaj mi des pli sentis, ke la plej kara por li estas Prezidanto Maŭ. Ĉiufoje kiam li revenis hejmen de la roto post komenco

---

en siaj nazoj kaj larmis senĉese. Precipe kiam Men He rakontis al ili, kiel liaj gefratetoj estis venditaj, ili ĉiuj ekploregis. Ili tiel ĉagreniĝis, ke ili ne povis engluti la pelmenon en sia buŝo. Forviŝante siajn larmojn kamaradino Ĝang Fengjing riproĉetis: “Menĉjo, vidu, oni venas por ĝoja regalo per pelmenoj, vi tamen metis amarajn sovaĝlegomojn en la farĉon, kaj krome nun...” Sed Men He diris: “Kontraŭe! Tiu ĉi regalo tamen estas sencohava. Nun pelmeno estas ordinara manĝo por ni, sed en la pasinteco, tian blankan farunon ni neniel povis gustumi por generacioj!” Tion dirante, li prenis pelmenon per manĝbastonetoj, ĝin mordis kaj daŭrigis: “Jen, la tritika faruno estas dolĉa dum la farĉo amaras. Manĝante la dolĉan, ni tamen ne forgesu la amaron en la malnova socio! Ni neniam forgesu, ke la samlandanoj en Tajvan ankoraŭ vivas en sufero, kaj la plejparto

de la popolanoj en la mondo ankoraŭ vivas en sufero, kaj ilia vivo estas eĉ pli maldolĉa ol la amara sovaĝlegomo!”

Men He diris al la plotonestroj: “Timi penojn kaj malfacilojn, ŝati komforton kaj ĝuon, monon elspezi malŝpare, elekteme sin nutri kaj lukse sin vesti reduktos la batalvolon kaj faros onin kaptitoj de la burĝaro, se tio longe daŭros.” Tio ke hodiaŭ Men He invitis la plotonestrojn al regalo per pelmenoj ja havis sian profundan signifon, nome “injekti serumon” kaj doni alarmon al tiuj kadroj!

Kamarado Men He ofte faris klasan edukon al la kadroj kaj batalantoj per rememoro pri la maldolĉo en la malnova socio kaj pripenso pri la nuna dolĉo, tiel ke ili por ĉiam tenadu la originan kvaliton de revoluciaj batalantoj.

\* *Pastbuleto farĉita*

**ALBANA PRINTEMPA TRITIKO  
KOMENCIS KRESKI SUR LA  
TIBETA ALTEBENEJO**

En Jadon-regiono, kiu situas sur la bordoj de Ĝuomu-rivero kun lazura torento ĉe la piedo de la arĝente brilantaj neĝaj montpintoj de Himalajoj kaj estas nomata “verda koridoro” sur la tibeta altebenejo, kreskas specio de printempa tritiko kun larĝaj folioj kaj dikaj tigoj. Ĝi estas bona specio el Albanio, nomata de la tieaj kamparanoj “semo de amikeco inter la ĉina kaj albana popoloj”. Helpate de la heroaj batalantoj de la lingvardio, la liberigitaj tibetaj kamparanoj de tiu loko firme tenas la revolucion kaj forte stimulas la produkton, kreive studas kaj kreive aplikas verkojn de Prezidanto Maŭ kaj antaŭenpuŝis la ideologian revoluciigon. Ilia entuziasmo en laboro senprecedence altiĝis kaj en la valo ĉie regas prospero.

En 1967, la dua jaro de prova kulturado de tiu albana specio de tritiko, oni rikoltis en ĉiu *ke-o* (=ĉ.1/15 hektaro) da tero pli ol 170 kilogramojn da tritiko. La produktokvanto estis 40 ĝis 50 procentojn pli granda ol tiu de la loka specio de printempa tritiko. Tiu albana specio de printempa tritiko estis enkondukita en Tibeton antaŭ kelkaj jaroj de la interna parto de Ĉinio. Ĝia kulturado en la montregiono de Himalajoj pruvis, ke ĝiaj grajnoj estas grandaj, ĝiaj tigoj nekliniĝemaj, ĝi taŭgas por kreski sur relative malfekunda tero en malvarma loko, kaj povas rapide maturi kaj doni bonkvalitan kaj altkvantan produkton. La tibetaj kamparanoj tre bonvenigas ĝin.

**KONTINU-KURENTA ARKA  
VELDMAŜINO AR-300**

La revoluciaj laboristoj kaj oficistoj de la Elektromaŝina Riparejo de Naĉang, Gianghi-provinco, sukcesis produkti lastatempe la unuan kontinuu-kurentan arkan veldmaŝinon AR-300 en la provinco. Tia veldmaŝino karakteriziĝas per kurenta stabileco, relativa malgrandeco kaj granda kapacito. Ĝi estas unu el la plej progresintaj kaj ekonomiaj ekipaĵoj por kunigado de metalaj framoj en la nuna tempo.

de la granda kultura revolucio, la unua afero kiun li faris estis viŝi brilige la vitritan kadron de la portreto de Prezidanto Maŭ. Post ellitiĝo en ĉiu mateno, li gvidis la infanojn kanti *Ruĝas la Oriento* antaŭ la portreto de Prezidanto Maŭ. Li ofte organizis la familianojn kune studi vortojn de Prezidanto Maŭ. Kiam la infanoj ankoraŭ ne scipovis voki paĉjon kaj panjon, li instruis ilin koni portretojn de Prezidanto Maŭ kaj krei “Vivu Prezidanto Maŭ!”. Foje, tenante la kvin-jaran bebon Kingcang surbrake kaj montrante al ĝi la portreton de Prezidanto Maŭ, li diris: “Prezidanto Maŭ estas pli kara ol paĉjo aŭ panjo. Li estas la plej kara por nia familio, memoru la estimindan karulon por eterne!” Foje, post hejmenreveno kun 12 aĉetitaj portretoj de Prezidanto Maŭ, li tuj prenis el la vitritaj kadroj la fotojn de li kun siaj infanoj kaj enmetis anstataŭe la portretojn de Prezidanto Maŭ. Tenante ambaŭmane la portreton de Prezidanto Maŭ, li diris emocie: “Kiel bone estas nun, ke ni povas vidi Prezidanton Maŭ je kaplevo, kaj dank’ al tio ni havos neelĉerpeblan energion por revoluciado!”

En ĉiu tago, reveninte hejmen de la roto, ĉu en frua aŭ malfrua horo, li nepre studis verkon de Prezidanto Maŭ. Pro malalta klereco li havis multajn malfacilojn en sia studo, sed li lernadis tre pene kaj serioze. Kelkfoje, kiam mi vekigis el dormo, mi vidis ke li ankoraŭ studas verkon de Prezidanto Maŭ sub petrola lampo. Li ofte diris al mi: “Ne gravas dormi iom malmulte, sed absolute netolereble estas ne studi verkojn de Prezidanto Maŭ!”

Li rigore postulis, ke mi kaj la infanoj kreive studu kaj kreive apliku verkojn de Prezidanto Maŭ. En la unuaj tagoj post mia alveno al Kinghaj, mi ne scipovis legi eĉ mian propran nomon, kaj vere multis malfaciloj por mi en studado. Li do instruis min legi vorton post vorto, klarigadis al mi foj-refoje kaj kuraĝigis min venki la malfacilojn kaj persisti en lernado. Li diris: “La verkoj de Prezidanto Maŭ estas skribitaj speciale por ni malriĉuloj, kaj en ili ĉio temas pri revoluciaj ideoj. Vi certe ilin komprenos, se nur vi havas profundan proletaran sentimenton.” Nun kiam mi rememoras pri ĉio ĉi tio, mi sentas, ke tio estas kuraĝigo kaj stimulo por mi.

Men He foriris de ni, sed la nobla kvalito de senlima fideleco de li al Prezidanto Maŭ ja ĉiam ankoraŭ kuraĝigas min antaŭenmarŝi senĉese, kaj mi certe edukos la infanojn daŭre efektiviigi lian volon kaj fariĝi bonaj daŭrigantoj de la revolucia afero de la proletaro.



*Men Ginĝong (la meza) parolas al batalantoj pri la heroaĵoj de Men He dum la kreskado en bataloj.*

## *Bona Filo de la Laboranta Popolo*

MEN GINĜONG (la patro de k-do Men He)

**M**IA patra domo troviĝis en Tanghian-gubernio, Hebej-provinco. Antaŭ la Liberiĝo, mi laboradis ĉe bienuloj kiel jardungito aŭ tag-laborulo, sed ne povis satigi la familion, kiu poste fuĝis, pro natura katastrofo, al Lajjuan-gubernio kaj fiksloĝiĝis en Nanŝangtun-vilaĝo.

Je la 4-a de la 11-a monato lunkalendara de 1928, Men He naskiĝis en tre kaduka tera kabanaĉo! Frosta vento hurladis kaj enpenetris tra la truoj en la fenestro kaj fendoj en la muroj. Lia patrino tremadis de malvarme sub la sola eluzita vatita litkovrilo de nia familio. La infano naskiĝis, sed ni havis neniun grajnon da milio por prepari manĝon. Mia edzino ellitiĝis kaj iris almozi de familio al familio en la osto-doloriga frosta vento, portante korbon per la brako. Same kiel la aliaj junaj kaj maljunaj anoj de nia familio, ankaŭ Men He sin nutris de sia infanaĝo per amara sovaĝlegomo, malfacilege pasigante la jarojn duone per brano kaj legomoj. Apenaŭ li fariĝis 8-jara, li jam devis servi kune kun mi kiel dungito ĉe bienulo.

En 1940, torenta pluvo daŭris 40 tagojn en Lajjuan, kaj oni rikoltis neniun greneron

tiujare. La kruela bienulo do nin forpelis el sia domo.

Kiel do ni nin vivtenu en tiuj tagoj, kiam eĉ kolekto de amaraj sovaĝlegomoj estis malfacilega? Kun larmoj, mi kaj mia edzino forvendis la naŭjaran fraton kaj trijaran fratinton de Men He por ricevi 4 litrojn da maizo kaj 4 litrojn da sorgo, kio ebligis al niaj familianoj konservi la vivon portempe.

Unu monaton poste, ankoraŭ pli multiĝis la malfaciloj kun ĉiu tago. La venditaj infanoj estis kruele batitaj kaj ŝtele rekuris hejmen plorante. Rigardante la skelete malgrasajn infanojn, mi kaj mia edzino ekploregis. Trovinte neniun alian eliron, mi do diris decideme: "Ni forfuĝu!" Portante la ĉifonan litkovrilon surdorse kaj la eluzitajn korbojn perbrake, ni fuĝis alilokon kun la kvin infanoj por serĉi vivrimedon. Tiam Men He estis apenaŭ 12-jara.

En la printempo de 1941, nia familio venis al Hjuanhua-gubernio. Tie mi sukcesis rilatiĝi kun la subtera organizo de la Partio, kaj dank' al rekomendo de konato fariĝis laboristo ĉe la Longjan-ferminejo kiu estis tiam sub la okupo de japanoj.

Tie mi partoprenis vivmortan batalon kontraŭ la klasaj malamikoj. Tiam, la malgranda Men He unuafoje eksciis, ke estas la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, kiu gvidas la malriĉulojn konduki revolucion! Ekde tiu tempo, li ofte transsendis dokumentojn kaj informojn por la subtera partia organizo. Foje, jam noktiĝis kaj ni devis transsendi leteron. Timante trafon de danĝero, mi ne volis, ke li iru. Sed li argumentis: “Se vi povas ĝin sendi, ja same ankaŭ mi! Mi estas knabo kaj havas pli da oportunoj ol vi.” Mi diris al li, ke tre danĝera estas la laboro kaj ĝia plenumanto riskas senkapigon. Li diris: “Ĉu mi timus morton, se vi ĝin ne timas?” Tiam estis vintro, kaj Heĉjo perdis unu el siaj eluzitaj ŝuoj nelonge post eliro de la vilaĝo. Liaj piedoj ŝveliĝis pro frosto kaj sangis vundite de akraj ŝtonetoj kaj dornoj. Kiam li revenis hejmen en profunda nokto, mi demandis lin, ĉu ili akre doloras al li. Li diris kun rideto: “Por servi al la malriĉuloj, mi timas nenian suferon kaj doloron!”

En 1946, banditaj trupoj de Ĉiang Kajŝek okupis Hjuanhua, kaj mia familio estis sendita de la subtera organizo de la Partio al la jam liberigita Lajjuan. Alveninte la hejmvilaĝon, Heĉjo tuj vizitis la PLA-anojn en ĝi kaj ĝoje petakiris de ili portreton de Prezidanto Maŭ. Tenante ambaŭmane la portreton de Prezidanto Maŭ, li rigardadis lin kvazaŭ longe neviditan karan parencon. Li zorge ĝin pendigis sur la muro kaj plurfoje alproksimiĝis ĝin rigardi en ĉiu tago. Heĉjo gvidis aliajn junulojn plenumi taskojn de gardstarado, gvato kaj observado pri la malamikoj kaj aktive partoprenis la batalon por reduktado de terrento kaj interezo. En la somero de 1947, disvolviĝis en la vilaĝo la grandioza movado de agrara reformo, en kiu Heĉjo ĉiam restis plej firma sur la revolucia starpunkto. Dum batalado kontraŭ la bienuloj, li suriris la podion antaŭ ol la aliaj por akuzi iliajn krimojn kaj kriadis sloganojn kia “Vivu Prezidanto Maŭ!” Lin laŭdis la samvilaĝanoj dirante: “Kvankam juna, tamen Heĉjo faris grandan aferon!” Tiujare, li glorie aliĝis al la Komunista Partio de Ĉinio.

Sub la edukado de Prezidanto Maŭ kaj la Komunista Partio, la proletara konscio de Men He plialtiĝis kun ĉiu tago, kaj li deziris partopreni la Liberigan Armeon baldaŭ post lia partianiĝo. Iutage, kiam li laboris surkampe, li aŭdis ke la trupo varbos nombron da novaj batalantoj. Li tuj sin anoncis al la registrejo. Post la sankcio pri lia armeaniĝo, mi ĝoje lin sendis en la trupon de Prezidanto Maŭ.

Ĉiufoje, kiam mi iris al lia trupo por lin vidi poste, li diradis al mi, ke mi ne forgesu nian pasintan amaron, ne forgesu la klasbatalon, sed aŭskultu la vortojn de Prezidanto Maŭ kaj iru la socialisman vojon. Li atentigis al mi, ke mi bone distingu la amikojn disde la malamikoj, dirante: “La malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj apartenas al unu sama familio; la bienuloj estas niaj malamikoj, kiel ajn bele ili parolas, kaj ni devas teni ilin sub severa kontrolado.” Kiam fondiĝis la kooperativoj kaj popolaj komunumoj, Heĉjo kuraĝigis min doni bonan ekzemplon en aliĝo.

En la jaro 1961, la plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon kriaĉis laŭ la nigra direktivo de la ĉina Ĥruŝĉov pri pliigoj de la parceloj por privata uzo, de la liberaj merkatoj kaj de etaj entreprenoj memrespondecaj pri la propraj profitoj aŭ perdoj, kaj pri la fikso de produkta kvoto bazita sur familia mastrumado: “Por venki la malfacilojn, la komunumanoj nepre devas elkulturi parceletojn de virga tero!” La tuta gubernio estis dronigita de ili en miasmon. En la aŭtuno de tiu ĉi jaro, Heĉjo hejmen revenis por vidi la familianojn. Tion vidinte, li tuj konceptis, ke tio estas serioza klasbatalo koncerne la problemon ĉu iri la socialisman aŭ kapitalisman vojon. Li kunvokis la familianojn kaj diris al ili serioze: “Elkulturi parceletojn de virga tero ja ne estas bagatelo, tio ja signifas iri la vojon kapitalisman! Se la komunumanoj sin okupus nur per laboroj por si mem kaj ne zorgus pri la kolektiva produktado, kiel la popola komunumo povus firmiĝi? Se oni irus laŭ tiu vojo, certe aperus individua mastrumado. Tiam iuj malriĉiĝus dum aliaj riĉiĝus kaj revenus la malnova socio en kiu homo manĝas homon!” Krom tio, Heĉjo nin edukis per nia suferplena familia historio de almozado, rifuĝo de katastrofo kaj forvendo de infanoj en la malnova socio. Li ne trankviliĝis eĉ post la reveno al sia trupo, kaj speciale skribis al ni, ke ni firme tenu en nia memoro la suferojn kaj sangan subpremon kiujn faris al ni la malamika klaso en la malnova socio kaj neniom ŝanceliĝu en kontraŭstaro al la nigra vento de kapitalisma restaŭro.

Nun li jam heroe oferis sian vivon. Kiam mi informiĝis pri lia morto, mi tre ĉagreniĝis. Sed pensante, ke li estas bona filo de la laboranta popolo kaj bona batalanto eledukita de Prezidanto Maŭ, mi sentis grandan fieron. Kvankam nun mi jam estas 68-jara, mi tamen ne moliĝos pro la aĝo, kaj revolucios ĝis la fino firme sekvante Prezidanton Maŭ.



*Dum kuracado en hospitalo, Liu Hjuebaŭ diligente studas verkojn de Prezidanto Maŭ.*

## Heroa Batalanto

### Liu Hjuebaŭ

GAŬGE kaj ZANJING

**K**UN emocio ni prezentas al niaj legantoj la farojn de Liu Hjuebaŭ, heroa defendanto de la granda proletara kultura revolucio kaj la diktaturo de la proletaro. Li estas vicsubplotonestro de la 3-a roto de iu trupo de PLA. Kun senlima fideleco al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj profunda malamo al klasaj malamikoj, li luktis kuraĝe kun kontraŭrevoluciulo. Sub la minaco de eksplodo de dinamito, li savis grandan ponton kaj kreis heroajn mondiskuan.

Je la 17-a de dec. 1967, glorie naskiĝis la Revolucia Komitato de Jongdeng-gubernio, Gansu. Liu Hjuebaŭ, kiu estis taskita subteni la maldestrulojn en la Lianĉeng-a Eksperimenta Forstejo de Jongdeng, forsendis kun ĝojekscitiĝo la laboristojn partoprenontajn la fondiĝan kaj celebran kunvenon de la gubernia Revolucia Komitato. Li estis aparte ĝoja hodiaŭ. En la fundo de sia koro, li kriis: "Vivu Prezidanto Maŭ! Longan, longan vivon al Prezidanto Maŭ!"

"Ni devas neniam pro venko malstreĉi nian atenton al la freneza intrigo de venĝo de la imperiistoj kaj iliaj lakeoj." Bone memorante la grandan instrukcion de Prezidanto Maŭ, kamarado Liu Hjuebaŭ profunde komprenas, ke la klasaj malamikoj ne memvole forlasos la scenejon de historio kaj ankoraŭ faros sian lastan barakton. Ju pli oni estas proksima al la plena venko, des pli oni devas akriĝi la revolucian singardemon, rigore kontraŭ la intrigoj kaj detruoj de la klasa malamiko. Li atente ĉirkaŭrigardis la korton de la oficejo de la forstejo.

Antaŭ vesperiĝo, li vidis, ke iu elglitis tra la pordego. Post atenta rigardo, li rimarkis, ke tiu estas la historia kontraŭrevoluciulo, antaŭe vicrotestro de la kuomintanga ĝendarmoj, kies manoj estis plene makulitaj de la sango de la popolo antaŭ la Liberiĝo. Tiu aĉulo, kiu ekstreme malamis la diktaturon de la proletaro kaj la grandan proletaran kulturalan revolucion, iris laŭ la ŝoseo rekte al la supera parto de la rivero Datonghe. Liu Hjuebaŭ rigardis al tiu direkto. Tie kuŝis la montoj, sur kiuj etendiĝis la vastaj nove kulturitaj forstoj, kiujn diligente flegis la forstejaj laboristoj, kaj ĉe kies piedo estis la novkonstruita ponto. Oni neniam devas permesi ajnan detruon al la fruktoj de socialisma konstruado aŭ lasi kontraŭrevoluciulon efektiviĝi sian intrigon, Liu Hjuebaŭ pensis en si. Li tuj alvokis kamaradon Ĝang Ŝilin de la forstejo kaj ili prenis tranĉilon kaj hakilon por postsekvi la aĉulon.

La luno estis kaŝita de la altaj montoj starantaj ĉe la rivero. La ŝoseo serpentumis malfacile distingeble sur la rivervalo en duonlumo. La kontraŭrevoluciulo iris tre haste kaj maltrankvile, jen montrante sin en lokoj pli malpli lumaj, jen kaŝante sin en mallumaj ombroj. Fikse sekvante la kontraŭrevoluciulon, Liu Hjuebaŭ strikte observis lian agadon. Li sekvis lin laŭ la ŝoseo preskaŭ sep kilometrojn. La ĉielo fariĝis pli malluma. La kontraŭrevoluciulo subite rapidigis siajn paŝojn kaj malaperis post monto. Kien li kuris? Ne malproksime laŭ la ŝoseo estas la nova ponto, kaj pli fore estas granda arbaro, Liu Hjuebaŭ pensis, ke la aĉulo certe iras detruo la ponton, se li ne iras bruligi la arbaron... Ja estas bona ŝanco por ekstermi la malamikon, kiu jam mem sin montris. Liu Hjuebaŭ flustris al Ĝang Ŝilin: "Rapidre reiru kaj alvoku helpantojn por kapti ĉiujn malamikojn en unu reto!" Zorgante la sekurecon de Liu Hjuebaŭ, Ĝang Ŝilin diris: "Tie antaŭe



kuŝas profundaj montoj kaj densa arbaro, estas danĝere por vi iri sola.” “Ne zorgu pri mi,” decide respondis Liu Hjuebaŭ, “kiu revolucias, tiu ne timas morton. Mi nenion timas por defendi Prezidanton Maŭ.” Ĉe adiaŭo, Ĝang Ŝilin transdonis la hakilon al li kaj admonis: “Estu singardema, kara Liu!” Tiu tuj respondis per la vortoj de Prezidanto Maŭ: “**Faru firman decidon, timu nenian oferon...**” Kaj Ĝang Ŝilin akompanis lin daŭrige: “**kaj superu ĉiujn malfacilaĵojn por akiri venkon.**”

Kun senlima fideleco al Prezidanto Maŭ kaj sentima heroa spirito, Liu Hjuebaŭ sola postsekvis la kontraŭrevoluciulon. Antaŭ li jam estas la ponto. Ambaŭflanke de la ŝoseo kaj rivero kunpreme staras grandaj krutaj montoj, la terenformo estas tre danĝera. Subite, la kontraŭrevoluciulo alkuras returne. “Haltu!” Liu Hjuebaŭ kriis. Apenaŭ finiĝis lia vorto, ŝtono jam alflugis sible preter lia dekstra orelo. Por kapti la kontraŭrevoluciulon, li salte sin ĵetis al li. La kuomintanga spiono, kiu ricevis specialan trejnadon, klinite sin ĵetis al Liu Hjuebaŭ kvazaŭ kruela lupo, brakumis liajn femurojn kaj faligis lin sur la teron. Memorante la grandan instruon de Prezidanto Maŭ: “**Tiu ĉi armeo posedas spiriton nevenkeble marŝi antaŭen, kaj ĝi nepre volas faligi ĉiujn malamikojn, sed neniam esti subigita de ili.**”, Liu Hjuebaŭ tuj eksentis sin plena de forto. Li subite turnis sin supren kaj per sia tuta forto puŝis la fersimilan dekstran genuon sur la bruston de la kontraŭrevoluciulo.

Trans la ponto, estis vicoj da barakoj por pontkonstruaj laboristoj. Kiam li levis sian kapon por alvoki helpon, li vidis bluajn fajrerojn en arkaĵo de la granda ponto, 80 metrojn for de li. Damninde! La kontraŭrevoluciulo jam metis eksplodaĵon sur la ponton! La klasa malamiko volas ja detrui tiun ĉi novan ponton!

Kiam la meĉo de la eksplodaĵo sur la ponto brulis kun fajreroj, ankaŭ en la okuloj de Liu Hjuebaŭ flagris per malamaj fajreroj kontraŭ la klasa malamiko. Li elprenis de sia lumbo la hakilon kaj batis per ĝi la kapon de la kontraŭrevoluciulo. Per tio li donis por la popolo de la patrolando indan punon al tiu ĉi krimulo.

La heroa batalanto venkis en la vivmorta lukto kontraŭ la klasa malamiko. Sed, ankoraŭ pli rigora ekzameno sin prezentis antaŭ li. La meĉo de la eksplodaĵo brulas kaj la ponto estas en danĝero.

Senĉese sonis ĉe la oreloj de Liu Hjuebaŭ la instrukcio de Prezidanto Maŭ: “**Faru firman**

**decidon, timu nenian oferon kaj superu ĉiujn malfacilaĵojn por akiri venkon.**” Lia sango bolis kaj lia volo estis senkompare firma: “Kiam mi estas ĉi tie, la ponto ne detruigōs! Eĉ je la kosto de vivo, mi sekurigōs la ponton!”

La heroa Liu Hjuebaŭ rekte kuris al la ponto, kun mirinda kuraĝo prenis la eksplodaĵon sub sia maldekstra brako kaj rapide forkuregis de la ponto malsupren laŭ la deklivo.

Kurante, li provis eltiri la meĉon, sed ne sukcesis. Tiam li ekpinĉis la brulaĵon, sed ankaŭ ĝin ne sukcesis estingi. Nur unu penso regis en la kapo de Liu Hjuebaŭ: Ju pli da paŝoj estas for de la ponto, des pli sekure fariĝos por ĝi; do pli malproksimen de la ponto, ankoraŭ pli malproksimen! Sekurigo de la ponto estas sekurigo de la granda proletara kultura revolucio! Kurante Liu Hjuebaŭ kriis: “Vivu Prezidanto Maŭ! Longan, longan vivon al Prezidanto Maŭ!”

Kun la eksplodaĵo, Liu Hjuebaŭ tiel forkuris de la ponto je 5 ... 10 ... 20 ... 30 ... metroj. La meĉo de la eksplodaĵo pli kaj pli mallongiĝis, restis al ĝi nur 4 ... 3 ... 2 ... 1 colo, kaj li ankoraŭ kuregis kun ĝi. En la plej kriza momento, kiam preskaŭ tute forbruliĝis la meĉo, li forĵetis ĝin.... “Bum!” La tondro ekskuis la noktan valon kaj la tero estis ruĝe briligita de la fajro.

La eksplodo forŝiris al Liu Hjuebaŭ la maldekstran manon, kaj li falis svena sur la bordon de la rivero. Kiam la laboristoj ĉe proksime kaj de la forstejo rapidis al li, la rekonsciiĝinta Liu Hjuebaŭ diris al ili: “Ne zorgu min. Rigardu, ĉu estas ankoraŭ eksplodaĵo metita de la malamiko sur la ponto.” Rideto de venko kuris sur liaj lipoj, kiam oni diris al li, ke la granda ponto estas sekura.

Fluo havas sian fonton kaj arbo sian radikon. Ke Liu Hjuebaŭ, kiu aliĝis al PLA malpli ol du jarojn, estas senegoisma kaj sentima en la ŝtormo de klasbatalo, tio estas rezulto de nutrado per la ĉiamvenka penso de Maŭ Zedong.

Liu Hjuebaŭ naskiĝis en la familio de malriĉkampano de Mae-komunumo de Sanjuan-gubernio, Ŝanhi-provinco. Antaŭ la Liberiĝo, tri generacioj de lia familio estis dungitoj de bienuloj kaj vivis pli mizeran vivon ol brutoj. En la jaro 1949, Prezidanto Maŭ savis lian familion el la fundo de mizero. Kiam li estis iom scia, liaj gepatroj konstante diris al li: “Prezidanto Maŭ ja estas por ni malriĉuloj la plej plej granda intimulo kaj bonfaranto.” De la infanaĝo, Liu Hjuebaŭ

jam decidis, ke li ĉiam sekvos Prezidanton Maŭ en revoluciado.

En marto de 1966, kun fidela koro por defendi Prezidanton Maŭ, li venis al la Ĉina Popola Liberiga Armeo—la granda lernejo de la penso de Maŭ Zedong.

La verkoj de Prezidanto Maŭ estas la plej ŝatataj trezoraj libroj de Liu Hjuebaŭ. La brila teorio de Prezidanto Maŭ pri klaso kaj klasbatalo armis lian cerbon. Li ĉiam fikse tenas en sia memoro la instrukcion de Prezidanto Maŭ, ke oni devas trakti kaj analizi ĉion el vidpunkto de klaso kaj klasbatalo kaj per la metodo de klasa analizo.

En la printempo de 1967, por subteni la agrikulturan produkton, la roto de Liu Hjuebaŭ venis al iu komunumo situanta proksime al ĝia garnizonejo. Ne longe post la alveno al la komunumo, Liu Hjuebaŭ trovis, ke ĝia produktado iras malbone. Firme apogante sin sur la malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj, li faris enketon kaj analizon laŭ la vidpunkto de klasbatalo kaj trovis, ke tion kaŭzis subfosado de iu bienulo. Tiu ĉi bienulo arogante kriaĉis: “Nun estas bona tempo por ni, por nia releviĝo.” Krome, li ankaŭ kompromitis la bonfamon de la kadroj antaŭ la amaso kaj instigis ĝin ekscese batali kontraŭ ili. Liu Hjuebaŭ tuj organizis la komunumanojn kaj kadrojn por studi la teorion de Prezidanto Maŭ pri klaso kaj klasbatalo, kaj helpis ilin malkaŝi la intrigojn de la malamiko, uzante la penson de Maŭ Zedong kiel armilon. **“La imperiistoj kaj enlandaj reakciuloj certe ne volantas akcepti sian malvenkon kaj ili ankoraŭ faros sian lastan baraktadon. Post paciĝo de la tuta lando, ili ankoraŭ ĉiamaniere entreprenos sabotadon kaj malordigadon kaj ili ĉiutage kaj ĉiminute intencos restariĝi en Ĉinio. Tio estas neevitebla kaj tute senduba, kaj ni devas neniam malstreĉi nian singardemon.”** Tiu instruo de Prezidanto Maŭ lumigis la okulojn de la amasoj, kaj ili malkaŝis la krimagojn de la bienulo unuj post aliaj. Liu Hjuebaŭ organizis batalan kunvenon, en kiu la malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj intense batalis kontraŭ la bienulo. La politika konscio de la kadroj kaj amasoj estis multe levita. Ili firme unuiĝis kaj vigle progresis ilia produkta laboro.

Dank’ al la ĉiamvenka penso de Maŭ Zedong, Liu Hjuebaŭ staras senŝanceliĝe sur la starpunkto de la proletaro en la akra kaj komplika klasbatalado, kuraĝe batalis kontraŭ la malamiko kaj fariĝis heroo batalanto defendanta Prezidanton Maŭ kaj la diktaturon de la proletaro.

### OKSIGENUJO EL PLASTO FORTIGITA PER VITRAJ FIBROJ

Alte tenante la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong kaj persiste irante la vojon de sinapogo sur la propraj fortoj, la laboristoj de la Plasta Fabriko Zengkiang en Hangĝoŭ sukcesis en provprodukto de oksigenujo el plasto fortigita per vitraj fibroj kun kapacito de 40 litroj, post pli ol dujara klopodado.


Oksigenujo ja estas tenujo nemalhavebla por agrokulturo, industrio, medicina laboro, nacidefenda konstruado k. a. Ordinare ĝi estas farita el aloja ŝtalo. La ĉefa materialo por fari la nomitan novan produktaĵon estas vitraj fibroj. Ĝi estas malpli peza je ĉirkaŭ duono kompare kun la ŝtala kaj oportuna por vasta uzo kaj povas fari gravan servon en subtenado al agrokulturo, industrio, medicina laboro kaj nacidefenda konstruado.

### GRANDA DISVOLVIĜO DE KULTURADO DE LAMINARIO

Alte tenante la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong kaj firme plenumante la grandan direktivon de Prezidanto Maŭ **“teni la revolucion kaj stimuli la produkton”** en la granda proletara kultura revolucio, la vastaj revoluciaj amasoj kaj revoluciaj kadroj en la marbordaj regionoj de nia lando multe disvolvis la kulturadon de laminario. En 1967, la totala kvanto de la rikoltita laminario en diversaj lokoj ĉe la marbordo multege superis la plej altan rekordon en la pasinteco; kaj la kultura areo de laminario en la kuranta jaro plivastiĝis je tri dekonoj ol en la pasinta jaro.

La granda disvolvo de la kulturado de laminario en nia lando dum la lastaj jaroj ne nur kontentigis la bezonojn de la popola vivo, sed ankaŭ liveris favoran kondiĉon por la disvolvado de niaj industrioj, kiaj la medicina, kemia kaj ŝpinteksa.

# Fera Muro



Patroli sur la mardefenda linio.


Firme tenante en la koro la instruon de Prezidanto Maŭ, ke niaj trupoj “ekzistas ekskluzive por la liberigo de la popolo kaj laboras senrezerve por la interesoj de la popolo”, trupo de PLA garnizonanta sur insulo ĉe la orientmara frontlinio klopodas por “teni la revolucion kaj stimuli la produkton, aliajn laborojn kaj militpreparon” kune kun la loka popolamaso. La armeanoj kaj popolanoj unuiĝas en akordo kaj formis feran muron por kune plenumi la honoran taskon defendi la maran teritorion de la patrio. Se la malamiko aŭdacas entrudiĝi, ĝi certe estos dronigita en la vastan maron de popola milito.

(Supremaldekstre) Studi verkon de Prezidanto Maŭ kune kun avinoj.

(Supredekste) Servi al la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj.

(Malsupre) Lanĉi furiozan atakon kontraŭ la ĉina Ĥruŝĉov.







Sin trejni diligente por bati la malamikon.

# La “Naŭa Familio” de Fiŝista Vilaĝo

**K**ARAJ amikoj, sube ni rakontos al vi pri la “naŭa familio” de iu fiŝista vilaĝo: Sur iu malgranda hufforma insulo en la centro de la Flava Maro de nia lando, troviĝas fiŝista vilaĝeto kun nur ok familioj. Ĝia “naŭa familio” estas la mardefenda gardejo de PLA ĉirkaŭita de bluŝtona muro. En la granda proletara kultura revolucio, sub la granda alvoko de Prezidanto Maŭ “**subteni la armeon kaj zorgi la popolon**”, nova amikeco stariĝis inter la “naŭa familio” kaj la amasoj de la fiŝista vilaĝo.

## PLA-ANOJ ALPORTIS LA PENSON DE MAŬ ZEDONG

Veĵ Hi, estro de la produkta brigado de la malgranda fiŝista vilaĝo, estas maljuna malriĉkamparano, kiu laboris pli ol dudek jarojn sub la vipo de fiŝista tirano. Kaj li estas tre respondecema pri la kolektivaj aferoj, kvankam lia aĝo jam superis sesdek jarojn. Iutage, en la komenco de la granda kultura revolucio, komunumano afiŝis unu dazibaŭon pri li:

*Veĵ Hi, Veĵ Hi, brigadestro vi grandaĝa  
Da demokratia stilo havas ne tre multe en laboro,  
Ĉion pridecidas ja nur vi en solo.  
Pensu: Ĉu forgesi la amaslinion estas io saĝa?*

Indigne pensis Veĵ Hi, vidinte la dazibaŭon: “Se miaj laboroj estis senmeritaj, ili almenaŭ estis laciĝaj. Por esti kadro estas bezonata penado, sed rikoltata nur maldanko!” Pro kolero li eĉ decidis forlasi la postenon de kadro.

En la studrondo de la penso de Maŭ Zedong, ĉiuj aliaj varme partoprenis la diskutadon, sed brigadestro Veĵ silentis kun klinita kapo, kaj nur fumadis pipon. Tion rimarkis kaj notis en sia koro la gardejestro kamarado Li Hin-an.

Post la kunsido, la gardejestro venis al la hejmo de la brigadestro Veĵ. Ili babilis sidante sur la masonita lito.

La gardejestro diris: “Onklo, en nia naŭfamilia fiŝista vilaĝo ne decas ke la afero de tenado de revolucio kaj stimulo de produkto estas mastrumata de neniuj!”

La brigadestro Veĵ respondis: “Kiu volas, tiu mastrumu!”

Trovante ke Veĵ ankoraŭ havas koleran humoron, la gardejestro pacience pensigis lin: “Onklo, ĉu estus bone ke Skorpio Hju ĝin mastrumu?”

La vorto vekis en la brigadestro Veĵ amaran rememoron: Skorpio Hju estis la tirano sur la insuleto. Veĵ Hi fiŝkaptis por li dudek ok jarojn, dum kiuj li manĝis kion brutoj manĝis kaj vestis sin per “milfoje flikita vesto”, tamen, en la fino li ankoraŭ ŝuldis al la tirano 40 litrojn da greno. La maljuna edzino almozpetis kunportante infanojn. Skorpio Hju ne nur ne almozdonis, sed eĉ sendis hundon por mordi ilin...

Tion rememorante, la brigadestro Veĵ eklarmis.

Tiam Li Hin-an elpoŝigis ruĝan verkon de Prezidanto Maŭ kaj kune kun li legis la artikolon *Servu al la Popolo*.

La gardejestro diris: “Prezidanto Maŭ instruas al ni: **‘Ĉar ni servas al la popolo, sekve ni ne timas, ke aliaj kritikis niajn mankojn, se ni tiajn havas.’** Komunumanoj faris al vi kritikon, tio montras ke ili zorgas pri vi en politiko. Kiu tenu la potencon de la produkta brigado, se ne la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkampanoj? Ni ja devas sekvi la vortojn de Prezidanto Maŭ!”

La brigadestro Veĵ ekstaris kaj prenis la manon de Li Hin-an, dirante: “Gardejestro, en ĉio kulpas tio ke mi ne bone lernis el trezoraj libroj de Prezidanto Maŭ. En la malnova socio, mi laboregis por la fiŝista tirano en sufero kaj mizero, hodiaŭ mi servas al la popolo en senlima gloro, tamen, mi fariĝis kalkulema. La tuta kaŭzo kuŝas en ‘egoismo’! Mi nepre forte batalos kontraŭ ‘egoismo’, firme sekvos la instruojn de Prezidanto Maŭ, bone tenos kaj uzos la potencon **‘ekskluzive’** kaj **‘senrezerve’** por la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkampanoj.”

De tiam, la brigadestro Veĵ ŝanĝis sian laborstilon, kaj aktive gvidas la fiŝistojn teni la revolucion kaj stimuli la produkton. La amasoj diris:

“Por nia vilaĝo la ‘naŭa familio’ ne nur fosis puton kaj portas akvon, sed ankaŭ alvenigas la penson de Maŭ Zedong. Tio estas vere alsendo de ligno-karbo en neĝa tago!”

## ĈIUJ FAMILIANOJ ESTAS BATALANTOJ

Iuvespere, sub la organizo de subplotonestro Sun Vende, la kvar generacioj de la familio de la maljuna malriĉkampano Vej Hi kunsidis por kritiki la absurdaĵon “ekspluato estas merito” distrumpetitan de la ĉina Ĥruŝĉov. Sun Vende petis ilin unue studi la plej novajn instrukciojn de Prezidanto Maŭ kaj poste kritiki la reakciajn asertojn “ekspluato estas merito” kaj “kampanoj bonvenigas ekspluaton”. Apenaŭ Sun Vende finis sian parolon, Ĝaŭ Juĝeng, la edzino de Vej Hi, jam komencis kun indigno: “La vortoj de la ĉina Ĥruŝĉov ne multe diferencas de tio, kion Skorpio Hju diris. En la jaro 1944, ni pruntis de Skorpio Hju tridek litrojn da sorgo, sed tion ni ne povis tute repagi eĉ dum tri jaroj pro la aldonendaj procentegoj, kiuj postulis pluajn procentegojn. Tiam la kutima diraĵo de Skorpio Hju estis: ‘ne estas riĉeco sen ekspluato’; tio estas tute identa kun la diro ‘ekspluato estas merito!’”

Parolante pri la aserto de la ĉina Ĥruŝĉov “ekspluato estas merito”, la avino ekstremis pro indigno: “Mi jam vivis tiom multe da jaroj kaj spertis ĉiujn suferojn de la malnova socio. Ĉion kion ni akiris kaj kaptis, forekspluatis la fiŝista tirano. Kial ni malriĉuloj suferis, se ne pro la ekspluatado fare de la fiŝista tirano?” Tion dirante, ŝi ne povis reteni siajn larmojn.

En tiu tempo, revenis de la produkta brigado Vej Ŝukin, 16-jara nepino de Vej Hi kaj subplotonestro de la milico. Trovante ke la tuta familio kritikis la ĉinan Ĥruŝĉov, ŝi tuj partoprenis la kunsidon sen preno de vespermanĝo. Ŝi diris: “Niaj prapatroj suferis ĉiujn malbonojn kaj amaraĵojn de ekspluatado, de generacio al generacio, sed la ĉina Ĥruŝĉov asertis ke ni ‘bonvenigas ekspluatadon’. Per tio li simple kalumniis kaj nigrigis nin malriĉkampanojn kaj malsuperajn mezkampanojn. Ni devas lin kritiki, ĝis li estos plene faligita kaj senkreditigita!”

Tuj kiam Vej Ŝukin finparolis, Ĝaŭ Juĝeng elprenis de post sia korpo kelke da paperrulaĵoj kaj ilin disvolvis. Ili estis kritikaj karikaturoj verkitaj de ŝi mem. Tiu ĉi maljuna avino pli ol 60-jara scipovas pentri jam delonge, sed antaŭe ŝi pentris nur kokojn, anasojn, katojn, hundojn, flo-rojn, herbojn kaj arbojn. Foje, kiam batalantoj de



la gardejo helpis ŝin en studado de verkoj de Prezidanto Maŭ, ili rakontis al ŝi, kiel Gu Ataŭ esprimis sian lernitaĵon kaj kritikon kontraŭ la ĉina Ĥruŝĉov per pentraĵoj, ŝi diris ke ankaŭ ŝi imitos Gu Ataŭ. Kaj tiel ŝi komencis verki kritikajn karikaturojn. Montrante iun pentraĵon en kiu la ĉina Ĥruŝĉov malice levas nigran hakilon por haki persikarbon plenan de fruktoj, ŝi diris: “La persikarbo estas popola komunumo. Ke la ĉina Ĥruŝĉov volas forhaki ĝin, tio ja estas opono kontraŭ socialismo!” Fine, Vej Hi eldiris la koran senton de la tuta familio: “La koro de ni malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj por ĉiam inklinos al Prezidanto Maŭ kaj ni ĵuras defendi Prezidanton Maŭ per nia vivo!”

## ŜANĜIĜIS LA HOMA SPIRITO KAJ TERFIZIONOMIO

Dum dekoj da jaroj, cirkulis en la malgranda fiŝista vilaĝo popolkanto:

*Ja grandaj estas montoj, ventoj kaj pluvoj ekscesaj.  
Sed kreskas nek maizo, nek plantaĵoj alispecaj.*

Ĉu vere en la fiŝista vilaĝo ne povas produktiĝi greno?



# En Kriza Momento

**E**STIS profunda nokto, tre mallume. Sur la ŝoseo kondukanta al la kazerno troviĝis neniu krom la batalantoj Liu Juhang kaj Ĝoŭ Ĝeng-guang, kiuj rajdis sur galopantaj bicikloj. Sur la vojo ili interparolis plezure pri la bonega situacio de la granda proletara kultura revolucio.

Momenton poste, ili venis al akuta vojkurbiĝo. Maldekstre staris krute muro de roko, kaj dekstre kuŝis profundaĵo. Tiutempe, renkonte al ili alkuregis ĵipo en plena rapideco. Kiam la ŝoforo trovis, ke antaŭ li biciklas du batalantoj de PLA, li tuj direktis la aŭton al la dekstra flanko, dume la forta lamplumo blindigis la biciklantojn. Antaŭ ol ili povis debicikliĝi, la ĵipo jam pli kaj pli alproksimiĝis, jen dek metrojn, jen ok metrojn ... la ŝoforo urĝe bremsis, sed la ĵipo ankoraŭ glitis antaŭen. En tiu kriza momento tuj venis al li en la kapon la granda instruo de Prezidanto Maŭ **“Sen popola armeo la popolo havas nenion”**. Li pensis, ke la PLA-anoj ĉiutage laboras de frua mateno ĝis profunda nokto por propagandi la penson de Maŭ Zedong inter la vastaj revoluciaj amasoj kaj faris senmortajn meritojn por la granda proletara kultura revolucio, kaj ke li ne devas lasi la aŭton kolizii kun la PLA-anoj, eĉ se li devus pro tio oferi sian vivon. Tion pensante, li forte turnis la stirilon por fari dekstran turniĝon kaj tuj la ĵipo glitis al la profundaĵo, puŝiĝis kontraŭ arbo kaj haltis. Al Liu kaj Ĝoŭ okazis nenio, sed la ŝoforo estis vundita ĉe la kapo kaj sendita al hospitalo. Poste oni sci-

iĝis, ke la vundito estas komunisto Ĝaŭ Deĝen, ŝoforo kun kvin bonoj de iu minejo kaj brava revolucia sturmento kontraŭ la enpartiaj potencentantoj irantaj la kapitalisman vojon.

Kun emociiĝo, estroj de la trupo venis al la hospitalo kune kun Liu kaj Ĝoŭ por konsoli la vunditon, kunportante ruĝajn trezorajn libretojn de Prezidanto Maŭ. Kiam la ŝoforo Ĝaŭ vidis la savitajn batalantojn, li tre ĝojis. Kaj Liu kaj Ĝoŭ kriis unuvoĉe: **“Lernu de la revolucia ribelulo! Saluton al la revolucia ribelulo! Lernu de kamarado Ĝaŭ!”** Sed humile diris tiu: **“Mi faris nur kion mi devas fari laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ ‘subteni la armeon kaj zorgi la popolon’.** Mi por ĉiam legos la librojn de Prezidanto Maŭ, aŭskultos liajn instruojn kaj lernos de kamaradoj de PLA. Saluton al kamaradoj de PLA!”

Nelonge poste, kamarado Ĝaŭ resaniĝis kaj revenis al sia batalposteno.


Kiam la novaĵo pri la heroaĵo de la revoluciulo, kiu savis PLA-anojn el danĝero, venis al la trupoj, la vastaj amasoj de kadroj kaj batalantoj esprimis unuanime, ke ili des pli aktive propagandos la penson de Maŭ Zedong, kaj ĵuris konduki la grandan proletaran kulturalan revolucion ĝis la fino. La vastaj revoluciaj amasoj ankaŭ faris decidon preni kamaradon Ĝaŭ Deĝen kiel modelon kaj defendi per praktikaj agoj PLA, la ŝtalan muron de la proletaro, kaj la grandan proletaran kulturalan revolucion.

En la granda proletara kultura revolucio, la batalantoj de la “naŭa familio” propagandis la instruon de Prezidanto Maŭ kuraĝi pensi, kuraĝi paroli kaj kuraĝi agi. La instruo de Prezidanto Maŭ montris al la ok familioj de malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj la direkton de antaŭenmarŝo. De tiam, ekbolis laborentuziasmo sur la kalvaj montoj: oni elfosis ŝtonojn, konstruis barajojn kaj transportis teron por fari kampojn. La naŭ familioj unuanime klopodis kune kaj elhakis pli ol cent agropecojn grandajn kaj malgrandajn rekte sur roko. Ili alplantis maizon, sojon kaj arakidon.

Aŭtune, la malgranda fiŝista vilaĝo akiris grandan riĉan rikolton kaj senprecedence produktis pli ol 5,000 ĝinojn da greno.

Ja ŝanĝiĝis la penso kaj spirito de la naŭ familioj, kaj ankaŭ ekhavis novan fizionomion la malproksima fiŝista vilaĝo kaj la sterilaj montoj. La ruĝaj tabuloj kun vortoj de Prezidanto Maŭ staras ĉie sur la montoj, olee verdas la ŝtuparkampoj. Kaj la kantoj pri unuiĝo kaj amikeco inter la armeanoj kaj popolanoj ŝvebas super la malgranda insulo.

Tanzaniaj amikoj ri-  
gardas kun estimo la  
statuon de Prezidanto  
Maŭ.



*Afrikon Jam  
Heligas Brita  
la Lumturo*

#### MAHOMETO ALI

*Sunbrile tra Afrik' la pens' de Maŭ Zedong radias,  
Forbalaante l' nigrajn nubojn de l' ĉiel-kupolo.  
Nun forte brilas en Afrik' malluma fajr' revolucia.  
Katen' mil-funta jam ne povas subjugigi l' ŝtalan volon de l' popolo.  
Nek feraj kradoj povas ligi la de l' revoluciuloj noblan koron!  
Afrik' postulas liberecon! Ĝi emancipiĝon volas!  
La vojon de Maŭ Zedong ĝi ekiras kun armil' en manoj,  
La uragan' revolucia ĉiam pli potence bolas,  
Vigliĝas ĉiam pli kaj pli la fortaj batalflamoj.*

. . . . .

*Rigardu, jen Afrikon jam lumigas hele la lumturo!  
Aŭskultu, tondras mondoskue nun revolucia la milittamburo!  
La regpotencon kaptu en armita batalformo.  
Jam ŝanceliĝas la palaco de l' diabloj en la ŝtormo.  
Ho, ĉiamvenka l' pens' de Maŭ Zedong  
Brilegas kiel ora suno super la afrika tero,  
Montrante al ni l' vojon al emancipiĝo,  
Kaj ĉiam disradias per la brilo de la vero.*




**La Monda Popolo Varme  
Amas Prezidanton Maŭ**

# *Lernantoj-praktikantoj de Kongolando (B.) Varme Amas Prezidanton Maŭ*

**A**NTAŬTAGMEZE je la 10-a de februaro ĉijare, en la Popola Halo, situanta okcidente de la Tian-anmen-placo, kune staris ĉirkaŭ ĉefministro Ĝoŭ naŭ kongolandaj (B.) amikoj, sur kies uniformoj ruĝe brilis insignoj kun portreto de Prezidanto Maŭ.

Tiuj junaj amikoj venis de la malproksima Afriko por lerni praktike en Ĉinio. Sub la brilo de la penso de Maŭ Zedong, ili jam finis sian duonjaran praktikadon kaj estis revenontaj al sia patrolando tiun tagon. Nun, en aŭdienco ĉe ĉefministro Ĝoŭ, por esprimi sian koran dankon

*Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj inter amikoj el Kongolando (B.).*



al Prezidanto Maŭ, ili ŝvingis la ruĝan libreton *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong* kaj kriis: “Vivu, longe longe vivu Prezidanto Maŭ!” Ili iris al ĉefministro Ĝou unu post la alia kaj laŭvice brakumis lin. Poste, ili kune kantis la ŝatatan kanton, kiun ili jam kantis sennombrajn fojojn:

*Marnavigad' dependas de l' stiristo,  
Ĉiuj vivafoj ŝaldas sian kreskon al la suno.  
Dank' al la pluv' kaj roso plantoj kreskas fortaj,  
Revolucio ja dependas de la pens' de Maŭ Zedong.*

Jam foriris al sia patrolando la amikoj de Kongolando (B.), sed fiksiĝis en la koroj de ĉinaj kamaradoj la memoro pri iliaj kantonoj plenaj de profunda sento kaj ilia varma amo al Prezidanto Maŭ.

Estis ankoraŭ en julio de la pasinta jaro. Kiam la amikoj de Kongolando (B.) ĵus surpaŝis la teritorion de Ĉinio post vojaĝo trans maroj kaj montoj kaj unuafoje vidis ĉinajn kamaradojn, ili tuj entuziasme kriis: “Ni deziras al Prezidanto Maŭ longan longan vivon!” Atinginte la hotelon, ili jam demandis al la interpretisto: “Ĉu ĉi tie estas akirebla la *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong* en franca lingvo? Ni tre deziras tuj ĝin posedi!” Kiam ili ricevis ĝin, ili saltis pro ĝojo kaj alte tenante ĝin ripetade kriis: “Vivu la trezora libreto!” En la periodo de praktikado de pli ol duonjaro, la kongolandaj amikoj soife studis ĉiutage verkojn de Prezidanto Maŭ. Ili regule kunsidis kaj aperigis murgazeton por interŝanĝi sperton kaj komprenaĵon en studo de verkoj de Prezidanto Maŭ.

La fervoro de la kongolandaj amikoj en studo de verkoj de Prezidanto Maŭ estis tre kortuŝa. En iu noktmezo, ĉiuj jam dormis, sed ankoraŭ brilis la lampo de la legejo, kaj iu kongolanda amiko sidis antaŭ verko de Prezidanto Maŭ, tutanime ĝin legante. Li estis la 20-jara grupestro de la lernantoj-praktikantoj Bossina Georges, ĉar li trovis post la vespermanĝo en la legejo la libron *Vortoj de Prezidanto Maŭ pri Popola Milito*. Ĉe eklego de la libreto, li tuj estis altirita de ĝiaj penetremaj eksplikajoj. Kaj ju pli li legis ĝin, des pli multon instruan li lernis. Kiam li venis al la fino de la libro kaj levis sian lacigitan kolon, li trovis ke jam tagiĝis. Poste, li rekomendis ĝin al siaj kamaradoj. Ili ĉiuj estis profunde impresitaj post legado kaj diris, ke la penso de Prezidanto Maŭ “**El la pafilo venas la ŝtatpotenco**” estas universala vero. Se la revoluciaj popoloj de la tuta mondo posedos tiun ĉi veron kaj agos laŭ ĝi, ili nepre akiros liberiĝon.

Ankaŭ la 21-jara Boula estis tre aktiva en studado de verkoj de Prezidanto Maŭ. Parolante pri sia sperto en studado, li diris, ke la penso de Maŭ Zedong estas potenca armilo de la tutmondaj popoloj por batali kontraŭ imperiismo kaj koloniismo kaj spirita nutraĵo por la junuloj, kia li estas, por kiuj la plej grava afero en lernado estas posedi la penson de Maŭ Zedong.

Prezidanto Maŭ diris: “**Oni devas lerni marksismon ne nur de libroj, sed ĉefe tra la klasbatalo, laborpraktiko kaj kontaktado kun la laboristaj kaj kamparanaj amasoj; nur tiamaniere oni povas vere ĝin asimili.**” Laŭ tiu instrukcio de Prezidanto Maŭ, la kongolandaj amikoj plurfoje iris al fabrikoj kaj komunumoj, vizitis maljunajn laboristojn kaj malriĉajn kamparanojn kaj aŭskultis ilian rakontadon pri iliaj familiaj historioj kaj sperto en kreiva studo kaj apliko de verkoj de Prezidanto Maŭ. Foje, ili speciale vizitis Gu Ataŭ, maljunan aktivulinon en studo de verkoj de Prezidanto Maŭ. Gu Ataŭ diris al ili, ke antaŭ nelonge ŝi vidis la grandan gvidanton Prezidanto Maŭ, kaj li manpremis kun ŝi. Aŭdinte de ŝi, ke Prezidanto Maŭ fartas tre bone, la kongolandaj amikoj tre ĝojis, varme aplaudis longe kaj kriis: “Longan longan vivon al Prezidanto Maŭ!” Ili diris: “Ni havas senlime varman amon al Prezidanto Maŭ; lia bona sano estas la plej granda feliĉo por ni!” Kaj ili konkure manpremis kun Gu Ataŭ kaj diris kun emocio: “Onklino, hodiaŭ ni dividis kun vi la feliĉon premante vian manon, kiun premis Prezidanto Maŭ. Ni nepre studos diligente verkojn de Prezidanto Maŭ same kiel vi.”

Post vizitado al fabrikoj kaj komunumoj, la kongolandaj amikoj serioze studis la instruon de Prezidanto Maŭ pri sinapogo sur la propraj fortoj. Ili diris, ke la ĉina popolo atingis grandan sukceson, dank' al efektivigo de tiu penso de Prezidanto Maŭ. La penso de Prezidanto Maŭ multe kuraĝigas kaj edukas ilin. Ili povas akiri la nacian sendependecon kaj firmigi kaj defendi ĝin nur sub la kondiĉo, ke ili apogas sin sur la propraj fortoj laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ. Por koni la situacion de la venke disvolviĝanta granda proletara kultura revolucio, ili kunsidis kun ruĝaj gvardianoj kaj revoluciuloj en fabrikoj. Ili varme diris, ke la granda venko akirita de la granda proletara kultura revolucio, iniciatita kaj gvidata persone de Prezidanto Maŭ, estas ankaŭ ilia, kaj ke la revolucio de Ĉinio subtenas la popolojn de la tuta mondo, kaj ke ili firme staras ĉe la flanko de la ĉina popolo.

Laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ “**Librolegado estas lerno, ankaŭ aplikado estas lerno kaj eĉ pli grava speco de lerno**”, la kongolandaj amikoj tre atentis pri kreiva studo kaj kreiva apliko de verkoj de Prezidanto Maŭ. Ili diris, ke ili studas verkojn de Prezidanto Maŭ ne simple por reciti kaj diskuti, sed ĉefe por direkti sian agadon. Kiam ili studis la artikolon *La Direkto de la Junulara Movado*, en kiu Prezidanto Maŭ montras, ke la revoluciaj junuloj devas kunligi kun la vastaj amasoj de laboristoj kaj kamparanoj, ili estis profunde tuŝitaj kaj tuj esprimis la deziron labori en kampara popola komunumo. Cetere ili deklaris, ke kiel ajn longa estos la distanco, ili marŝos tien piede kaj ne uzos veturilon. Iu el ili diris, ke la ĉefa celo de ilia laborado en la kamparo estas lerni de la kamparanoj kaj remuldi sian mondkoncepton. Postnelonge, ilia deziro estis efektivigita. Alte tenante ruĝajn flagojn kaj kunportante la libreton *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong*, ili marŝis bonorde en vico al la produkta brigado, kantante

la kanton *Marnavigo Dependas de la Stiristo*. Kune kun la komunumanoj, ili falĉis rizon kaj ebenigis kampojn. Dum laborado ili ne konsentis paŭzi kaj eĉ faris konkurson kun la komunumanoj, antaŭ ol ili finfalĉis la rizon sur granda spaco.

Boula renkontis multajn malfacilojn en sia lernado, sed li firme tenis en sia memoro la instrukcion de Prezidanto Maŭ: “**Faru firman decidon, timu nenian oferon kaj superu ĉiujn malfacilaĵojn por akiri venkon.**” Sub la helpado de la veterana laboristo, li venkis la malfacilaĵojn per sia tuta energio kunligante la teorion kun la praktiko, kaj fine ellernis la teknikon.

La kongolandaj amikoj finis sian lernadon kaj estis tuj revenontaj al sia patrolando. Kun profunda amikeco ili diris, ke la penso de Maŭ Zedong donis al ili la saĝon kaj forton por servi al la popolo, kaj ke ili ĉiam deziras longan longan vivon al Prezidanto Maŭ!

# **Nova Japanlingva Eldono de la Unua Volumo de “Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong” Distribuita en Japanio**

**L**A nova japanlingva eldono de la unua volumo de *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong* estis distribuita en Japanio. Por varme celebri tion, ĉirkaŭ du mil revoluciaj popolanoj en Tokio kaj Jamaguĉi-gubernio respektive okazigis kunvenojn antaŭ nelonge.

La celebra kunveno en Tokio okazis sub la aŭspicio de la ĉefsidejo de la Japan-Ĉina Amikeca Asocio (Ortodoksa).

Ĉe tiu kunveno Masajuki Jasui, la konstanta direktoro de la Japan-Ĉina Amikeca Asocio (Ortodoksa), diris: “Prezidanto Maŭ disvolvis

marksism-leninismon al tute nova stadio, la stadio de la penso de Maŭ Zedong. Tuj post la penso de Maŭ Zedong estos posedita de la vasta amaso, ĝi fariĝos neelĉerpebla forto—spirita atombombo kun senkompara potenco. Ni decideme studos la verkojn de Prezidanto Maŭ kun la demandoj en nia menso, kreive studos kaj aplikos ilin, energie klopodos pri la aplikado, kaj persistos en la batalo de la japana popolo kontraŭ usona imperiismo.”

Poste, Kazuto Macumura, fama filozofo, faris paroladon titolitan “La Grava Signifo de la Penso de Maŭ Zedong en la Nuna Epoko”. Li diris,



*La revolucia popolo de Jamaguĉi-gubernio, Japanio, okazigis en la 18-a de majo kunvenon por varme soleni la aperigon de la nova japanlingva eldono de la unua volumo de "Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong" en Japanio.*

ke la verkoj de Prezidanto Maŭ estas plej brilaj ekzemploj de la kombiniĝo de teorio kun praktiko, kaj ke oni devas kreive studi kaj apliki la starpunkton, vidpunktojn kaj metodojn de Prezidanto Maŭ por servigi ilin al la praktiko de la japana revolucio.

Joŝio Higasa, membro de la japana revolucia dramgrupo "Dentrado", konatigis ĉe la kunveno sian sperton pri la kreiva studo kaj apliko de la verkoj de Prezidanto Maŭ.

Ĉe la kunveno en Jamaguĉi-gubernio Ŝoiĉiro Furutani, reprezentanto de la Jamaguĉi-gubernia Komitato (maldekstra) de la Japana Komunista Partio, faris paroladon fervore laŭdante la penson de Maŭ Zedong kiel la plej altnivelan marksism-leninismen en la nuna epoko kaj asertante, ke la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kreive kaj plenaryplekse heredis kaj disvolvis marksism-leninismen. Li diris, ke la *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong* estas kristaliĝo de la universala vero de la monda revolucio, kaj la aperigo de la nova

japanlingva eldono de la unua volumo de la *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong* estas la plej valora donaco de la ĉina popolo al la japana popolo. Li daŭrigis, ke ili devas apliki la penson de Maŭ Zedong en la praktiko de la japana revolucio, senĉese reformi sin kaj la mondon kaj batalakiri la kompletan venkon de la japana revolucio.

Kijoŝi Inoĉe, fama historiisto kaj profesoro de Kioto-universitato, faris raporton ĉe la kunveno. Li emfazis, ke Prezidanto Maŭ instruis al ni: **"La centra tasko kaj plej alta formo de revolucio estas kapti la ŝtatpotencon per armita forto kaj solvi la problemon per milito"** kaj **"El la pafilo venas ŝtatpotenco"**. Tio estas granda vero universale aplikebla. Hodiaŭ la plej grava tasko por la japana popolo estas faligi la usonan imperiismen kaj la japanan reakciularon por starigi la ŝtatpotencon de la popolo.

Takenori Furuno, ĝenerala direktoro de la Jamaguĉi-regiona ĉefsidejo de la Japan-Ĉina Ami-

# Eldoniĝis Verkoj de Granda Gvidanto de Albana Popolo K-do Hoxha


**L**A unua volumo de la verkoj de k-do Hoxha, la granda gvidanto de la albana popolo, komencis esti distribuita en diversaj lokoj de Albanio ekde la 18-a de majo kaj ricevis varmegan akcepton de ĝia tuta popolo.

La verkoj de k-do Hoxha estis eldonitaj laŭ la decido de la Centra Komitato de la Albana Partio de Laboro. La dua volumo de liaj verkoj ankaŭ aperos kurantjare. En la unua kaj dua volumoj estas kolektitaj la verkoj de k-do Hoxha, skribitaj dum la nacia liberiga milito de Albanio de novembro, 1941 ĝis decembro, 1944.

keca Asocio (Ortodoksa), kaj aliaj personoj ankaŭ parolis ĉe la kunveno.

La artaj batalantoj de la japana revolucia dram-grupo "Dentrado" prezentis ĉe la kunveno siajn novajn revoluciajn artajn programerojn "Varma Hurao pro la Deklaro de Prezidanto Maŭ por Subteni la Batalon de la Usonaj Nigruloj kontraŭ Perforta Subpremo" kaj "Tri Popularaj Artikoloj". Ili rikoltis fervoran aklamon de la ĉeestantaro.

*La ĉeestantaj gejunuloj kaj gestudentoj legas absorbite la verkojn de Prezidanto Maŭ.*





*Italaj studentoj en Romo faras kontraŭ-registaran manifestacion tenante portretojn de la grandaj revoluciaj instruantoj Lenin kaj Prezidanto Maŭ.*

# Granda Ŝtormo

**L**A granda ŝtormo de la revolucia amasa movado leviĝinta en Francio, Eŭropo kaj norda Ameriko kun potenco de lavango rapide kaj forte daŭre disvolviĝas. Dek milionoj da francaj laboristoj sin ĵetis en la batalon de striko. Sub la subteno de la laboristoj, la parizaj studentoj kondukas heroan batalon kontraŭ la reaciaj trupoj

kaj policianoj kaj levis novan furiozan tajdon de batalo. La kamparana movado rapide disvolviĝas, sekve de la profundiĝo de la laborista batalo. La tajdo de la batalo de la popolamasoj disetendiĝas en pli kaj pli multe da kapitalismaj landoj. Tio estas grandskala amasa batalo neniam okazinta dum la lastaj kelkdek jaroj en la koro






*Tenante portreton de Prezidanto Maŭ kaj ruĝajn flagojn, svedaj popolanoj kunvenas kaj manifestacias en la sveda ĉefurbo Stokholmo.*

de la kapitalisma mondo. Ĝi donas pezegan baton al la dekadenco kaj kaduka kapitalisma sistemo.

La granda forto de la popolamasoj manifestiĝis ekstreme klare en ĉi tiu ŝtormo. La grandioza kaj nerezistebla revolucia agado

de la francaj laboristoj, studentoj kaj vastaj popolamasoj ankoraŭfoje pruvis la saĝan tezon de Prezidanto Maŭ, ke **“imperiismo kaj ĉiuj reakciuloj estas papertigroj”**.

La justa batalo de la franca popolo kaj diverslandaj popoloj de Eŭropo kaj norda Ameriko vekis grandegan resonon tra la tuta mondo kaj ricevis vastan simpatieron kaj subtenon de diverslandaj revoluciaj popoloj en la tuta mondo. Kaj en diversaj lokoj de nia tuta lando, dudek milionoj da armeanoj kaj popolanoj okazigis sinsekve grandiozajn manifestaciojn por esprimi firman subtenon de la sepcent milionoj da ĉinaj popolanoj al la revo-



*Dum sia kontraŭ-registara kunveno, hispanaj studentoj de la Madrida Universitato disŝutas flugfoliojn.*

lucia batalo de la popoloj de Eŭropo kaj norda Ameriko.

Nia granda instruanto Prezidanto Maŭ montris: **“La proletaro kaj laboranta popolo de Eŭropo, norda Ameriko kaj Oceanio sin trovas en nova vekigo.”** La vigla disvolviĝo de la nuna revolucia amasa movado en Eŭropo kaj norda Ameriko ĝuste estas signo de la nova vekigo de la proletaro kaj vastaj popolamasoj de tiuj ĉi landoj.

Samkiel ĉiuj malnovaj renegatoj kaj oportunistoj, la sovetunia reviziisma renegata kliko kaj la franca reviziisma renegata kliko ludis plej senhontan rolon en ĉi tiu granda ŝtormo. Tuj kiam aperis la amasa movado, ili malnoble kalumniis ĉiujn revoluciajn agojn kiuj rompis iliajn reviziismajn rutinojn, kiel tiel nomatan “aventurisman” ktp. Kiam la revolucia amasa movado forĵetis iliajn kalumniojn kiel rubon kaj rapide fariĝis incendio, ili urĝeme komplotis kun la monopola burĝaro intencante kiel eble plej rapide forvendi kaj estingi la revolucion por ĉasi groŝon da profito. Ni atendas por vidi, kian malhonestan pajacan ludon ili ankoraŭ prezentos en la historia areno.

En ĉi tiu ŝtormo, la revoluciaj amasoj en Eŭropo kaj norda Ameriko kuraĝas maleslimi la leĝon kaj bajonetojn de la reakcia

reganta kliko, multimas subpremon kaj persistas en heroa batalo, kaj en tio manifestas viglan revolucian spiriton.

En ĉi tiu ŝtormo, diverstavolaj popolanoj en Eŭropo kaj norda Ameriko elmetis diversajn konkretajn postulojn kaj batalajn sloganojn. La ĝenerala lanĉpinto de ilia batalo klare celas al la krima regado fare de la monopola burĝaro kaj al la tuta kapitalisma sistemo. Tio montras, ke la nivelo de la amasa batalo en Eŭropo kaj norda Ameriko disvolviĝis al nova alteco.

En ĉi tiu ŝtormo, la junaj studentoj ludas avangardan rolon, pli kaj pli kombiniĝas kun la laborista movado, kaj per tio forte puŝas la tutan popolan movadon al pluapaŝa altiĝo.

Prezidanto Maŭ instruis nin: **“Imperiismo pretigis al si kondiĉon de pereco. Tia kondiĉo ĝuste estas la konsciigo de la vastaj popolamasoj en la kolonioj kaj duonkolonioj kaj la vastaj popolamasoj en la imperiismaj landoj mem.”**

Hodiaŭ, ni troviĝas en nova granda epoko de monda revolucio. La naciliberiga movado en Azio, Afriko kaj Latinameriko peze batis imperiisman kun Usono ĉe la kapo, akcelis la disvolviĝon de la politika



*Studentoj de okcidenta Berlino luk-tas kontraŭ reakciaj policanoj en trafikplena strato de tiu urbo.*

kaj ekonomia krizo en la imperiismaj landoj kaj akriĝis la klasajn kontraŭdirojn interne de tiuj landoj. La vastaj amasoj de laboristaro kaj subpremata popolo montras pli kaj pli fortan malkontenton kaj opozicion kontraŭ la reakcia regado de la monopola burĝaro kaj la ekzistanta socia sistemo. La nova altiĝo de la revolucia amasa movado en Eŭropo kaj norda Ameriko estas ĝuste elstara esprimiĝo de la internaj konfliktoj, ĉiam pli profundigantaj kaj akriĝantaj en la kapitalisma mondo.

Antaŭ dek unu jaroj, eksplikante la tezon, ke la orienta vento superis la okcidentan venton, Prezidanto Maŭ diris: **“La loĝantaro de la imperiisma tendaro estas nur ĉirkaŭ kvarcent milionoj, kaj plue ĝi estas interne dividita. Tie okazos ‘tertrempo’.”**

Eŭropo kaj norda Ameriko estas la malnova nesto de imperiismo. Imperiismo estrata de Usono ĉiam rigardis tiun regionon kiel sian solidan postfronton en la pasinteco kaj praktikis tie plej striktan kontrolon super ĝi; ankaŭ moderna reviziismo kun sovetunia reviziismo kiel ĝia centro, inkluzive diverskolorajn renegatojn, laborist-perfidulojn kaj kontraŭrevoluciajn peonojn, pene klopodas helpi imperiismon estratan de Usono stabili la reakcian regadon super tiuj regionoj. Hodiaŭ, kiel fortega tertremo, la rapida kaj furioza disvolviĝo de la popolamasa movado en Eŭropo kaj norda Ameriko frakasis la belan sonĝon de la internacia monopola burĝaro. Por imperiismo jam ne plu restas paradizo sur la tero.

Kie ekzistas la malluma regado de imperiismo kaj reakciularo, tie la popolo, konsistigas pli ol 90% de la loĝantaro, certe leviĝos por revolucio. Estas neevitebla la disvolviĝo de la revolucia batalo de la laborista klaso kaj la vastaj popolamasoj en Eŭropo kaj norda Ameriko. Ĝin povas bari nek la monopola burĝaro, nek la socialdemokratiaj partioj, nek moderna reviziismo. En Eŭropo kaj norda Ameriko, vere poten-



*Progresemaĵaj parizaj studentaj brave batalas kontraŭ reakciaj armeanoj kaj policanoj sur la strato St. Michel en Parizo.*

caj estas la vastaj popolamasoj en tiuj regionoj, sed definitive ne la monopola burĝaro. La revolucio de tiuj landoj estas multpromesa.

La tutmondaj popoloj estas ĝojigitaj kaj inspiritaj de la granda uragano de la amasa movado en Eŭropo kaj norda Ameriko. La sepcent-milionaj ĉinaj popolanoj armitaj per la penso de Maŭ Zedong firme staras ĉe la flanko de la eŭropaj kaj nord-amerikaj revoluciaj popoloj. Ni kredas, ke se la laborista klaso kaj la vastaj popolamasoj en Eŭropo kaj norda Ameriko unuiĝas kun la vastaj revoluciaj popoloj tra la tuta mondo kaj persistas en heroa kaj longdaŭra batalo, la kapitalisma kaj imperiisma sistemo certe estos entombigita!

(Mallongigo de la ĉefartikolo de *Renmin Ribao* de la 27-a de majo, 1968)



*La komandantoj kaj batalantoj de la Ĉina Popola Liberiga Armeo firme subtenas la justan batalon de la franca revolucia popolo kaj la laboristoj kaj studentoj de Eŭropo, Ameriko kaj Oceanio.*



*Armeanoj kaj popoloj de Nankino faras grandiozan manifestacion por subteni la justan batalon de la popoloj de Francio, Eŭropo kaj Norda Ameriko.*

La



*Junaj ruĝaj gvardianoj kaj revoluciaj instruistoj kaj studentoj de altaj, mezaj kaj elementaj lernejoj de nia ĉefurbo manifestacias tra Tian-anmen-placo por firme subteni la popolan movadon de Okcidenta Eŭropo kaj Norda Ameriko.*

# Ĉina Popolo Subtenas Vin

**P**LENAJ de internaciisma revolucia pasio de la proletaro, la vastaj revoluciaj amasoj kaj la komandantoj kaj batalantoj de la Popola Liberiga Armeo de nia lando plej firme subtenas la grandan revolucion komencitan de la francaj laboristoj kaj studentoj kaj la popolajn movadojn vaste disvolviĝantajn en Eŭropo kaj Ameriko. La laboristoj, malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj, ruĝgvardianoj, revoluciaj instruistoj kaj studentoj, revoluciaj kadroj kaj amasoj, komandantoj kaj batalantoj de PLA de diversaj lokoj en nia lando, kiuj partoprenis manifestacion por esprimi sian subtenon, jam nombris 20 milionojn. La grandioza movado de manifestacio komencita en nia ĉefurbo Pekino rapide disvastiĝis al Ŝanhajo, Tiangin, Ŝenjang,

Nankino, Vuhan, Kantono, Ŝigiaĝuang, Tajjuan, Huhehoto, Harbin, Ĉangĉun, Ginan, Hangĝoŭ, Hefej, Nanĉang, Ĝengĝoŭ, Nanning, Hi-an, Lanĝoŭ, Hining, Jinĉuan, Urumĉi, Gujjang, Ĉengdu kaj aliaj urboj kaj al la vasta kamparo kaj urbetoj. La 700-miliona ĉina popolo firme staras ĉe la flanko de la popoloj de Francio, Eŭropo kaj Ameriko kaj kondamnas la usonan imperiismon kaj ĉiujn ĝiajn komplikojn.

La bataloj de la francaj laboristoj kaj studentoj formas revolucionan fluegon, kiu torentas kontraŭ la tutan Francion kaj skuas la kapitalisman mondon. Kun granda atento la ĉina popolo sekvas la batalon de la franca popolo; sennombraj homoj ĉirkaŭas radioaparatojn por informiĝi pri la revo-

lucia batalo de la parizaj laboristoj kaj studentoj: la granda striko de la francaj laboristoj, heroa luktado de parizaj studentoj sur stratoj, la okupado de fabrikoj kaj lernejoj fare de laboristoj kaj studentoj respektive, paralizo de komunikoj kaj konfuziĝo de merkatoj. La vastaj revoluciaj amasoj de nia lando varme huraas: Brave agas la franca revolucia popolo! Saluton al la heroaj francaj gefiloj, heredantoj de revolucia tradicio de la Pariza Komunumo kaj al la revoluciaj popoloj de diversaj landoj en Eŭropo kaj Ameriko. Preskaŭ dek mil laboristoj de la Ĉangĉun-a Unua Aŭtomobila Fabriko kunvenis kaj manifestaciis por firme subteni la revolucion okupadon de la fabriko fare de la pli ol 60,000 laboristoj de la plej granda monopola aŭtofabriko en Francio "Renault" kaj la justajn batalojn de francaj laboristoj por okupado de fervojoj, havenoj, multnombraj gravaj fabrikoj, minejoj kaj entreprenoj. Ili diris, ke la brava leviĝo al batalo fare de la laborista klaso, la ĉeforto de la popola movado en Francio, Eŭropo kaj Ameriko, estas natura rezulto de la disvolviĝo de la kontraŭdiroj interne de la tuta kapitalisma sistemo kun la usona imperismo ĉe la kapo. Ni ĉinaj laboristoj subtenos la francan laboristan klason per praktika agado de akiro de venko en revolucio kaj produkto. La venko apartenos nepre al la franca laborista klaso kaj franca revolucia popolo! Ankaŭ la laboristoj de Kajluana Karbminejo, kiuj posedas gloran revolucionan tradicion de kontraŭimperiisma batalo, amase manifestaciis. Ili diris: Kvankam ni estas malproksime for de la francaj karboministaj fratoj, tamen la komuna celo de la proletara revolucia afero kunligas nin koro kun koro. Ni ĝojas pro ĉiu venko atingita de la franca popolo en la revolucia batalo.

La revoluciaj amasoj de diversaj lokoj indigne kondamnis la krimagon de la franca reakciularo subpremi la francan popolon kaj alterne apliki la du kontraŭrevoluciajn rimedojn de perforta subpremo kaj politika tromplogo, kaj ankaŭ la perfidon de la reviziismaj klikoj de Sovetunio kaj Francio, kiuj en koluzio kun la franca reakciularo forvendis la movadon de la francaj laboristoj kaj studentoj. Ili montris, ke la sindikataj ĉefoj de la franca reviziisma kliko, kiuj kriaciis lastatempe, ke la strikantaj laboristoj estu "sinregemaj", mal-



*Ŝanhajaj revoluciaj popolanoj manifestacias por firme subteni la justan batalon de la popoloj de Francio, Eŭropo kaj Norda Ameriko.*

permesis al la laboristoj subteni la manifestacion de la studentoj kaj eĉ intertraktis kun la reakciuloj kaj kapitalistoj celante vendi la francan laboristan klason, estas komplikoj de la francaj reakciuloj. Multaj popolkomunumanoj en la vilaĝoj okazigis malgrandajn kunsidojn ĉe kamprando por esprimi sian firman subtenon al la justa batalo de la francaj laboristoj kaj studentoj. La malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj montris, ke sub la saĝa gvidado de la granda instruanto Prezidanto Maŭ, firme irante la proletaran ĝisfunde revolucionan vojon montritan de Prezidanto Maŭ, la ĉina popolo akiris grandan venkon kaj fondis la novan Ĉinion kun la diktaturo de la proletaro. Kaj ili kredas, ke la laboristaro kaj laboranta popolo de Francio posedantaj gloran revolucionan tradicion de la Pariza Komunumo certe piedpuŝos la francan reviziisman klikon flanken kaj antaŭenmarŝos brave laŭ la revolucia vojo montrita de la Pariza Komunumo.

Plenplenaj de fido, la vastaj popolamasoj de nia lando esprimas sian varman subtenon al la batalantaj popoloj de Francio kaj diversaj aliaj landoj en Eŭropo kaj Ameriko. La 700-miliona ĉina popolo firme subtenas vin! Persistu en la batalo! Venko nepre apartenos al la popolo!

# Forta "Tertremo" en Francio

**E**N la komenco de majo, 1968, en la franca ĉefurbo Parizo eksplodis uragana manifestacio de studentoj kontraŭ la usona imperismo kaj la putra reakcia eduka sistemo de la franca registaro. Alte tenante ruĝajn flagojn kaj kantante *La Internacion*, la manifestaciantoj marŝis grandpaŝe kun levitaj kapoj al la parizaj stratoj.

La justa batalo de la parizaj studentoj tuj ricevis vastan subtenon de la franca revolucia popolo kaj progresemaĵ studentoj de diversaj landoj en Okcidenta Eŭropo. La 13-an de majo, la franca laboristaro lanĉis landskalan ĝeneralan strikon. De tiu tago, la indigna fajro de strikado baldaŭ kovris la tutan landon kvazaŭ eksplodo de vulkano. Ĝis la fino de majo, pli ol dekmiljon francaj laboristoj, konsistigantaj kvinonon de la franca loĝantaro, persistadis en la tutlanda strikado kun alta batalspirito, spite al la "interkonsento" atingita de la franca reviziisma kliko kaj ĉefoj de flavaj sindikatoj kun la monopola burĝaro. De la karboŝaktoj en la nordo ĝis la granda havenurbo Marsejlo en la sudo, de Bordeaux en la okcidento ĝis Strasbourg ĉe la landlimo inter Francio kaj Okcidenta Germanio, ĉie flirtis brile ruĝaj flagoj super fabrikoj, kaj laboristaj pikadoj gardstaris ĉe la fabrikoj kaj minejoj okupitaj de ili. La fervojoj, havenoj, aerodromoj, poŝto kaj telekomuniko daŭre dronis en paralizo.

Kaj tio ne estis ĉio. Eĉ en la centro de la atoma industrio de Francio la laboristoj kaj oficistoj de la Nuklea Fabriko Pierrelatte, kiu produktas por Francio esencajn materialojn por atombomboj kaj hidrogenbomboj, komencis sentempliman strikadon je la 29-a de majo. Ankaŭ la Atom-esplora Centralo ĉe Cadarache apud Marsejlo estis okupita de trimil strikantaj laboristoj kaj oficistoj.

Ekde la vespero de la 28-a de majo, la Franca Novajagentejo iam ĉesis ekspedi novaĵojn enlanden kaj eksterlanden, kaj ankaŭ francaj radio- kaj televido-stacioj iam ĉesis funkcii.

Je la 28-a de majo, imitante la ekzemplon de la bakistoj en Parizo, ankaŭ la bakistoj en aliaj lokoj de tuta Francio aliĝis al la laboristaj vicoj de ĝenerala striko. La monopola burĝaro ricevis ĉiam pli pezajn batojn.

La studenta movado disvolviĝis de Parizo al la tuta lando, de universitatoj al la mezlernejoj. Studentoj okupis 18 universitatojn kaj kolegiojn kaj brave luktadis kontraŭ reakciaj armeanoj kaj policanoj, subtenate de laboristoj. Burĝaraj ĵurnaloj kaj gazetoj kriis kun konsterniĝo: Francio vizaĝas al "la plej granda krizo de la socio, ekonomio kaj registaro" en la lastaj tridek jaroj.

La revolucia fajro bruligita de la francaj laboristoj kaj studentoj envolvis, en tre mallonga tempo, la pli ol 90 departementojn de Francio kaj donis pezan frapon al la reakcia regado de la franca monopola burĝaro. Antaŭ la granda ŝtormo, la reganta kliko de Francio panike teruriĝis kaj konfuziĝis. La franca ĉefministro Pompidou ne povis manĝi kaj endormiĝi trankvile, tutnokte sidadis en sia oficejo kaj kriis konsternite: "la nuna krizo" en Francio havas "tre seriozan karakteron". Je la 24-a de majo, la franca prezidanto de Gaulle faris al la tuta lando televidan paroladon, en kiu li veis skrupule, ke la tuta Francio jam venis al "la rando de paraliĝo". Paul Huvelin, prezidanto de la organizo de francaj monopolaj kapitalistoj Landa Konsilantaro de Francaj Dungantoj, diris kun timtrema koro, ke se la striko daŭrados plue, "nepre estiĝos serioza konsekvenco".

Parizaj studentoj rebatas la armitajn policanojn, kiuj venas por ilin subpremi.



Parizaj progresemaj studentoj faras grandskalan manifestacion por oponi la barbaran subpremon de la armeanoj kaj policanoj al la studenta movado.







*Laboristoj de la pariza Renault Aŭtomobila Kompanio  
brave okupis la fabrikon kaj hisis ruĝan flagon super ĝia domo.*

*Francaj studentoj starigis barikadojn sur parizaj stratoj kaj paralizigis la trafikadon.*



# Por Kiu Ili Parolas?

*Fortege kaj rapide leviĝis la studenta movado en Parizo, envolvis la tutan landon la strikado de la francaj laboristoj, kaj la movado de la francaj studentoj kaj laboristoj skuas la regadon de la monopola burĝaro. Ĉiam pli malstabila fariĝas la pozicio de la reakciaj regantoj de Francio. Sed, la reviziisma kliko de la Komunista Partio de Francio, kiu sin nomas "reprezentanto de laborista klaso kaj laboranta popolo", ĝismorte timas kaj malamas la revolucion aktivadon de la francaj revoluciaj amasoj. Ili babilaĉas ke la brava batalo de la laboristoj kaj studentoj estas "aventurisma agado" kaj ke ĝi "portos plej grandan malutilon al la revolucia movado". La ĉefoj de la franca reviziisma kliko kaj ĝia flava sindikato ankoraŭ urĝeme faras, laŭ la volo de la franca aŭtoritatularo, "intertrakton por relaboriĝo" kaj kolportas "interkonsenton" por relaboriĝo, intencante allogi la laboristojn relabori per multigo de kelkaj frankoj. Estas ja ne strange ke iu burĝara gazeto de Britio laŭdas la ĉefojn de la franca reviziisma kliko, ke ili estas "denaskaj aliancanoj de la franca registaro"!*

*Ankaŭ la renegata kliko de la sovetunia reviziismo ne volas resti ĉe la vosto. Ĝi senbride kalumniis la movadon de la francaj studentoj kiel "ribelan agadon" de "maldekstruloj" kaj "aventuristoj" kaj distrumpetis ke la franca monopola burĝaro faris "gravan cedon" dum la "triflanka intertraktado".*

*Prezidanto Maŭ diras: "En la mondo tute ne ekzistas senkaŭza amo nek senkaŭza malamo." La francaj kaj sovetuniaj reviziistoj ekstreme malamas kaj atakas la revolucion agadon de la francaj revoluciaj amasoj kaj plenenergie servas al reakcia reganta klaso. Tio montras nur ke ili estas bando da renegatoj kaj laboristaj perfiduloj de la kapo ĝis la piedoj! Per vivaj faktoj, la artikolo "Por Kiu Ili Parolas?" komplete bildigas la damnindajn vizaĝojn de la francaj kaj sovetuniaj reviziistoj.*

**La Red.**

## FARSO DE TIMULO

Laŭ informo de okcidenta novaĵagentejo: Antaŭ la pordego de Renault Aŭtomobila Fabriko de Parizo, svarmis ekscitiĝintaj, indignaj laboristoj kaj studentoj, kiuj faras intensan disputadon kun la ĉefoj de la ĝenerala sindikato de la franca reviziismo venintaj por malhelpi ilin en persista batalo. Dum la disputado, tiuj laboristaj perfiduloj timigitaj de la revolucia amasa movado faris multe da farsaĵoj kaj vekis malestimon ĉe la laboristoj kaj studentoj.

Inter la amasoj, iu studento de la Pariza Universitato faris kun unu el la ĉefoj de sindikato de la franca reviziismo dialogon, kiu bone klarigas la aferon:

"Ni devas tutforte daŭrigi la bataĵon," diris decideme la studento.

"Vi ne devas tiel agi," respondis la laborista perfidulo.

"Pro kio?" faris seriozan demandon la studento.

"Ĉar la laborista klaso devos ion pagi en la estonteco. Jen la kialo. ... Sciu ke vi provas

vian forton antaŭ la ŝtatpotenco. Vi timigas ĉiujn per viaj sloganoj." diris balbute la perfidulo.

Oni konis lin per liaj vortoj. La damninda vizaĝo de la perfidulo vive prezentigis antaŭ ni.

## BOJADO DE PORDHUNDO

Antaŭ nelonge, en la ĉirkaŭurbo de Parizo, aperis batalaj cirkuleroj alvokantaj okazigi "ribelan strikon". Tio ja timegis la renegatojn kaj laboristajn perfidulojn de la franca reviziismo. Ĝia *L'Humanité* urĝeme eljetis strangan artikolon titolitan *Antaŭgardu*. Kelkaj mallongaj linioj da vortoj vive desegnis la perfidulan vizaĝon de la franca reviziisma kliko. Jen vidu:

"Oni trovis cirkuleron proponantan okazigi 'ribelan strikon' en la antaŭurbo de Parizo. Sendube estas, ke tia alvoko farita ne de la sindikato kaj demokratiaj organizoj. Tio estas intrigo de provokantoj, kies celo estas doni pretekston al la registaro por fari subpremon. Laboristoj devas esti lertaj teni singardemon por frakasi tiajn intrigojn."

Ĉu la franca reviziisma kliko ne babilaĉas pri “subteno” al la laborista batalo? Sed, ĝi tiom timas kaj malamas la revolucion aktivadon de la laboristoj kaj studentoj, riproĉante la agadon kiel “intriĝon” kaj ilin kiel “provokantojn”, kaj ne volante kontentiĝi antaŭ ol ilin “frakasi”. Ĉu ne estas tute malkaŝita tia damninda vizaĝo de falsa subteno kaj vera perfido?


Reviziistoj estas pordhundoj de la burĝaro. La stranga artikolo *Antaŭgardu* celas ne tion ke la revolucia popolo “antaŭgardu” la detruadon kaj subpremado de la monopola burĝaro, sed fakte sugeston al la reganta kliko, ke ĝi “antaŭgardu” la revolucion aktivadon de la revoluciaj popoloj. Tiu ĉi stranga artikolo efektive nur estas freneza bojado de tiu pordhundo.

### LAMENTADO DE PERFIDULOJ

Dum sia raportado pri la demonstracio de la parizaj studentoj en nokto de la 23-a de majo, la *Pravda* de la sovetunia reviziismo unue malice riproĉis la parizajn studentojn “senbridaj”, kaj poste skribis: “Kaj sekve, en la Latin-distrikto okazis tragedio tiunokte: barikadoj, brulegoj, larmigaj gasbomboj, bastonoj de la policianoj kaj vundiĝo de kelkdek homoj.” Per nebulaj vortoj, tiu ĉi raportisto intencas konvinki la legantojn ke la studenta batalo estas “tragedio”.


Tamen, la fakto en tiu ĉi nokto estas: Maltimante la perfortan subpremon, dek mil parizaj studentoj okazigis grandan demonstracion kun alta batalvolo. Ili starigis barikadojn altajn je naŭ futoj kaj kondukis bravan luktadon kontraŭ la policianoj kiuj faras frenezan subpremado per bastonoj kaj larmigaj gasbomboj. Ili ankoraŭ bruligis kelkdek amasojn da fajregoj, kiuj lumigis batalan nokton de Parizo...

Ĉu tio estas ia “tragedio”? Ne! Tio estas dramo plena de sonoj kaj koloroj, potenco kaj imponeco, prezentita de la parizaj studentoj sur la historia scenejo.



*Forjetinte la francajn reviziistojn kaj flavajn sindikatojn, la franca laboristaro persistadis en sia heroa batalo. Jen laboristoj de Renault Aŭtomobila Fabriko kunvenas por diskuti pri la disvolviĝo de la movado kaj trovi ĝustan revolucionan vojon.*

**“Revolucio estas grandioza festotago por la ekspluatatoj kaj subprematoj.”** Tamen, la sovetuniaj reviziistoj ja rigardas ĝin kiel “tragedion”. Plene montriĝis la malĝojo de la perfiduloj timigitaj de la revolucia ŝtormo.



*En la nokto de la 23-a de majo, parizaj studentoj kaj laboristoj konstruis barikadon el fostoj sur la strato St. Michel kaj brave luktis kontraŭ armeanoj kaj policianoj.*

# Konfeso de Komplico

**Ĝ**USTE kiam la araba popolo akre kondamnas kun senkompara indigno la krimegon de la usona imperiismo kaj ĝia instrumento Izraelo, kiuj faris fojon post fojo agreson kontraŭ arabaj landoj, Podgornej, unu el la ĉefoj de la sovetunia reviziisma renegata kliko, senhonte kriaĉis: “En la problemo de la Meza Oriento mi ne volas disputi, kiu estas la agresanto. Tio ne estas la esenco de la problemo.”

En la okuloj de la araba popolo kaj la popoloj de la mondo, la esenco de la nuna problemo de la Meza Oriento estas tute klara. Tio estas, ke la usona imperiismo instigis Izraelon komenci agresan militon kontraŭ arabaj landoj en la 5-a de junio pasintjare, perforte okupi vastajn areojn de la teritorio de arabaj landoj, kaj daŭre apliki militan kaj politikan premon por plie devigi la arabajn landojn akcepti la kondiĉojn de kapitulaco kaj rekoni la plenumitan fakton de la usonaj kaj izraelaj agresantoj. La esenco de la problemo de la Meza Oriento estas demando de grava principo — demando de agreso kaj rezisto kontraŭ agreso.

Sed la sovetunia reviziisma renegata kliko, la komplico n-ro 1 de la usona imperiismo, intence neglektis la esencon de la problemo — kiu estas la agresanto kaj kiu estas la agresato. Podgornej diris: “La problemo estas, kiel ni povas eviti novan

militon. Troviĝas hodiaŭ efektive certaj elementoj de streĉiteco en la mondo. Tiuj elementoj detruos la homaron kaj la materiajn riĉfontojn, tiel ke ili ne povos esti utiligataj en paco.”

Tiu eldiro de Podgornej komplete malkovris la perfidulan starpunkton de la sovetunia reviziisma gvidanta kliko. Tio, al kio ili strebas, estas la realigo de ilia sonĝo pri “kunlaboro inter Usono kaj Sovetunio por superregi la mondon”, kaj tio, kion ili timas, estas la flamanta fajro de la popola revolucio en la Meza Oriento kaj aliaj lokoj. Podgornej kalumniis la kontraŭimperiismajn batalojn de la popoloj de tiuj regionoj kiel “elementojn de streĉiteco” kaj kiel unu el la “ĉefaj danĝeroj” kaj provas per ĉiuj rimedoj estingi la revoluciajn flamojn de tiuj regionoj kiel eble plej rapide.

Por atingi tiun malnoblan celon, Podgornej utiligis la okazon de akcepto de Edelman, brita parlamentano de la Labora Partio, por refoje kolporti la trompaĵon de “politika solvo” de la problemo de la Meza Oriento kune planitan de Usono kaj Sovetunio. Fojon post fojo li emfazis, ke la Meza Oriento estas “areo de granda streĉiteco”, ke “la araba popolo, kiu nombras cent milionojn, milite fariĝos iutage same forta kiel Izraelo”, kaj ke “se la krizo restas nesolvita, ĝia komplikeco pliiĝos”. Li plenforte distrumpetis,

*Laŭte kriante sloganojn, kiaj “Timemuloj estas la sovetuniaj reviziistoj!”  
“La sovetuniaj reviziistoj estas perfiduloj kontraŭ la araba popolo!”  
manifestacia kolono de la bagdada popolo puŝiĝas antaŭen al la sovetunia  
ambasadorejo en Irako por fari proteston.*

*Popolanoj de la sudana ĉefurbo manifest*



ke “la problemo de la Meza Oriento devas esti solvita politike”, kaj la metodo de solvo estas la “brita formulo” planita de Usono kaj Sovetunio en la Unuiĝintaj Nacioj, kiu fakte postulas la kompletan kapitulacion de la arabaj landoj al la usonaj kaj izraelaj agresantoj. Li senkaŝe diris: “Ni subtenas tiun rezolucion.” Kaj li energie propagandis, ke oni “faru ĝin efika”. Ĉi tie Podgornej malkaŝis la timon de la sovetunia reviziisma gvidanta kliko pri la vigla disvolviĝo de la kontraŭimperiisma batalo en la Meza Oriento kaj ilian malpaciencon en perfida forvendo de la araba popolo.

En la fino Podgornej resumis sian parolon jene: “Nia celo estas iri paŝo post paŝo al paciĝo (inter la Oriento kaj la Okcidento).” En la okuloj de la sovetunia reviziisma renegata kliko, la “paciĝo” kun la usonaj imperiistoj estas ĉio. Kiu estas agresanto kaj kiu estas la agresato — ĉio ĉi tio tute ne gravas kaj ne estas ia esenco de la problemo.

Dum la usona-izraela agreso en junio pasintjare, la sovetunia reviziisma kliko ludis la rolon de centprocenta perfidulo kaj servis kiel la komplico n-ro 1 de la usona imperiismo. Ĉiam pli kaj pli multaj el la araba popolo travidis la perfidan agadon de la sovetunia reviziisma kliko el la sanga leciono. La ĉi-foja parolo de Podgornej estas nova konfeso de la sovetunia reviziisma renegata kliko pri sia perfido al la agraba popolo.

La granda gvidanto Prezidanto Maŭ montris: **“La falso estas falso, kaj la masko devas esti deŝirita.”**

Per sia parolo kun la brita parlamentano de la Labora Partio, Podgornej fakte mem forigis tute sian maskon. Kio nun restas, estas la nuda vizaĝo de perfidulo.



*Manifestaciantaj popolanoj en la ĉefurbo de Jemeno indigne kriegas: “For la usonan imperiismon!” “For Izraelon!”*

*La siria popolo faris sinsekvajn grandskalajn manifestaciojn por oponi kontraŭ la agreso de Usono, Britio kaj Izraelo.*



*traŭ la armita agreso de Usono-Izraelo.*

# Vero pri la Kultura Revolucio

SOVETUNIA GRUPO "STALIN"

*Grupo "Stalin", revolucia organizo en Sovetunio, kiu staras kontraŭ la ĥruŝĉova reviziisma kliko, distribuis antaŭnelonge artikolon titolitan "Vero pri la Kultura Revolucio". La artikolo ekstreme varme laŭdas la grandan proletaran kulturalan revolucion en Ĉinio, iniciatitan kaj gvidatan persone de Prezidanto Maŭ, kaj akre kondamnas la krimojn de la sovetunia reviziisma renegata kliko, kiu efektivigas restaŭron de kapitalismo en Sovetunio kaj ĉinike kalumnias la grandan proletaran kulturalan revolucion en Ĉinio. Ĝi spegulas la heroismon de la sovetunia proletaro kaj ĝian firman decidemon por fari proletaran revolucion.*

*Ĉi tie ni publikigas resumon de tiu ĉi artikolo.*

## **KLASOJ KAJ KLASA Batalo EKZISTAS DUM LA TUTA HISTORIA PERIODO DE LA DIKTATURO DE LA PROLETARO**

La artikolo diras, ke la epoko de la diktaturo de la proletaro estas epoko de persista kaj akra klasbatalo, batalo inter la du vojoj, vojoj proletara kaj burĝara. Restaŭro kaj batalo kontraŭ restaŭro estas la ĉefa enhavo de la klasbatalo en la tuta historia periodo de la diktaturo de la proletaro, en la periodo de transiro de kapitalismo al komunismo.

La artikolo montras, ke en socialisma lando povas okazi restaŭro de kapitalismo laŭ jenaj tri vojoj:

Unue, antaŭ la fina venko de socialismo estas ankoraŭ eble por la renversitaj, sed ne likviditaj, ekspluatataj klasoj rekapti la regpotencon.

Due, restaŭro eble aperas kiel la rezulto de imperiisma agreso.

Trie, tra la vojo de paca evoluo.

Batali kontraŭ la du unuaj vojoj de restaŭro estas multe pli facile, ĉar en ambaŭ okazoj ni havas antaŭ ni tute difinitan kaj klare videblan malamikon, kaj ni scias ekzakte kien direkti la baton. Alia afero estas tamen paca evoluo. Tio estas la plej danĝera kaj insida vojo.

Kial paca evoluo estas aparte danĝera por la laborista klaso kaj la tuta laboranta popolo?

1. Ĉar ni estas traktantaj maskitan malamikon, kiu troviĝas en niaj vicoj kaj sin ŝirmas per niaj sloganoj; estas ekstreme malfacile lin trovi;

2. Ĉar la minacon de paca evoluo oni kutime ne sufiĉe taksas.

La artikolo diras, ke paca evoluo estas grado-post-grada ŝanĝo de la karaktero kaj esenco de socialisma ŝtato kaj komunista partio kaŭze de degenero de la partia kaj ŝtata gvidantaro. La fina rezulto de paca evoluo estas la restaŭro de kapitalismo.

## **KIAL EKZISTAS LA DANĜERO DE PACA EVOLUO EN SOCIALISMAJ LANDOJ?**

La artikolo montras ke, se la proletaro povas superi la burĝaron politike kaj ekonomie en kompare mallonga historia periodo, la batalo en ideologia kampo, tamen, daŭros tre tre longan tempon. Kial? Ĉar ĝi tuŝas la vivan animon de homoj. Novaj socialismaj ideoj, moroj, kutimoj tute ne povas okupi regantan pozicion tuj post la ŝanĝoj en politiko kaj ekonomio; por tion atingi necesas sufiĉe longa tempo, kaj tiom pli en parolo pri plena venko. Krom tio, aldoniĝas ĉi tie la korupta influo de kapitalisma sieĝo. Tiu malamika ideologio nin oponanta kulturamas senprincipecon, kontraŭkomunisman, burĝaran individuismen, la psikon de privata posedanteco, monavidon, naciismon, ŝovinisman, kosmopolitisman, burĝaran moralon

kaj similajn. El la influo de tiu ideologio en niaj landoj rezultiĝas la degenerado kaj burĝariĝo de niaj homoj. En mallonga diro, en nia socio kaj aliaj socialismaj landoj troviĝas sufiĉe da personoj infektitaj de burĝara ideologio: degenerintoj, karieristoj, “komunismaj” oficistoj, burokratoj, homoj zorgantaj sole pri sia persona prospero, monaviduloj kaj rekte kontraŭsocialismaj malamikaj elementoj. Similaj elementoj neeviteble penetras en la Partion (ankaŭ en ĝian gvidantaron), ĉar antaŭ ĉio la Partio estas la reganta partio. Tiuj homoj objektivite estas la agentoj de enlandaj burĝaraj elementoj, restaĵoj de la ekspluataj klasoj kaj internacia imperiismo. Se ilia dangereco ne estas eliminata, do en difinita momento formiĝos la ebleco de ilia uzurpo de la potenco en la Partio kaj ŝtato.

### **FRENEZA OPONO DE SOVETUNIA ĤRUŜĈOVA RENEGATA KLIKO KONTRAŬ STALIN SERVAS AL ĜIA KRIMA CELO UZURPI LA POTENCON DE LA PARTIO KAJ ŜTATO DE SOVETUNIO**

La artikolo diras, ke la uzurpo de potenco fare de Ĥruŝĉov kaj liaj komplicoj komenciĝis post la morto de I. V. Stalin. Post lia morto, la degenerintoj disvolvis furiozan bataladon por uzurpi potencon en la Partio kaj ŝtato. Kiam ili vidis finfine la eblecon kapti la potencon, ili klopodis forpuŝi el la gvidantaro marksism-leninisman kernon, kompromitante ĝin. Ĝuste por tion efektivigi, ili elmetis la miton pri la t.n. “persona kulto”. Tiu mito celis subfosi kaj poste elpuŝi la bolŝevikan kernon de nia partio kaj krei kondiĉojn por an-

*Angulo de sovetunia libera foiro sur la bordo de la Nigra Maro. La t. n. “komunisma konstruado” de la sovetunia gvidanta kliko estas centprocenta mensogo, kaj ĝisfunda restaŭro de kapitalismo estas ilia politiko de la ŝtato kaj partio.*



stataŭi la proletaran linion de Lenin-Stalin per nova linio — linio degenera kaj reviziisma.

### **LA UZURPADO DE POTENCO FARE DE REVIZIISTOJ KOMENCIĜIS PER FABRIKO KAJ PREPARO DE PUBLIKA OPINIO**

La artikolo diras, ke la konspira aktivado de la reviziistoj por uzurpi potencon kaj la paca evoluo komenciĝis en la sferoj de ideologio kaj kulturo kaj per fabriko kaj preparo de publika opinio.

Ili “laboris” laŭ tri linioj:

1. La t. n. “batalo kontraŭ la antaŭaj eraroj” — rifuzo de “malnova” ideologio (marksism-leninismo);

2. La t. n. “kreiva disvolvo de marksism-leninismo” — kreo de “nova” ideologio;

3. Kulturo de burĝara ideologio en literaturo, arto kaj ĉiutaga vivo — apartigo de la laborista klaso kaj la tuta laboranta popolo disde politiko, kaj kulturo de avidemo al mono kaj personaj profitoj.

En mallonga diro, ili komencis per anstataŭigo de proletara ideologio per la burĝara.

Post detala ekzameno de la problemo pri la ebleco de restaŭro de kapitalismo ni konstatis, ke post la fondiĝo kaj solidiĝo de la nova sistemo, la ĉefa danĝero en socialismaj landoj estas paca evoluo; ke paca evoluo estas efektivigata de la degenerintoj, kiuj uzurpis la partian kaj ŝtatan gvidantecon, kaj la malamikoj de la laboranta popolo; kaj ke la uzurpo de potenco fare de reviziistoj kaj paca evoluo komenciĝas en la ideologio kaj kulturo kaj per fabriko kaj preparo de publika opinio.

Serio da problemoj, inkluzive tiun pri la batalo kontraŭ reviziisma renegata kliko, aparte akre prezentiĝis antaŭ la internacia proletaro kaj la komunisma movado, post kiam la reviziistoj uzurpis potencon en la unua socialisma lando Sovetunio kaj en serio da aliaj landoj.

La artikolo akcentas, ke respondojn al tiuj problemoj donis la teorio pri la granda proletara kultura revolucio elmetita de kamarado Maŭ Zedong.

## BAZAJ TEZOJ DE LA TEORIO DE PREZIDANTO MAŬ PRI LA GRANDA PROLETARA KULTURA REVOLUCIO

La artikolo montras, ke la granda proletara kultura revolucio estas firma ofensivo kontraŭ la burĝaro kaj ĝiaj agentoj en ideologia fronto. Ĝia tasko estas frakasi la burĝaron ankaŭ en ideologio, krom en politiko kaj ekonomio.

La strategia celo de la granda proletara kultura revolucio estas likvidi la minacon de restaŭro de kapitalismo, likvidi la eblecon de paca evoluo en socialisma lando, defendi kaj firmigi la diktaturon de la proletaro.

La taskoj, kiujn alfrontas la granda proletara kultura revolucio, aŭ alivorte, la konkretaj vojoj por atingi la strategian celon, povas esti resumitaj jene:

Malkaŝi, severe kritiki kaj izoli la degenerintojn kaj karieristojn, kiuj enrampis en la Partion; kaj elpurigi el la Partio hazardajn kaj pasivajn elementojn;

Konstrui la ŝtatan kaj partian aparaton en tiun liberigitan de burokratismo kaj havantan maksimume proksiman kontakton kun la popolo;

Likvidi la pensfluojn de la burĝaro en la ideologio kaj kulturo, deklari militon kontraŭ la burĝaraj ideologio, moroj kaj kutimoj kaj malpermesi ilian enfluan el eksterlando, akceli pluan floradon kaj disvolviĝon de niaj proletaraj ideologio kaj kulturo, ĉiam kaj ĉie propagandi kaj disvastigi marksism-leninismon;

Maksimume disvolvi la politikan aktivecon de la vastaj popolamasoj kaj altiri la amasojn al preno de decida kaj sistema parto en ĉiuj aferoj de la ŝtato;

Eduki novan generacion da ŝtalaj komunistoj kaj kulturi la junularon por daŭrigi la revolucion dum la irado de tiu batalo.

### AMASLINIO — METODO DE LA GRANDA PROLETARA KULTURA REVOLUCIO

Kiel efektiviĝi tiujn taskojn? Per kia metodo oni povos atingi ilian plenumon? Tiu metodo, metodo de la granda proletara kultura revolucio, estas amaslinio.

Tiu revolucio vekis kaj movis la treege vastajn popolamasojn; ĝi montris al la popolo, ke politiko estas afero ne nur de gvidantoj, kiel la reviziistoj kaj degenerintoj klopodas sugesti, sed ankaŭ

de la popolo — afero de unua graveco, rekte koncernanta la popolon. Tiu revolucio montris ke, kiuj povas plej bone kaj ĝisfunde malkaŝi la degenerintojn, karieristojn kaj malamikojn de la popolo, estas ĝuste la amasoj, kaj ke ĝuste la amasoj devas juĝi, kiu el la gvidantoj estas malbona kaj kiu bona, kiu estas amiko kaj kiu malamiko de laborista klaso kaj la tuta laboranta popolo. En mallonga diro, nur la amasoj gvidataj de bolŝevikoj kapablas elradiki kaj likvidi burĝaran linion; nur sinapogante sur la amasoj kaj pere de la agado de la amasoj, oni povas plenumi la grandiozajn taskojn de la granda proletara kultura revolucio kaj realigi ĝian celon — preventi la restaŭron de kapitalismo.

La granda proletara kultura revolucio estas la daŭrigo kaj disvolviĝo de la universala vojo de la Oktobra Revolucio, estas la leĝo de la socialisma revolucio kaj socialisma konstruo. Ĉiuj landoj sub la diktaturo de la proletaro neeviteble trapasos tiun ĉi fazon de socialisma revolucio.

En mallonga diro, la granda proletara kultura revolucio, unueca laŭ klasa enhavo sed malsama laŭ nacia formo, estas ĝenerala leĝo de marksism-leninismo.

### KONDAMNO AL SOVETUNIA REVIZIISMA GVIDANTA KLIKO FALSANTA KAJ KALUMNIANTA LA GRANDAN PROLETARAN KULTURAN REVOLUCION DE ĈINIO

La artikolo diras, ke la sovetunia popolo deziras scii la veron pri la eventoj en Ĉinio. Sed la sovetunia oficiala propagando ĉiumaniere falsas la veran staton de Ĉinio, aplikante por tio ĉiajn rimedojn. En tiu kalumnia kampanjo, la sovetunia gazetaro egale uzas kiel siajn “proprajn” materialojn tiel ankaŭ materialojn de burĝaraj novaĝ-agentoj. Tiu fakto mem diras pri la identeco de la interesoj de sovetunia propagando kaj de la burĝara. Krom tio, “informoj” de la burĝara gazetaro aspektas pli “modestaj” kaj “objektivaj” ol la senbridaj artikoloj en *Pravda* kaj aliaj oficialaj organoj. Ĝuste pro tio la burĝara propagando diras, ke Sovetunio liveras la plej bonan materialon por ĝia celo! Kaj tio vere estas la “plej bona”, plej kompleta kaj plej sistema kolekto de ĉiuj kalumnioj kontraŭ Ĉinio, disvastigataj de la malamikoj de la popola Ĉinio, la Komunista Partio de Ĉinio kaj la granda proletara kultura revolucio. Ĝuste pro tio la tasko malkaŝi tiun kalumniadon kontraŭ Ĉinio fariĝas urĝa kaj necesa por ĉiuj, kiuj estas fidelaj al Lenin kaj Stalin kaj volas batali kontraŭ degenerado.



La artikolo montras, ke ĉiu batalo estas batalo por regpotenco. Neniu povas nei, ke en tiu batalo partoprenas la tuta Partio kaj la tuta popolo de Ĉinio — tio estas batalo de laborulaj amasoj. Tio signifas, ke la kultura revolucio de Ĉinio ne estas persona kverelo, sed principa batalo, batalo por la interesoj de la tuta Partio, de la tuta popolo.

### LA GRANDA KULTURA REVOLUCIO ESTAS PRINCIPA BATALO KONDUKATA DE LA ĈINAJ BOLŜEVIKOJ ESTRATAJ DE KAMARADO MAŬ ZEDONG KONTRAŬ LA OPOR- TUNISMA ALO DE LA PARTIO

Tiu batalo estas la logika daŭrigo kaj rezulto de la longdaŭra batalo de KPĈ kontraŭ la reviziistoj de Ĥruŝĉova tipo. La sovetuniaj reviziistoj-politikistaĉoj disvastigas mensogon, ke la depreno de potenco el la manoj de la oportunistoj fare de la amasoj sub la gvido de la bolŝevika kerno de KPĈ estas senprincipa kverelo inter grupoj. Tiu mensogo diskreditas la batalon de la popolo kaj la Komunista Partio de Ĉinio kaj tiel subtenas iliajn malamikojn. Tio estas nuda propagando kontraŭ Ĉinio kaj kontraŭ komunismo.

Malkaŝante la senbazan babilaĵon de la sovetuniaj reviziistoj, ke “la laborista klaso de Ĉinio ne subtenas la kulturalan revolucion”, kaj malkaŝante ilian kalumnion kontraŭ la junularo de Ĉinio, la artikolo akcentas: La faktoj mem, ke la laboristoj prenis en siajn proprajn manojn la administradon de la entreprenoj, ke la laboristoj formas la spinon de la novaj gvidaj organoj de la Partio kaj ŝtato, kaj ke la laboristoj estas la avangardo de la kultura revolucio, jam refutas tiun malican mensogon.

La partopreno de la ĉinaj junuloj en la granda kultura revolucio estas tre grava por ili mem, kiuj ricevis la batalan hardiĝon en la forno de la kultura revolucio. Tia hardiĝo provizis ilin per valora sperto de praktika batalo, per tio pliiĝis ilian komunisman spiriton kaj fariĝis la plej bona rimedo por forĝi novan generacion de batalantoj, kiu venos al la laborvico de la malnova generacio de la ĉinaj bolŝevikoj. Tia hardado provizis la Partion per fidindaj kaj neelĉerpeblaj rezervoj, nome junuloj.

Malkaŝante la kalumnion de la sovetuniaj reviziistoj kontraŭ la Ĉina Popola Liberiga Armeo, la artikolo montras, ke ĈPLA fakte ludas grandan rolon en la granda proletara kultura revolucio. En la artikolo estas dirite: Kio estas PLA de Ĉinio?



*La statuo “Patrino en Sufero”, kiu estas konsistiga parto de la t. n. “Monumento al la Herooj” starigita de la sovetunia renegata kliko por memori la stalingradan kampanjon, eĉ prezentis la heroojn de la stalingrada kampanjo per griza figuro, ke tenante sian mortintan fileton patrino larmas kun klinita kapo kaj ne volas daŭrigi sian vivon pro doloro. Tio ĉi ja estas ekstreme forta insulto al la herooj kaj fera atesto pri la perfido de la sovetunia reviziisma renegata kliko!*

Ĝi konsistas el laboristoj kaj kampanoj, sed la plej disciplinitaj, plej kleraj kaj plej ideriĉaj armitaj laboristoj kaj kampanoj.

En la artikolo estas refutita ankaŭ la malnobla kalumnio disvastigata de la sovetuniaj reviziistoj, ke la granda proletara kultura revolucio en Ĉinio estas “direktata kontraŭ KPĈ”.

La artikolo montras, ke la kulturalan revolucion partoprenas la plej vastaj popolamasoj kune kun la Partio, tio neniom difektas la prestiĝon de KPĈ, ĉar la amasoj agadas strikte sub la gvido de la Partio kaj laŭ ĝiaj instrukcioj. La partopreno de la popolamasoj en la batalo kontraŭ la degenerado kaj oportunismo de la burĝaro povas nur bolŝevikigi la amasojn, unuigi ilin ĉirkaŭ la marksisma kerno de la Partio kaj kulturi ilin en la spirito de komunismo kaj de revolucia praktiko, t.e. transformi ilin en potencon rezervan forton de la Partio.

La amasoj aktive batalas por la afero de la Partio sub la gvido de la Partio de Maŭ Zedong; tio pruvas la maturecon de KPĈ, la ĝustecon de

ĝia politiko kaj la grandan unuiĝon inter la Partio de Ĉinio kaj ĝia popolo. KPĈ estas forta ĝuste pro la subteno de la amasoj — tion konvinke pravas la kultura revolucio.

La artikolo montras, ke precize tiuj, kiuj babilacas nun pri la “frakasigo” de KPĈ, subtenas la kontraŭrevoluciajn reviziistojn en la vicoj de KPĈ kaj instigas ilin oponi kontraŭ KPĈ kaj ĝia linio.

Kio estas mirinda en tio, ke la degenerintoj en Sovetunio kaj la burĝaro de la Okcidento kompatas siajn malvenkintajn amikojn?

Estus strange, se la bolŝevikoj kompatas siajn malamikojn.

### **SOVETUNIA REVIZIISMA RENEGATA KLIKO ESTAS MALAMIKO DE SOVETUNIA POPOLO; NECESAS FARI GRANDAN PROLETARAN KULTURAN REVOLUCION EN SOVETUNIO**

Refutante la kalumnion de la sovetunia reviziisma gvidanta kliko, ke la granda proletara kultura revolucio en Ĉinio estas “direktata kontraŭ Sovetunio, kontraŭ la popolo de Sovetunio”, la artikolo demandas: Ĉu ne estas en la interesoj de la sovetunia popolo la batalo kontraŭ oportunismo en Ĉinio? Sendube, tio estas en la interesoj de la sovetunia popolo. Tio tamen ne estas en la

*En iu lernejo de la Uzbeka Respubliko de Sovetunio montriĝas plakato odoranta per ranca burĝara individuismo. Ĝi surhavas la rusan skribaĵon “Ĉiam Estu Mi” kaj ekstreme forte venenas la sovetunian popolon kaj ĝian junan generacion.*



interesoj de la sovetunia “gvidantaro” — tion oni povas konstati el la gazetaro de Sovetunio — ĉar la sovetunia gvidantaro timas, ke la komunistoj kaj la laborista klaso de Ĉinio infektos la laboristan klason kaj tutan laborantan popolon de Sovetunio per sia volo de batalo kontraŭ oportunismo kaj degenerado. Tio ne estas en la interesoj de la sovetunia gvidantaro, ĉar ekde la tempo de Ĥruŝĉov ĝi mem jam estas degenerinta, ĝi sekvas oportunisman linion kaj pro tio estas bazo por ĉiuj oportunismaj elementoj, kiaj la jugoslavaj reviziistoj aŭ la ĉina opozicio, obstaklo por revoluciaj movadoj de la mondo, kaj parazita tubero sur la laborista klaso kaj laboruloj-kampanoj de Sovetunio. Jen pro kio la sovetunia oficiala propagando verŝas torentojn da mensogoj kaj kalumnioj al KPĈ kaj ĝiaj gvidantoj.

La artikolo diras, ke atentinda estas la “speciala metodo” de la sovetunia propagando. Ĝi konsistas el silento pri la fundamentaj, principaj malkonkordoj inter KPĈ kaj KPSU, por tiel atingi la fundamentan celon de la sovetuniaj politikistaĉoj — trompi la laborantajn popolojn de Sovetunio kaj aliaj socialismaj landoj kaj trompi la komunistojn de la tuta mondo.

La sovetuniaj “politikistoj” klare scias, ke permesi al la laboranta popolo de Sovetunio mem analizi la malkonkordojn neeviteble kondukos al ilia senmaskiĝo kaj al la penso pri neceseco de batalo kontraŭ la altrangaj degenerintoj en Sovetunio — kaj tion ili timas.

La gvidantoj kaj partoprenantoj de la kultura revolucio nur oponas kontraŭ la degenerintoj en Sovetunio — tiaj estas ĝuste la superaj gvidantoj de Sovetunio — sed ne kontraŭ la sovetunia popolo.

Ĉiuj kulpigoj kontraŭ la kultura revolucio faritaj de la sovetuniaj reviziistoj-politikistaĉoj estas mensogoj; ili penas atingi la celon trompi la laboristan klason de Sovetunio kaj la tuta mondo.

La malica kampanjo kontraŭ Ĉinio montras, ke la sovetuniaj degenerintoj timas perdi siajn privilegiojn kaj potencon kaj timas sian popolon; tiu kampanjo unuigas ilin kun la plej reakciaj rondoj de la monda kapitalismo, kaj montras la identecon de iliaj interesoj.

La kampanjo de la sovetuniaj reviziistoj kontraŭ Ĉinio malkaŝis siajn iniciatintojn kaj pravas la urĝan necesecon likvidi la reĝimon de la degenerintoj (nova burĝaro) en Sovetunio, t. e., la necesecon fari en Sovetunio proletaran kulturen revolucion.

*(La subtitoloj estas niaj — la Red.)*

# Ĉinio Iras Novan Vojon en Ŝtalproduktado

**L**A granda proletara kultura revolucio akcelis la revoluciigon en la penso de la ŝtallaboristoj de Ĉinio kaj alportis gravan sukceson en nia ferŝtala industrio. Ĉinio nun produktas ĉiam pli multe da ordinara malalt-aloja ŝtalo anstataŭ karbon-ŝtalo, kiu iam estis rigardata kiel la plej bona el la diversaj specoj de ŝtalo.

Ĉinio nun produktas dudekoble pli multe da ordinara malalt-aloja ŝtalo, ol antaŭ la komenco de la kultura revolucio. Multaj specoj de malalt-aloja ŝtalo, produktataj el krudaj materialoj troveblaj en Ĉinio, jam estas uzataj en fabrikado de lokomotivoj, ŝipoj, motorcikloj, traktoroj, elektrejoj ekipaĵoj, pontoj kaj aliaj. Ekipaĵoj faritaj el tia alojo estas pli solidaj, malpezaj kaj daŭremaj.

Karbon-ŝtalo, kiu okupas pli ol 90 procentojn de la totala ŝtalproduktado en la kapitalisma mondo, estas peza, rompiĝema kaj korodiĝema. Malalt-aloja ŝtalo ne havas tiujn mankojn. La "Liberigo"-kamionoj faritaj de Ĉinio el tia alojo povas porti pli pezan ŝarĝon ol kamionoj kun la sama pezo produktitaj en aliaj landoj. La pezo de ekipaĵo por fabriki sintezan amonion reduktiĝis je triono, dank' al uzo de tia metalo. Reloj el malalt-aloja ŝtalo havas vivdaŭron duoble tiom longan kiom karbon-ŝtalaj reloj.

La produkto de malalt-aloja ŝtalo en nia lando estas frukto de la intensa batalo en la scienca kaj teknika kampoj inter la socialisma kaj la kapitalisma vojoj kaj inter la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ kaj la burĝara reaktiva linio antaŭenpuŝita de la ĉina Ĥruŝĉov.

En la pasinta jarcento, karbon-ŝtalo okupis tre gravan lokon en la metalurgia industrio de la kapitalismaj landoj. Ĉu ankaŭ Ĉinio devas strikte observi tiun leĝon? Prezidanto Maŭ instruas: "Ni pledas por sinapogo sur propraj fortoj." Laŭ la instrukcio de Prezidanto Maŭ, la ĉina laboristaro iras sian propran vojon en disvolvado de industrio. Sed, la ĉina Ĥruŝĉov kaj liaj agentoj en la ferŝtala industrio insistis, ke la ĉinaj ferŝtalaj entreprenoj nepre devas funkcii laŭ la reguloj

starigitaj de fremdlandaj produktantoj, kaj ili faris ĉion eblan por strangoli la revolucian, kreivan spiriton de la laboristoj.

En 1958 kaj poste, la revoluciaj laboristoj de Anŝan kaj Ŝanhajo sukcesis produkti nombron da novaj specoj de aloja ŝtalo. Malgraŭ tiuj novaj specoj trovis varman akcepton ĉe industriaj entreprenoj, plenmano da potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon malhelpis ilian produktadon. Ĝis la fino de 1965, nur malmultaj specoj de ordinara malalt-aloja ŝtalo estis produktataj, kaj ilia produktokvanto okupis nur ĉirkaŭ centonon de la tutlanda totala produktokvanto de ŝtalo.

La granda proletara kultura revolucio eksplodis kvazaŭ printempa tondro, kaj la ŝtallaboristoj, armitaj per la penso de Maŭ Zedong, renversis la potenctenantojn irantajn la kapitalisman vojon, kritikis la reviziisman linion de ili praktikatan kaj komencis grandskale disvolvi la produkton de ordinara malalt-aloja ŝtalo.

Multaj ŝtalfabrikoj, grandaj kaj malgrandaj, lernejoj kaj sciencaj institutoj ĉiuj klopodis por solvi teknikajn problemojn en produktado de ordinara malalt-aloja ŝtalo kaj tre rapide formiĝis amasa movado.

En la Ŝanhaja Ferŝtala Fabriko N-ro 3, la laboristoj rigardas la produkton de ordinara malalt-aloja ŝtalo kiel revolucian batalon por defendi la proletaran revolucian linion de Prezidanto Maŭ kaj oponi imperiismon kaj reviziismon. En la pasintaj du jaroj, ili sukcesis produkti ok specojn de tia ŝtalo kaj komencis ilin produkti grandskale. La produktokvanto de ordinara malalt-aloja ŝtalo nun konsistigas 20 procentojn de la totala produktokvanto de tiu ĉi fabriko.

Alia ferŝtala fabriko sukcesis produkti pli ol dek novajn specojn de tia ŝtalo, dank' al kunlaboro de la gvidantaj kadroj, la teknikistoj kaj la laboristoj, kun la lastaj kiel la ĉefa forto. Inter tiuj la regule produktataj kaj aplikataj specoj estas bonvenigataj de fervojoj kaj aliaj komunikaj entreprenoj.

# Ĉinio Konstruis Sian Unuan Instalajon por Produkto de Metilalkoholo


**D**UM la granda proletara kultura revolucio, la vastaj amasoj de revoluciaj laboristoj kaj oficistoj de Vuging-a Kemia Fabriko en Ŝanhajo, disvolvante la revolucionan spiriton de sinapogo sur la propra forto, sukcesis konstrui en nia lando la unuan instalajon por produkto de metilalkoholo kun nova progresinta nivelo, projektitan, konstruitan kaj instalitan de ni mem.

La metilalkoholo estas grava materialo por fabriki insektmortigilon, medikamenton, plaston, sintezajn fibrojn, tinkturon kaj aliajn produktaĵojn. Sekve la disvolvo de la produkto de metilalkoho-

lo estas grava ĉenero por plifortigi la konstruadon de nia kemia industrio. Dum projektado, la junaj, energiplenaj laboristoj kaj teknikistoj, sekvan- te la instruon de Prezidanto Maŭ “**la homaro ĉiam devas konstante resumi sperton kaj fari novajn el- trovojn, novajn inventojn, novajn kreojn kaj novajn progresojn**”, decidis apliki novan teknikon, inven- titan de Ĉinio. Sed, iuj proponis, ke la insta- laĵo estu konstruata laŭ projekto el eksterlando, kaj opiniis, ke tio estas “mallongigo de la vojo” kaj “alportos rezulton rapide kaj certe”. La junaj laboristoj kaj teknikistoj opiniis, ke laŭ la eks- terlanda projekto la teknologia procedo estas tre

longdaŭra, la instalaĵo konsistas el multaj partoj cetere sufiĉe grandaj, kun komplika strukturo, kaj tial ĝi fakte estas vojo, kiu donas rezulton malmultan, malrapidan, malbonan kaj malekonomian. Dume por projekti laŭ nia nova tekniko, kvankam oni alfrontos pli grandajn malfacilojn, ta- men la teknologia procedo estas pro- gresinta, la instalaĵo konsistos el mal- pli multe da partoj cetere malgran- daj, la fabrikado estos pli facila, kaj la produkta kapablo estos pli granda. Tio do estas vojo kiu konformas al la penso de Maŭ Zedong kaj donas re- zulton multan, rapidan, bonan kaj eko- nomian. La decido de la junaj labo- ristoj kaj teknikistoj sinapogi sur la propra forto trovis subtenon ĉe la vas- taj amasoj de revoluciaj laboristoj kaj oficistoj. Do komencis glate disvolviĝi la laboro de projektado.

*La unua kompleto de ekipaĵoj por produkto de metilalkoholo en nia lando, projektita, konstruita kaj instalita de la Vuging-a Kemia Fabriko en Ŝanhajo.*



Laŭ la instruoj de longe donitaj de Prezidanto Maŭ, ke strategie oni devas malestimi malfacilojn sed taktike oni devas serioze trakti ilin, kaj ke oni devas havi altan laborfervoron kaj ankaŭ scien- can spiriton de analizo, la pli ol dudek laboristoj, junaj teknikistoj kaj revoluciaj kadroj, al kiuj estis taskita la projektado de tiu instalaĵo, multfoje iris en apartaj grupoj al malnovaj fabrikoj en aliaj lokoj por enketi kaj esplori. Ili humile lernis de ties revoluciaj laboristoj kaj oficistoj, kiuj havas plej riĉan praktikan sperton, kaj vaste petis de la amasoj konsilojn kaj proponojn koncerne al ilia projekto kaj reviziis ĝin fojo post fojo. Ili studis verkojn de Prezidanto Maŭ kun siaj demandoj kaj petis konsilojn de la frataj fabrikoj. Fine ili perfektigis sian projekton paŝo post paŝo.

Dum la projektado, konstruado kaj instalado de tiu ĉi instalaĵo, multaj koncernaj fabrikoj kaj revoluciaj instruistoj kaj studentoj de alt-lernejoj en Ŝanhajo kaj tra la tuta lando fervore donis sian subtenon, kaj parto el ili rekte partoprenis la projektadon. La revoluciaj laboristoj kaj oficistoj de la diversaj laborejoj de la Fabriko mem konkeris diversajn malfacilojn kaj konstruis pli ol 80% de la tuta instalaĵo. Iu malgranda fabriko sub frata entrepreno faris por tiu instalaĵo grandan gastenujon, kaj per tio kontentigis la bezonon de la produktado. Tiamaniere la tasko de projektado, ekipado kaj instalado estis venke plenumita, kaj la prova funkciigo de la instalaĵo sukcesis en sola fojo. Metilalkoholo kun alta pureco estas produktata por kontentigi la bezonojn de Ŝanhajo kaj koncernaj institucioj.

# *Verda Pino sur Phoukien-monto*

— *Pri la brava gerilano Tong Phieng*

**L**A popola milito de la patriotaj armeanoj kaj popolanoj de Laoso kontraŭ la usona imperiismo kaj ĝiaj lakeoj elhardis milojn kaj dekmi- lojn da eminentaj popolaj batalantoj, kaj la gerilano Tong Phieng en Phoukien-distrikto, Samneua- provinco, estas unu el ili.

## **BATALVOLO STIMULATA DE PROFUNDA MALAMO**

La majeste staranta Phoukien-monto situas en Bannakien-distrikto de Muongsoi-gubernio, Sam- neua-provinco. Tie naskiĝis kaj plenkreskiĝis Tong Phieng. Li fariĝis orfo en sia infanaĝo kaj komencis ĉasadi kun sia onklo kiam li estis 11-jara. Li travadis Phoukien-monton, bone konis ĉiun arbon sur ĝi kaj baldaŭ fariĝis eminenta ĉasisto.

Iutage, malamikoj invadis lian hejmvilaĝon, per- forte soldatigis virojn kaj kruele buĉis liajn patrio- tajn samlandanojn. Ĉio ĉi tio kaŭzis en li pro- fundan malamon kontraŭ la malamikoj.

Por venĝi siajn samlokanojn, li aliĝis al la Popola Liberiga Armeo de Laoso. Dank' al poli- tika lernado en la armeo, plialtiĝis lia klasa kon-

scio. Li komprenis, ke la laosa popolo havos eliron, nur se ĝi persistos en armita batalo kaj ekstermos la usonan imperiismon kaj ĝiajn lakeojn. Kun ob- stina persistemo li trejniis sin por lertiĝi en ekster- mado de malamikoj.

Baldaŭ poste, li fariĝis subplotonestro, gvidis siajn batalantojn kun granda sukceso kaj bonege plenumis siajn taskojn de laboro kaj batalo.

Je la fino de 1963, eksplodis en Bantac-distrikto batalo, en kiu unuafoje partoprenis Tong Phieng. En tiu batalo, li brave kaj sagace frakasis, kun ok batalantoj sub sia gvido, la “balaadon” lanĉitan de pli ol 50 malamikoj. Kaj poste li partoprenis plurajn batalojn kaj ekstermis aron post aro da malamikoj.

## **MOBILIZI LA AMASOJN POR FORMI BRONZAN MUREGON**

En 1964, Tong Phieng ricevis novan taskon kaj revenis al sia hejmloko por organizi gerilan taĉ- menton en Phoukien-distrikto kaj konduki gerilan militadon. Plena de revolucia entuziasmo, li unuiĝis kun la popolo tuj post reveno al la hejmloko, tiel

fervore okupiĝis pri propagandado, edukado kaj organizado, ke li eĉ ofte forgesis dormi kaj manĝi. Li mobilizis la amasojn, rapide sukcesis organizi gerilan taĉmenton kaj disvolvis geriladon en la hejmloko.

Iun tagon, la malamiko lanĉis frenezan “balaadon” al Muongsoi-gubernio kun intenco estingi la vigle disvolviĝantan geriladon en tiu loko. Tong Phieng interkonsiliĝis kun siaj kamaradoj pri plano por kontraŭbatali la “balaadon”, kaj faris ĉiujn necesajn preparojn. Kiam la muse timemaj malamikoj palpe alproksimiĝis, Tong Phieng aplombe komandis sian gerilan taĉmenton ŝuti venĝemajn kuglojn kaj mangrenadojn sur la malamikojn tiel ke la lastaj devis pagi per multaj vundoj kaj mortoj por ĉiu antaŭenpaŝo. Profitante la timon de la malamikoj pri morto kaj ties ne bonan konon pri la tereno, la gerilanoj forte batis ilin, ekstermis grandan nombron da ili kaj akiris brilan venkon en tiu kontraŭbalaada batalo.

### **FIRME STARAS PHOUKIEN-MONTO KAJ POR ĈIAM VERDAS PINO**

Iun posttagmezon, kiam Tong Phieng kaj ses aliaj gerilanoj kondukis laboron pri fondo de baznivela organizo en vilaĝo for de la trafikaj linioj, ili estis subite ĉirkaŭfermitaj de malamikoj. La malamikoj freneze hurladis ekstere por timigi kaj sin

aŭdacigi. Antaŭ la multnombraj malamikoj, Tong Phieng trankvile kaj decideme komandadis la gerilanojn kaj sukcese rebatis la foj-refojajn atakojn de la malamikoj. Dum la brava batalado, li firmigadis la volon de la kunbatalantoj kaj ilin stimulis. Post ekstermo de granda nombro da malamikoj, Tong Phieng decidis trarompi la sieĝon ĉe la plej malforta loko de la malamikoj. Kaj dank’ al siaj sagaco, braveco kaj bona kono pri la tereno, finfine li sukcesis trarompi la sieĝon de la malamikoj, kun la gerilanoj sub sia gvido.

Sed la malamikoj tuj ilin persekutis. Por haltigi la malamikojn atakantajn kaj ebligi al la batalkamaradoj sekure retiriĝi, Tong Phieng decidis postresti por ŝirmi. Plurajn malamikojn faligis li sola kun sia pafilo, per sia lerta pafarto akirita per multjara ekzercado. Trovinte, ke malmultaj estas la gerilanoj, la malamikoj alkuris svarme. En tiu kriza momento, Tong Phieng vundiĝis grave, sed li ankoraŭ obstine persistis en batalado, kaj faligis tri aliajn malamikojn per elpafo de la lastaj kugloj. La aliaj gerilanoj jam sekure retiriĝis, kaj tiam Tong Phieng fermis siajn okulojn kun rideto.

Tong Phieng glorie oferis sian vivon, sed lia brila figuro ĉiam vivos en la koro de la popoloj de Phoukien-monto, en la koro de la laosa popolo. Pro lia heroaĵo, la Neo Lao Haksat honoris lin post lia morto per Medalo por Libero.

## **Eminenta Gerilanino**

**N**GUYEN Thi Hanh estas filino de malriĉ-kampano en Long An de suda Vjetnamio. En sia knabineco ŝi ekpartoprenis la nacisavan batalon kontraŭ la usona imperiismo kaj nun kreskis jam en eminentan gerilaninon dank’ al hardado en la revolucia ŝtormo.

Iufoje, kiam la pupa reĝimo okazigis baloton pri parlamento, la gerila taĉmento gvidata de Nguyen Thi Hanh ricevis la taskon puni la malamikon. La gerilanoj enterigis eksplodaĵojn en iu loko kaj surgluis multajn sloganojn kaj flugfoliojn

ĉirkaŭe. Vidinte tiujn afiŝaĵojn, multaj malamikoj alkuris unu post alia. Subite aŭdiĝis du fortaj tondroj... pluraj malamikoj estis mortigitaj aŭ vunditaj. Tiutempe, ankaŭ aliaj batalamikoj, kiuj embuskis en la strategia vilaĝo L.T., ĵetis mangrenadojn al la malamikoj. La malamikoj tuj falis en ĥaoson. Profitante la ŝancon, vilaĝanoj metis en la balotkeston multajn antaŭe preparitajn sloganojn senmaskigantajn la malamikon. Tiamaniere tute bankrotis la falsa “baloto” entreprenata de la malamiko en la strategia vilaĝo L.T.

La gerila taĉmento fariĝis ĉiam pli forta. La malamiko sendis subleŭtenanton de la pupa armeo nomatan Hung al la strategia vilaĝo L.T. por subpremi ĝin. Tiu ĉi ulo jam delonge fifamiĝis pro sia barbara krueleco. Post la alveno li faris sen-nombrajn krimojn. Nguyen Thi Hanh decidis forigi tiun fiulon post konsiliĝo kun siaj superuloj kaj la amasoj.

Iutage, post kiam Nguyen Thi Hanh kaj ŝiaj kamaradoj enterigis minon sur iu vojo, ili trovis ke la fiulo Hung almarŝas miksante sin en aro da pupaj soldatoj. Kiam la malamikoj atingis la lokon, kie ili enterigis la minon, Nguyen Thi Hanh ekpemis la ŝaltilon. "Bum!" Tuj leviĝis densa fumo. Tiu mino mortigis Hung kaj aliajn du malamikojn kaj vundis pliajn du. Ekde tiam la civitanaĵ memdefendaj taĉmentoj kaj sekurigaj trupoj de la malamiko ankoraŭ pli timas gerilajn taĉmentojn.

Nguyen Thi Hanh estas ankaŭ sagaca rekognoskistino.

En iu pluveta nokto, ŝi iris al la strategia vilaĝo L.T. kun lanterno en la mano. Malproksime sekvis ŝin unu plotono el la lokaj trupoj de la Liberiga Armeo. Ili ĉiuj rigardis la lanternon tenatan de Nguyen Thi Hanh. Alvenante vojkruĉiĝon ŝi aŭdis la sonojn de ŝargado kaj tuj poste krion: "Kiu? Haltu!"

Nguyen Thi Hanh tuj sciis ke la sekuriga trupo embuskas ĉi tie. Kaj levante la lanternon, ŝi aplombe respondis laŭvoĉe: "Mi revenas de mia boonklo!"

Trovinte sin malkovritaj, la malamikoj haste fortiriĝis. Tiam ŝi levis la lanternon al la direkto de ilia fortiriĝo. Vidinte tiun signalon, la liberigaj armeanoj turnis sin al montrita direkto renkonte al la malamikoj. Tiamaniere, la liberigaj armeanoj ne nur ne falis en la embuskon de la malamikoj sed, kontraŭe, aktive atakis la malamikojn kaj komplete ekstermis unu malamikan plotonon.

Por prepari kondiĉojn por sukcesa atako de iu trupo de la Liberiga Armeo kontraŭ malamika fortika punkto, foje Nguyen Thi Hanh ricevis la taskon enketi la nombron kaj fajroforton de la malamikoj kaj skizi planon de la fortika punkto. La tasko estis tre malfacila, sed kun grandega energio ŝi faris ĉiujn klopodojn kaj sukcese plenumis la taskon, ĉar ŝi pensis ke ŝia hejmloko estos liberigita post la frakaso de la malamika punkto.

Nguyen Thi Hanh faris multajn meritojn en la milito sur la tero de sia hejmloko. Ŝia gerila taĉmento faris pli ol 380 batalojn kaj ekstermis grandan kvanton da malamikoj. Post la liberigo de sia hejmloko, ŝi denove sin ĵetis en novajn batalojn.



Hiaŭliuĝuang estis vilaĝo ĉe la limo de kontraŭ-japana bazloko. Norde de la vilaĝo fluis rivero kaj ne malproksime de ĝia norda bordo troviĝis reduto de japanaj diabloj. Ĉirkaŭ unu kilometron fore en la oriento de la reduto estis sablejo ebena kaj malkompakta. Estis tre agrable promeni sur ĝi nudpiede. La japanaj diabloj kaj puparmeanoj de la reduto ofte venis ĉi tien por promenado, kaj ankaŭ la geknaboj de Hiaŭliuĝuang ofte venis por naĝi kaj kapti fiŝojn.

Estis varmega somero. Post kelkaj pluvegoj, la fluo en la rivero ŝveliĝis preskaŭ ĝis la alto de la bordoj, kaj neniuj homoj, kiu ne bone scipovis naĝi, kuraĝis naĝi en ĝi frivole. Iutage, kiam la plenaĝuloj siestis, Ĉangpeng naĝis kun kvin aliaj infanliganoj\* al la sablejo sur la norda bordo kiel kutime. Ili estis la plej bonaj naĝantoj el la Infana Ligo de Hiaŭliuĝuang. Iom ludinte sur la bordo, ili sin ĵetis en la riveron por kapti fiŝojn.

“Ehe, jahej...” subite oni ekkriis sur la sablejo.

Tiu voĉo, jam kutima al ili, anoncis, ke la taĉmentestro de la japanaj diabloj kaj la dikulo el la pupa armeo denove luktludas. Ĉiam pli laŭtigis la krioj “E — e — hej!” Ĉangpeng kaj liaj kamaradetoj formetis la reton kaj ĉiuj iris rigardi kune la ludon.

Tiu paro da aĉuloj tion faradis preskaŭ ĉiutage, ĉiam kun la rezulto de egalo. La interesa kaŭzo konsistis el jeno: La japana taĉmentestro estis kvankam forta kaj sufiĉe kolosa, tamen multe malsupera en tio kompare kun la puparmeaj dikuloj, kaj estis preskaŭ neeble por li venki la lastan en luktoludo. Sed la diabla taĉmentestro estis tre vantema kaj nepre volis venki sian rivalon. Li do provis fojo post fojo, kaj kompreneble ne povis

faligi la dikulon. Ja ne necesis granda fortostreĉo por la puparmeaj dikuloj faligi la diablan taĉmentestron en luktoludo, sed tion fari li ne kuraĝis, ĉar se li tion farus, li ricevus multan “repagon”. Sed li ankaŭ ne volis perdi sian honoron kaj ne lasis, ke la diablo lin faligu. Tial, ĉiufoje kiam ili luktis, la ludo kutime daŭris plurajn horojn.

Hodiaŭ revenante de la oriento, ili haltis sur la sablejo. La puparmeano metis sian pafilon en la ombro de arbego sur la deklivo, la japana diablo pendigis sian pistolon sur ĝian trunkon, kaj ili denove komencis sian luktludon.

Rigardinte ilian ludon dum momento, Ĉangpeng kaj liaj kamaradetoj rimarkis du pafilojn ĉe la dorso de la arbego. Ĉangpeng signis palpebrume al siaj kamaradetoj, intence kuris kelkajn paŝojn orienten, ekkriis kvazaŭ li kaptus ion kaj per tiu ŝajnigo kolektis la infanliganojn. Ili interkonsiliĝis kaj poste ekagis.

Ju pli longe luktis la du aĉuloj, des pli ardiĝis ilia pasio. Ili vestoj tramalsekiĝis, kaj ŝvito pikadis iliajn okulojn kaj malklarigis ilian vidon. Tiam, Ĉangpeng kaj aliaj tri intence staris nordokcidente de ili por bari ilian rigardon; Milaj kaj Ŝuŝeng iris zigzage kaj iom post iom proksimiĝis al la arbego, ŝajnigante sin tute senintencaj. Ili kaptis la pafilojn kaj ekkuris. Ankaŭ Ĉangpeng kaj la aliaj liganoj kuris ilin sekvante. Sed, antaŭ ol ili kuris longan distancon la puparmeano rimarkis ilin kaj kriegis, ke la japana taĉmentestro tuj ĉesu. La japana taĉmentestro pensis, ke la puparmeano jam senfortiĝis, do li ĉirkaŭprenis lin pli firme, ke la lasta neniel povis sin liberigi. Tio vere senpaciencigis la dikulon, ke li sin svingis per ĉiuj siaj fortoj kaj forskuis la



## Letero de Sveda Leganto K. J.

Kore mi dankas vin por via afabla letero de la 4-a de aprilo. Kaj ankaŭ koran dankon por la belaj artkartoĵoj, kiujn vi aldonis al mi en la letero.

Mi alte admiras la ĉinan proletaron kiu tiom kuraĝe kaj sukcese sub la la talenta gvidado de Prezidanto Maŭ batis kaj batas la reakciajn

fortojn, kiuj volas restarigi la kapitalismon.

Estas tre bone, ke la ĉina popolo povis forpeli la imperiistajn banditojn, kiuj tiom longtempe suferigis la ĉinojn.

Dum longa tempo mi multe legis en la gazetoj pri okazaĵoj en Ĉinio.

Mi bone memoras pri la boksula ribelo en Ĉinio en la jaro 1900. Tiam la imperiistaj fortoj atakis vian landon kaj strangolis la ribelon per

sia kolektita banditaro sub komando de germana generalaĉo Alfred von Waldersee.

La revolucion en la jaro 1911 mi ankaŭ tre bone memoras. Tiu ribelo pli bone sukcesis kaj tiam Ĉinio fariĝis respubliko sub gvido de liberala Sun Jat-sen, kiu fariĝis ties unua prezidanto.

Furiozas ankoraŭ la reakciaj fortoj en la mondo kun la jankiaj imperiistoj ĉe la kapo. Kaj ili ege subpremas




taĉmentestron malproksimen. Li faris hurlon kaj kuris al Ĉangpeng kaj liaj amiketoj. Tiam ankaŭ la diabla taĉmentestro sin levis de sur la tero kaj komprenis, kio okazis. Sed kiam li kaj la puparmeano atingis la riverbordon, Ĉangpeng kaj liaj kamaradetoj jam sin ĵetis en la riveron. La du aĉuloj ne scipovis naĝi; ili rigardadis en la riveron kun rondigitaj okuloj, gestante kaj kriante. La knaboj antaŭe jam sciis tiun malfortecon de la malamikoj. Tial ili naĝis tute senĝene al la transa bordo, spite al la kriegado de la malamikoj.

Dum la naĝado, ili alterne portis la pafilojn, antaŭen puŝigante tra la ondoj per siaj manetoj kaj brue disŝprucigante akverojn. La bravaj malgrandaj batalantoj transnaĝis la rapidan torenton, sed estis puŝitaj de la fluo ĉirkaŭ unu kilometron malsupren. Por trompi la malamikojn, ili kuris rekte orienten post suriro de la suda bordo, kaj malaperis en sorgan kampon post trakuro de nelonga distanco.

Kurinte ĉirkaŭ kvaronan kilometron, ili denove aŭdis malklare kriojn sur la transa bordo, kaj poste sekvis salvo de pafiloj. Kugloj flugis orienten sibilante — la stultaj malamikoj denove kaptiĝis de la ruzo. Ĝoje saltante la knaboj revenis al sia vilaĝo kaj transdonis la pafilojn al siaj propraj kamaradoj.

*\*Infana Ligo estis organizo de geknaboj starigita de la Komunista Partio de Ĉinio en la kontraŭjapanaj demokratiaj bazlokoj. La tasko de tiu organizo estis unuigi geknabojn por ke ili partoprenu laŭ siaj kapabloj kontraŭjapanajn nacisavajn aktivadojn, kiaj gardstari, gvati, transporti sciigojn kaj spioni pri la malamikoj. Tiu organizo faris grandan kontribuon en la kontraŭjapana batalo.*



kaj mortpafas siajn enlandajn precipe negrojn. Ĵus ili mortpafis la negrogvidanton King. En Vjetnamio la usona murdistligo furiozas kiel diabloj jam de multaj jaroj.

Tamen oni volas esperi, ke la subpremataj popoloj en la mondo sukcesu forpeli siajn subpremantojn kiel heroe faris la ĉina popolo, gvidata de la plej eminenta nuntempa proletara gvidanto Maŭ Zedong. Certe via granda lando sub lia bonega gvido por la popolo trovas la plej helan estontecon.

Jen ĉi kune mi aldonis versaĵon, kiun mi verkis.

### Por la Nova Tempo

*Ekaperis batalanto,  
La plej brava grandanima,  
Por proletoj la gvidanto  
Kuraĝega kaj sentima.  
Maŭ Zedong jen lia nomo,  
Amas lin en tuta mondo  
Ĉiu subpremata homo  
En la proletara rondo.*

*Okazigis li bonfaron:  
Liberigis subpremantojn*

*Kaj timigis la burĝaron,  
Al ĝi donis gravajn batojn.  
Tra la mondo el Ĉinio  
Sonas la ribela kanto,  
Kaj por la revolucio  
Gvidas lerta Prezidanto.*

*El la lando li forpelis  
La imperiistbanditojn,  
Kiuj nur rabante celis  
Enpoŝigi grandprofitojn.  
Fiaskiĝis burĝa baro,  
Ĝin profunde li detruas,  
Bone por la proletaro  
Novkulturon li konstruas.*



Kara amiko,

Ni jam ricevis vian leteron, en kiu vi skribis, ke la burĝara gazetaro en via lando konstante kalumnias ke "la granda kultura revolucio kaŭzis ĥaoson en la ĉina ekonomio kaj reduktion de produkto en industrio kaj agrikulturo". Pro tio vi esperas, ke nia revuo donu pli da spaco al informoj pri la disvolviĝo de la industria kaj agrikultura produktado de Ĉinio, por ke vi povu klarigi al viaj amikoj la veron de la faktoj kaj refuti la mensogojn de imperiismo, reviziismo kaj reakciularo. Al via nobla spirito de justamo ni esprimas nian altan estimon kaj sincere akceptas vian bonvolan proponon.

Ĉiuj scias, ke la propagandistoj de imperiismo, reviziismo kaj reakciularo ĉiam vivas el kalumniado. Tamen, mensogo restas mensogo, la faktoj plene frakasis iliajn kalumniojn. Nun, fariĝas ĉiam pli bona la situacio de la revolucio kaj produkto de nia lando. La granda proletara kultura revolucio jam fariĝis potenca movforto akcelanta la industrian kaj agrikulturan produktadon, kaj prospero plene regas sur niaj industria kaj agrikultura frontoj.

Prenu la agrikulturon kiel ekzemplon. Ekde la granda proletara kultura revolucio, aktive respondante al la granda alvoko de Prezidanto Maŭ "teni la revolucion kaj stimuli la produkton" kaj sub la gvido de la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ, la plurcentmiliono kamparanaro de nia lando direktas sian altan entuziasmon vekitan en la granda proletara kultura revolucio al produktado kaj atingis brilajn sukcesojn en la agrikultura fronto. Vi scias, ke 1966 estis la jaro, en kiu sukcese disvolviĝis la granda proletara kultura revolucio de nia lando. Ĝuste en tiu jaro, nia lando

venkis la sufiĉe seriozan naturan katastrofon en agrikulturo kaj akiris la plej grandan riĉan rikolton en la 17 jaroj de post la Liberiĝo. En 1967 la granda proletara kultura revolucio de nia lando atingis decidan triumfon. En tiu jaro, la rikolto de diversspecaj agrikulturaj plantaĵoj de la tuta lando estis ĝenerale eĉ pli bona ol tiu en 1966. Ne nur la produktkvanto de la grenaj plantaĵoj kreis plej altan nivelon en la historio, sed ankaŭ tiu de la kotono, plantoj oleaj, sukeraĵoj kaj fibraj, tabako, fruktoj, kokonoj kaj brutoj superis la plej altan produktan nivelon en la historio. Ĉijare, sub la bonega situacio de la batalo de la tutlanda popolo por akiri kompletan triumfon de la granda proletara kultura revolucio, milionoj kaj milionoj da malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, kun sia plena entuziasmo kaj vigla batalvolo, ree akiris riĉan rikolton de someraj grenoj tra la tuta lando.

Dank' al abundaj rikoltoj de la agrikulturo en sinsekvaj jaroj, en la merkato de nia lando en la urboj kaj kamparo ĉie regas prospero, kaj stabilas la prezoj. La liverado de grenoj, viandoj, legomoj, fruktoj ktp. pliboniĝas jaron post jaro. Nun en la merkato de Pekino eksterordinare riĉas diversaj agrikulturaj produktaĵoj, porkviando, kokoj, anasoj, ovoj, lakto kaj diversaj freŝaj legomoj, kies prezoj estas tre malaltaj, kaj la konsumantoj povas libere elekti laŭ sia prefero.

Nu, kiel statas en la landoj sub la regado de imperiismo, reviziismo kaj reakciularo? En Usono, lando konata kiel la plej riĉa en la kapitalisma mondo, de la lastaj 20 jaroj, la agrikulturo ĉiam troviĝas en neforskuebla krizo de superproduktado, kaj la vivo de la vasta laboranta popolo, precipe de la kamparanaro,

falas en mizero kun ĉiu tago. Lasttempe, en sia raporto post naŭmonata enketado, iu popola organizo de Usono nomata "Civila Enketa Komitato pri Demandoj de Malsato kaj Subnutrado" diris, ke nun en Usono "proksimume 14.5 milionoj da homoj suferas malsaton", pli ol 250 konteoj en 20 ŝtatoj de la tuta lando estas listigitaj kiel "regionoj de malsato", kaj "la stato kontinue malboniĝas". Johnson ne povis ne konfesi, ke "mizero estas problemo kun landa karaktero".

En Sovetunio, kie aperis ĉiufanka restaŭro de kapitalismo, la agrikultura produktado estas pli kaj pli fuŝata. Tiu bando da renegatoj kaj laboristperfiduloj Breĵnev, Kosiĝin k. a. jam delonge forkonsumis la grenon rezervitan en la periodo de Stalin. Ekde 1963, ili jam vivas el aŭkcio de oro kaj importado de tritiko. En la merkato varoj eksterordinare mankas, kaj prezoj estas tre altaj. Viandoj, viandaĵoj kaj fruktoj estas nomataj en ĉefartikolo de *Pravda* kiel "altprezaj komercaĵoj". El tio estas videble, en kiom serioza grado mankas la agrikulturaj produktaĵoj!

Ni vidu plie iujn landojn de Azio. Japanio jam delonge fariĝis la plej granda merkato por la usona imperiismo por dumpingi la "superfluajn" agrikulturajn produktaĵojn. En la lastaj ses jaroj ĝia importado de grenoj pliiĝis pli ol kvaroble; tio multe akcelis la bankroton de la japana agrikulturo. En Hindio, sub la ŝirmo de Usono kaj Sovetunio, ĉiujare 300,000,000 popolanoj troviĝas en duonmalsato, 80 el cent infanoj suferas "nanecon pro subnutrado", miloj kaj dekmiloj da homoj mortas pro malsato. Sub la reakcia regado de Ne Vin, Birmo, la fama rizprodukta lando, jam fariĝis lando de malsateco. Tie la prezo de rizo sepoble plialtiĝis en kom-

## OKCIDENTA GERMANIO FARIĜAS ĈIAM PLI FAŜISMA

Sub la subinstigo kaj apogo de la usona imperiismo, la reakciaj aŭtoritatuloj de Okcidenta Germanio impertinente ellaboris kaj pasigis, spite al la forta kontraŭstaro de la popoloj enlanda kaj eksterlandaj, la “leĝon pri urĝa stato”, kiu celas plifortigi ilian faŝisman regadon. Surbaze de tiu “leĝo”, la registaro de Okcidenta Germanio povas, en ĉiu ajn tempo, sub preteksto de apero de “urĝa stato” en aŭ ekster la lando, pliintensigi la ekspansion de siaj armitaj fortoj kaj la preparadon de milito, revivigi militarismen, arbitre senigi sian laborantan popolon je la plej bazaj politikaj rajtoj, kaj eĉ movi trupojn por subpremi armite la popolon, kaj per tio ili radikale atencis la internacian interkonsenton pri elimino de militarismo kaj faŝismo en Germanio.

Ekde 1960 la reganta kliko de Okcidenta Germanio jam multfoje prezentis tiun faŝisman leĝon al la parlamento por diskutado, sed ili ne sukcesis realigi sian celon ĝis antaŭ nelonge pro la forta kontraŭstaro de la popolo. Nun, la enlandaj kontraŭdiroj pli akriĝis kaj la laborista kaj studenta movadoj ĉiam pli vigliĝas en la lando; pro tio la maltrankviligita monopola burĝaro de Okcidenta Germanio refoje elmetis tiun faŝisman leĝon, utiligis la pozicion de plimulto de la reganta partio en la parlamento, kaj urĝeme pasigis ĝin per sia balotmaŝino por kontentigi siajn bezonojn en pliintensigata subpremado al la revolucia batalo de sia popolo.

## PLI INTENSA KOLUZIO DE SOVETUNIA REVIZIISMA RENEGATA KLIKO KUN INDONEZIA REAKCIULARO EN MILITO

Laŭ Antara, oficiala organo de Indonezio, en la mezo de majo la ministro por eksterlandaj aferoj de la indonezia faŝista militista reĝimo Malik malkaŝis, ke la sovetunia reviziisma renegata kliko konsentis “vendi al Indonezio akcesorajn partojn, kiujn la indoneziaj armitaj fortoj bezonas”. Tiu kliko pretas ankaŭ “pagi la elspezojn por la personoj de la indoneziaj armitaj fortoj, kiuj nun ricevas trejnadon en Sovetunio”. Krome, laŭ la malkaŝo de la Djakarta ĵurnalo *Suluh Marhaen*, superaj oficiroj de la sovetunia reviziisma renegata kliko, inkluzive de Paĥomenko, iris senbrue en januaro al orienta Javo, la loko, kie jam aktivis armita batalo de la indonezia popolo, por intrigi tie kaj “diskuti pri la ebleco liveri helpon al Indonezio en la formo de aviadilaj partoj fare de Sovetunio”, kune kun la ĉefoj de la indoneziaj aeraj fortoj.

Nun la faŝista militista reĝimo de Suharto-Nasution estas uzanta la armilojn provizitajn de ĝiaj mastroj — la usonaj imperiistoj kaj la sovetuniaj reviziistoj — por furioze subpremi la revolucian armitan batalon de la indonezia popolo. Krom malkovri plue la reakciajn trajtojn de la usonaj imperiistoj kaj sovetuniaj reviziistoj, tio povas nur instigi la heroajn indoneziajn komunistojn kaj revolucian popolon pli alte levi la standardon de revolucia armita batalo kaj marŝi kuraĝe antaŭen.

paro kun tiu de la pasinteco; miloj kaj dekmiloj da laborantaj popolanoj povas preni ĉiutage nur unu manĝon. En Indonezio regata de la faŝisma militista reĝimo de Suharto, la stato estas ankoraŭ pli mizera. La prezo de rizo fluge ŝveladas, kaj la popolo baraktas inter vivo kaj morto. Sole sur insulo Lombok, en unu jaro, pli ol 10,000 loĝantoj mortis

pro malsato. Suharto ne povis ne konfesi, ke “1968 estas la jaro de maksimuma tolerebleco por la popolo”.

El la suprediritaj okulfrapaj kontrastoj vi povas vidi, ke ne estas la socialisma Ĉinio, sed male, la landoj regataj de imperiismo, reviziismo kaj reakciularo, kie ĥaoso

regas en ekonomio, krizoj koviĝas ĉie en industrio kaj agrikulturo, kaj la popolo vivas en mizero. Vidu, kara amiko, ĉu la faktoj ne tiel parolas! Bonvolu ĉiam skribi al ni, kiam vi havas ion por diri pri nia revuo.

*La Red.*

*Sur la  
kovrilo*

K-dino Hju Hingdi, vicrotestrino de milico sur insulo ĉe la orientmara frontlinio, senlime amas Prezidanton Maŭ, firme tenas en la memoro la klasajn suferojn, kun la pafilo en la manoj helpas, kune kun la popolamaso, la PLA-trupon garnizonantan sur la insulo en patrolado kaj gardstarado por defendi la maran teritorion de la patrio.

*Sur la  
dorskovrilo*

Reveno post milita trejnado

# EL POPOLA ĈINIO

人民中國報道

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO

P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

N-ro 8—9 (122) 1968

## Ĉefa Enhavo

Ruĝa Flago Flirtas sur Ĉajaŝan-montaro  
Ŝanĝiĝoj de Akvoriĉa Regiono  
Grenejo el Kalva Monto  
Nova Entreprenado en Montara Arbaro  
Angulo de Silkraŭpa Regiono  
Nova Fizionomio en Hanggin-a Posta Flago  
Men He, Bona Kadro de Prezidanto Maŭ  
Rakontoj pri la Heroo Men He  
En Lia Koro Nur Prezidanto Maŭ  
Bona Filo de la Laboranta Popolo  
Heroa Batalanto Liu Hjuebaŭ  
La "Naŭa Familio" de Fiŝista Vilaĝo  
En Kriza Momento  
Lernantoj-praktikantoj de Kongolando (B.) Varme Amas  
Prezidanton Maŭ  
Nova Japanlingva Eldono de la Unua Volumo de "Elektitaj  
Verkoj de Maŭ Zedong" Distribuita en Japanio  
Eldoniĝis Verkoj de Granda Gvidanto de Albana Popolo  
K-do Hoxha  
Granda Ŝtormo  
La Ĉina Popolo Subtenas Vin  
Forta "Tertremo" en Francio  
Por Kiu Ili Parolas?  
Konfeso de Komplico  
Vero pri la Kultura Revolucio  
Ĉinio Iras Novan Vojon en Ŝtalproduktado  
Ĉinio Konstruis Sian Unuan Instalaĵon por Produkto de  
Metilalkoholo  
Verda Pino sur Phoukien-monto  
Eminenta Gerilanino

# Triumfa Kanto sur Tibeta Altebenaĵo

La garnizono de PLA en Tibeto sendis al la liberigitaj servutuloj ruĝajn trezorajn librojn de Prezidanto Maŭ. La foto montras PLA-aninon (*dekstre*) studantan verkon de Prezidanto Maŭ kune kun juna tibetano Kiongda.



Sub la direktado de serio da plej novaj instrukcioj de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ, la revolucia kaj produkta situacio sur la tibeta altebenaĵo de nia lando estas treege bona kaj fariĝas ĉiam pli bona.

Sub la helpo de la garnizonantaj trupoj de PLA en Tibeto, la liberigitaj servutuloj en nombro de miliono sur la tibeta altebenaĵo, de la agrikultura regiono ĝis la paŝta regiono, vaste starigas diversformajn studrondojn de la penso de Maŭ Zedong, efektivas plene la plej novajn instrukciojn de Prezidanto Maŭ, levas per tio la grandan malamon de la vastaj revoluciaj amasoj kontraŭ la Ĥruŝĉov de Ĉinio, liaj agentoj en Tibeto kaj la servutulmastroj, profunde disvolvas revolucionan amasan kritikon kaj antaŭenpuŝas la revolucion grandan unuiĝon kaj la revolucion triflankan kombiniĝon, tiel ke sinsekve naskiĝis revoluciaj komitatoj ĉe bazaj organizoj. La triumfa disvolviĝo de la granda proletara kultura revolucio akcelas ĝeneralan prosperadon de agrikultura kaj paŝta produktado.

Kun senkompara ĝojo la liberigitaj servutuloj aŭskultas la parolon de aktivulo de studo de verkoj de Prezidanto Maŭ en la kunveno pri apliko de verkoj de Prezidanto Maŭ okazigita de la revolucia komitato de Giefang-vilaĝo en la antaŭurbo de Lhasa.

La komandantoj kaj batalantoj de iu garnizona trupo de PLA en Tibeto kulturas kun lokaj loĝantoj la "kampon de unuiĝo de la armeo kaj la popolo". Ili kune laboras en granda intimeco.





Senfine longan vivon deziras al Prezidanto Maŭ la tuta studrondo de la penso de Maŭ Zedong de la familio de liberigita servutulo. La studrondon iniciatis la dek-jara filo Sigu.



La junulara propaganda trupo de la penso de Maŭ Zedong de Fanŝen-vilaĝo, Ninggong-distrikto, Danghiong-gubernio, pasie kantas pri la granda gvidanto Prezidanto Maŭ.

